

Maurice Leblanc

ARSENO LUPENO GENTLEMANO-ÂTELISTO

(1907)



Tradukis el la Franca

Alano Gerardo

<http://a.gerard4.free.fr>

la 30-an de aŭgusto 2018

ENHAVTABELO

– 1 –	<i>La aresto de Arseno Lupeno.....</i>	4
– 2 –	<i>Arseno Lupeno en malliberejo.....</i>	25
– 3 –	<i>La eskapo de Arseno Lupeno.....</i>	55
– 4 –	<i>La mistera vojaĝanto.....</i>	85
– 5 –	<i>La Koliero de la Reĝino.....</i>	109
– 6 –	<i>La kera sepo.....</i>	134
– 7 –	<i>La monŝranko de sinjorino Imbert.....</i>	188
– 8 –	<i>La nigra perlo.....</i>	205
– 9 –	<i>Ŝerloko Holmsso alvenas tro malfrue.....</i>	226

La aresto de Arseno Lupeno

Kia stranga vojaĝo! Ĝi tamen tiel bone komenciĝis! Miaflanke, mi neniam faris unu, kiu sin prezentis pli bonaŭgure. *La Provenco* estas rapida transatlantika ŝipo, komforta, komandata de la plej afabla viro. Tie, la plej elektita societo kuniĝadis. Interrilatoj teksigis, distraĵoj organiziĝis. Ni havis tian delican impreson, kvazaŭ ni estus apartigitaj disde la mondo, reduktitaj al ni mem sur nekonata insulo, sekve devigitaj proksimiĝi unu al la alia.

Kaj ni interproksimiĝis...

Ĉu vi iam pensis pri kio originala kaj neantaŭvidebla estas en tiu aro da estuloj, kiuj la antaŭtagon ankoraŭ ne interkoniĝis, kaj kiuj dum kelkaj tagoj, inter la senfina ĉielo kaj la vastega maro, plej intime kunvivos, spitos kune la kolerojn de la oceano, la teruran sturmon de la ondoj kaj la insidan kvieton de la dormanta akvo?

Fine, tio estas la vivo mem, travivita kvazaŭ ia tragedia mallongigo, kun ĝiaj fulmotondroj kaj grandiozeco, ĝiaj unutoneco kaj diverseco, kaj jen kial, eble, oni gustumas kun febra hasto kaj tiom pli intensa volupto tiun mallongan vojaĝon, kies finon oni ekvidas en la momento mem kiam ĝi komenciĝas.

Sed, de pluraj jaroj, okazas io, kiu neordinare pliigas la emociojn de la traveturado. La flosanta insuleto ankoraŭ

dependas de tiu mondo, el kiu oni sin kredis forliberigita. Postvivas ligo, kiu elnodiĝas nur iom post iom, meze de la oceano, kaj iom post iom, meze de la oceano, renodiĝas. La sendrata telegrafo! Vokoj de alia universo, el kiu oni ricevis novaĵojn per la plejeble mistera maniero! Imago ne plu havas la eblon elvoki ferajn dratojn, en kies kavo glitas la nevidebla mesaĝo. La mistero estas ankoraŭ pli nesondebla, pli poezia ankoraŭ, kaj per la flugiloj de la vento oni sin helpu por klarigi tiun novan miraklon.

Tiel, la unuajn horojn, ni sentis nin sekvataj, eskortataj, eĉ antaŭataj de tiu malproksima voĉo, kiu tempaltempe flustris al unu el ni iujn tieajn parolojn. Du amikoj parolis al mi. Dek aliaj, dudek aliaj sendis al ni ĉiuj, tra spaco, siajn ĉagrenajn aŭ ĝojajn adiaŭojn.

Nu, la duan tagon, je kvincent mejloj for de la francaj marbordoj, dum fulmotondra posttagmezo, la sendrata telegrafo transdonis al ni depeŝon, kies enhavo estis jena:

“Arseno Lupeno sur via ŝipo, unua klaso, blondajn harojn, vundon ĉe dekstra antaŭbrako, vojaĝas sola, sub la nomo R...”

Je tiu preciza momento, akra ektondro eksplodis en la malhela ĉielo. La elektraĵoj ondoj estis interrompitaj. La cetero de la depeŝo ne atingis nin. Pri la nomo, sub kiu sin kaŝis Arseno Lupeno, nur la inicialon ni sciis.

Se temus pri iu alia novaĵo, mi ne dubas, ke la sekreto estus konsciencie konservita de la telegrafaj oficistoj, samkiel de la ŝipkomisaro kaj de la kapitano. Sed estas tiaj eventoj, kiaj ŝajnas altrudi la plej rigoran diskretecon. Tiun saman tagon, ne

povinte diri kiel la afero malsekretiĝis, ni ĉiuj sciis, ke la fama Arseno Lupeno sin kaŝas inter ni.

Arseno Lupeno inter ni! La nekaptebla ŝtelisto, kies prodaĵojn en ĉiuj gazetoj oni rakontis de monatoj! La enigma famulo, kun kiu la maljuna Ganimardo, nia plej bona policisto, komencis tiun ĝismortan duelon, kies peripetioj disvolviĝis tiel pitoreske! Arseno Lupeno, la fantazia ĝentlemano, kiu agas nur en kasteloj kaj salonoj, kaj kiu, iun nokton, penetrante ĉe la barono Schormann, foriris kun malplenaj manoj kaj lasis sian karton, ornamitan per tiu formulo: “*Arseno Lupeno, ĝentlemano-ŝtelisto, revenos kiam la mebloj estos aŭtentikaj.*” Arseno Lupeno, la viro kun mil maskovestoj: laŭvice ŝoforo, tenoro, vetperisto, bonfamilia filo, adoleskanto, kadukulo, marsejla vojaĝkomizo, rusa kuracisto, hispana toreadoro!

Oni ja ekkonsciu pri tio: Arseno Lupeno irante tien kaj reen en la relative malvasta kadro de transatlantika ŝipo, kion mi diras! en tiu eta angulo de la unuaj klasoj, kie oni kuniĝis ĉiumomente, en tiu manĝoĉambro, en tiu salono, en tiu fumejo! Arseno Lupeno eble estis tiu ĉi viro... aŭ tiu... mia manĝotabla najbaro... mia kajuta kunulo...

– Kaj tio daŭros ankoraŭ kvin oble dudek kvar horojn! ekkriis la morgaŭon F-ino Nelly Underdown, sed tio estas netolerebla! Mi ja esperas, ke oni lin baldaŭ arestu.

Kaj alparolante min:

– Nu, vi, S-ro d'Andrésy, kiu jam plej bone rilatas kun la kapitano, ĉu vi nenion scias?

Mi ja estus volinta scii ion por plaĉi al F-ino Nelly! Ŝi estis unu el tiuj belegaj kreitaĵoj, kiuj ĉie ajn ili estas, tuj okupas la plej enviindan lokon. Ilia beleco samkiel ilia fortuno blindumas. Ili havas kortegon, fervorulojn, entuziasmojn.

Edukita en Parizo de franca patrino, ŝi aliris al sia patro, la riĉega Underdown, el Ĉikago. Unu el ŝiaj amikinoj, S-ino Jerland, akompanis ŝin.

Tuj de la unua horo, mi kandidatiĝis al amindumo. Sed en la rapida intimeco de la vojaĝo, ŝia ĉarmo tuj konfuzis min, kaj mi sentis min iom tro emociita por amindumo, kiam ŝiaj grandaj nigraj okuloj renkontis la miajn. Tamen, ŝi akceptis miajn galantaĵojn kun ia favoro. Ŝi deĝnis ridi je miaj spritaĵoj kaj interesiĝi pri miaj anekdotoj. Ioma simpatio ŝajnis respondi al la diligenteco, kiun mi montris al ŝi.

Nur unu rivalo eble maltrankviligis min, iom bela junulo, eleganta, sindetenema, kies silenteman humoron ŝi kelkfoje ŝajnis preferi ol miajn pli “eksterajn” manierojn de parizano.

Li ĝuste enestis la grupon da admirantoj, kiu ĉirkaŭis F-inon Nelly, kiam ŝi pridemandis min. Ni estis sur la ferdeko, agrable instalitaj sur balancoseĝoj. La hieraŭa oraĝo heligis la ĉielon. La horo estis delica.

– Nenion specialan mi scias, fraŭlino, mi respondis al ŝi, sed ĉu ne eblas, ke ni mem kondukus nian enketon, tiel bone kiel farus la maljuna Ganimardo, la persona malamiko de Arseno Lupeno?

– Ho, ho! vi multe aŭdacas!

- Kial do? Ĉu la problemo estas tiom komplika?
- Tre komplika.
- Tio estas, ke vi forgesas la elementojn, kiujn ni havas por ĝin solvi.
- Kiujn elementojn?
- 1. Lupeno sin nomigas sinjoro R...
- Iom malpreciza priskribo.
- 2. Li vojaĝas sola.
- Se tiu detalo sufiĉas al vi.
- 3. Li estas blondhara.
- Kaj do?
- Do ni nur konsultu la liston de la pasaĝeroj kaj elimine procedu.

Mi havis tiun liston en mia poŝo. Ĝin mi prenis kaj tralegis.

- Mi unue notas, ke estas nur dek tri personoj, kies inicialo nin atentigas.
- Nur dek tri, ĉu?
- En la unua klaso, jes. El tiuj dek tri sinjoroj R..., kiel vi mem povas certiĝi, naŭ estas akompanataj de edzinoj, infanoj

aŭ servistoj. Restas kvar personoj solaj: la markizo de Raverdan...

– Sekretario de ambasadejo, interrompis F-ino Nelly, mi konas lin.

– La majoro Rawson...

– Li estas mia onklo, diris iu.

– S-ro Rivolta...

– Ĉi tie, ekkriis unu el ni, italo, kies vizaĝo malaperis sub barbo plej bele nigra.

F-ino Nelly ekridegis.

– Sinjoro ne precize estas blonda.

– Do, mi daŭrigis, ni konkludu, ke la kulpulo estas la lasta de la listo.

– Tio estas...?

– Tio estas S-ro Rozeno. Ĉu iu konas S-ron Rozeno?

Oni eksilentis. Sed F-ino Nelly, alparolante la silenteman junulon kies asidueco apud ŝi turmentis min, diris al li:

– Nu, sinjoro Rozeno, vi ne respondas?

Oni turnis la okulojn al li. Li estis blondulo.

Mi konfesu, ke mi sentis kvazaŭ ŝoketon funde de mi. Kaj la ĝena silento, kiu pezis sur nin, indikis al mi, ke la aliaj ĉeestantoj ankaŭ spertas tian sufokon. Cetere tio estis absurda, ĉar fine nenio en la aspektoj de tiu sinjoro ebligis, ke oni lin suspektu.

– Kial mi ne respondas? li diris, ĉar pro mia nomo, mia eco de vojaĝanto sola kaj la koloro de miaj haroj, mi jam plenumis analogan enketon kaj mi atingis la saman rezulton. Do mi opinias, ke oni min arestu.

Li havis strangan mienon, eldirante tiujn parolojn. Liaj lipoj maldikaj kvazaŭ du neflekseblaj strekoj plue maldikiĝis kaj paliĝis. Sangofluetoj striis liajn okulojn.

Li ja ŝercis. Tamen lia fizionomio, lia sinteno imponis nin. Naive, F-ino Nelly demandis:

– Sed vi ne havas vundon, ĉu?

– Estas vere, li diris, la vundo mankas.

Per nervoza gesto li levis sian manikon kaj malkovris la brakon. Sed ideo tuj frapis min. Miaj okuloj kruciĝis kun tiuj de F-ino Nelly: li montris la maldekstran brakon.

Kaj nu, mi tion estis klare rimarkigonta, kiam incidento deturnis nian atenton. S-ino Jerland, la amikino de F-ino Nelly, alvenis kurante.

Ŝi estis tute skuita. Oni diligentis ĉirkaŭ ŝi, kaj nur post multaj penoj ŝi sukcesis balbuti:

– Miajn juvelojn, miajn perlojn!... oni ĉion forprenis!...

Ne, oni ne ĉion forprenis, kiel ni eksciis poste; afero multe pli kurioza: oni elektis!

De la diamanta stelo, de la pendjuvelo el rubenaj kapoloj, de la disrompitaj kolieroj kaj braceletoj, oni detiris ne la plej dikajn gemojn, sed la plej fajnajn, la plej grandvalorajn, tiujn, kiuj ŝajne plej valoris okupante plejeble malmultan spacon. La muntumoj kuŝis tie, sur la tablo. Mi vidis ilin, ni ĉiuj vidis ilin, senjuveligitajn kvazaŭ florojn, kies belajn petalojn brilajn kaj kolorajn oni estus elŝirinta.

Kaj por efektivigi tiun laboron, dum la horo kiam S-ino Jerland trinkis teon, plenmeze de tago, kaj en frekventita koridoro, necesis rompi la kajutan pordon, trovi saketon intence kaŝitan funde de ĉapelskatolo, malfermi ĝin kaj elekti!

Estis nur unu krio inter ni. Estis nur unu opinio inter ĉiuj pasaĝeroj, kiam la ŝtelo estis sciita: tio estas Arseno Lupeno. Kaj efektive, tio ja estis lia komplika agmaniero, mistera, neimagebla... kaj tamen logika, ĉar, se estas malfacile enkaŝi la embarasan kvanton de tuta juvelaro, kiom malpli ampleksaj estas etaj aferoj sendependaj unu de la aliaj, perloj, smeraldoj kaj safiroj!

Kaj dum la vespermanĝo, okazis la jeno: dekstre kaj maldekstre de Rozeno, ambaŭ sidlokoj restis neokupitaj. Kaj la vesperon oni sciis, ke li estis kunvokita de la kapitano.

Lia aresto, pri kiu neniuj dubis, estigis veran malpeziĝon. Oni fine malstreĉiĝis. Ĉi-vespere oni sin distris per ludetoj. Oni

dancis. F-ino Nelly, ĉefe, montris kaptunan gajecon, kiu vidigis ke se la galantaĵoj de Rozeno eble plaĉis al ŝi unue, tion ŝi nun ne multe memoras. Ŝia gracieco finkonkeris min. Ĉirkaŭ noktomezo, sub serena lunlumo, mi asertis al ŝi mian sindonemon kun emocio, kiu ne ŝajnis malplaĉi al ŝi.

Sed la morgaŭon, je la ĝenerala stuporo, oni eksciis, ke la akuzoj registritaj kontraŭ li ne estas sufiĉaj, Rozeno estis libera.

Filo de konsiderinda negocisto el Bordojo, li elmontris perfekte validajn legitimaĵojn. Krome, liaj brakoj prezentis nenian ajn vundon.

– Legitimaĵojn! aktojn de naskiĝo! ekkriis la malamikoj de Rozeno, sed Arseno Lupeno havigos al vi tiom, kiom vi volos! Rilate la vundon, li do ne ricevis iun ajn... aŭ li malaperigis ĝian spuron!

Oni obĵetis al ili, ke je la ŝtela horo, Rozeno – tio estis pruvita – promenis sur la ferdeko. Al kio ili rebatis:

– Ĉu viro samesenca kiel Arseno Lupeno bezonas ĉeesti la ŝtelon, kiun li plenumas?

Kaj plie, ĉiu fremda konsidero flanklasita, estis punkto pri kiu la plej skeptikaj ne povis kontraŭargumenti. Kiu, escepte de Rozeno, vojaĝis sola, estis blondhara, kaj havis nomon komenciĝantan per R? Kiun la telegramo almontris, krom Rozenon?

Kaj kiam Rozeno, kelkajn minutojn antaŭ la tagmanĝo, aŭdace direkti sin al nia grupo, F-ino Nelly kaj S-ino Jerland ekstaris kaj foriris.

Tio ja estis timo.

Unu horon poste, manskribita cirkulero pasis de mano al mano inter la ŝiplaboristoj, la matrosoj, la vojaĝantoj el ĉiuj klasoj: S-ro Louis Rozeno promesis monsumon de dek mil frankoj por tiu, kiu senmaskigus Arsenon Lupenon, aŭ trovus la posedanton de la ŝtelitaj gemoj.

– Kaj se neniuj helpas min kontraŭ tiu bandito, deklaris Rozeno al la kapitano, mi mem prizorgos lin.

Rozeno kontraŭ Arseno Lupeno, aŭ pliĝuste, laŭ la cirkulinta onidiro, Arseno Lupeno mem kontraŭ Arseno Lupeno, la lukto ne malhavis intereson!

Ĝi plidaŭris dum du tagoj.

Oni vidis Rozenon vagi tie kaj ĉi tie, enmiksiĝi en la laboristaron, pridemandi, priserĉi. Oni ekvidis lian ombron ĉirkaŭvagi dumnokte.

Siaflanke, la kapitano elmontris plej aktivan energion. De supro ĝis malsupro, en ĉiuj anguloj, *La Provenco* estis inspektita. Oni traserĉis en ĉiujn kajutojn, senescepte, kun la forta preteksto, ke la objektoj estis kaŝitaj en ĉiu ajn loko, krom en la kajuto de la kulpulo.

– Oni ja finfine eltrovos ion, ĉu ne? demandis al mi F-ino Nelly. Kia ajn magiisto li estas, li ne povas nevidebligi diamantojn kaj perlojn.

– Jes ja, mi respondis, aŭ tiam necesus esplori la fundon de niaj ĉapeloj, la subŝtofon de niaj jakoj, kaj ĉion, kion ni surhavas.

Kaj montrante al ŝi mian Kodakon, unu 9 x 12 mm fotilon, per kiu mi senlace fotis ŝin en la plej diversaj teniĝoj:

– Nur en fotilo ne pli granda ol tiu, ĉu vi ne pensas, ke estus sufiĉan lokon por ĉiuj gemoj de S-ino Jerland? Oni ŝajnigas kliŝi kaj jen la afero plenumita.

– Sed tamen, laŭdire ne estas ŝtelisto kiu ne lasas malantaŭ si iun ajn indicon.

– Estas unu: Arseno Lupeno.

– Kial?

– Kial? Ĉar li pensas ne nur pri la plenumata ŝtelo, sed ankaŭ pri ĉiuj cirkonstancoj, kiuj povus lin denunci.

– Komence, vi estis pli fidema.

– Sed de tiam, mi vidis lin en plena ago.

– Kaj do, laŭ vi?

– Laŭ mi, tio estas tempoperdo.

Kaj efektive, la enketo donis nenian rezulton, aŭ almenaŭ, tiu, kiun ĝi donis, ne kongruis kun la ĝenerala klopodo: la poŝhorloĝo de la kapitano estis rabita.

Furioza, li pliigis la strebadon kaj ankoraŭ pli atente pririgardis Rozenon, kun kiu li plurfoje interparolis. La morgaŭon, ĉarma ironio, oni retrovis la poŝhorloĝon inter la falsaj kolumnoj de la vickapitano.

Ĉio ĉi aspektis kvazaŭ mirindaĵo, kaj ja rivelis la humuran manieron de Arseno Lupeno, ŝtelisto, prave, sed ankaŭ diletanto. Li laboris ŝate kaj alvokiĝe, ja, sed ankaŭ amuziĝe. Li donis impreson de sinjoro distriĝanta dum la teatraĵo kiun li ludigas, kaj kiu el la kuliso, plengorĝe ridas pri siaj spritaĵoj, kaj pri la situacioj kiujn li imagas.

Finfine, li estis siaspeca artisto, kaj kiam mi observis Rozenon, tenebran kaj persisteman, kaj mi pensis pri la duobla rolo kiun kredeble ludis tiu kurioza persono, mi ne povis paroli pri tio sen ia admiro.

Nu, la antaŭlastan nokton, la ferdekoficiro aŭdis ĝemojn el la plej malluma loko de la ferdeko. Li alproksimiĝis. Viro kuŝis, kun la kapo ĉirkaŭkovrita en dikega griza skarpo, la manartikojn kunligitajn per maldika ŝnureto.

Oni liberigis lin el liaj ligoj. Oni restarigis lin, flegadojn li ricevis.

Tiu viro, estis Rozeno.

Estis Rozeno, sturmita dum unu el siaj ekspedicioj, teren ĵetita kaj prirabita. Vizitkarto fiksita de pinglo sur lian vestaĵon portis tiujn vortojn:

“Arseno Lupeno dankeme akceptas la dek mil frankojn de S-ro Rozeno.”

Fakte, la ŝtelita biletujo enhavis dudek milfrankajn biletojn.

Kompreneble, oni akuzis la kompatindulon, ke li ŝajnigis tiun atakon kontraŭ si mem. Sed, krom tio, ke estis neeble sin ligi tiumaniere, estis demonstrite, ke la manskribo de la karto estis tute malsama ol la manskribo de Rozeno, kaj male, perfekte similis al tiu de Arseno Lupeno, tia, kian reproduktis malnova gazeto trovita surŝipe.

Tiel do, Rozeno ne plu estis Arseno Lupeno. Rozeno estis Rozeno, filo de Bordoza negocisto! Kaj la ĉeesto de Arseno Lupeno denove pruviĝis, kaj per kia timinda ago!

Ekestis teruro. Oni ne plu aŭdacis resti sola en sia kajuto, nek sin riski sola en tro izolitaj lokoj. Oni singarde grupiĝis inter homoj reciproke fidindaj. Kaj malgraŭe, instinkta malfido dividis la plej intimajn. Tio estas, ke la minaco ne venis el izolita individuo, kaj tial malpli danĝera. Arseno Lupeno nun estis... estis ĉiuj ajn. Nia ekzaltita imago atribuis al li miraklan kaj senliman povon. Oni supozis lin kapabla preni la plej neatenditajn maskovestojn, esti laŭvice la respektinda majoro Rawson aŭ la nobla markizo de Raverdan, aŭ eĉ, ĉar oni ne plu haltis je la akuzanta inicialo, eĉ tiu aŭ tiu persono konata de ĉiuj, havanta edzinon, infanojn, servistojn.

La unuaj sendrataj depeŝoj alportis neniun novaĵon. Almenaŭ, la kapitano neniel sciigis nin pri tio, kaj tia silento ne emis nin trankviligi.

Tial, la lasta tago ŝajnis senfina. Oni vivis atendante anksie malfeliĉaĵon. Tiun fojon, ne okazus ŝtelo, nek simpla agreso, okazus krimo, murdo. Oni ne imagis, ke Arseno Lupeno sin tenos je tiuj du bagatelaj ŝteletoj. Absoluta mastro de la ŝipo, kun la aŭtoritatoj reduktitaj al senpoveco, li nur volu, ĉio estis permesita al li, li disponis la havaĵojn kaj la ekzistojn.

Delicaj horoj por mi, mi konfesas, ĉar ili havigis al mi la fidon de S-ino Nelly. Impresite de tiom da okazaĵoj, kun naturo jam malkvieta, ŝi spontanee serĉis apud mi protekton, sekurecon, kiujn mi feliĉe ofertis al ŝi.

Iel, mi benis Arsenon Lupenon. Ĉu ne li, kiu nin kunigis? Ĉu ne li, danke al kiu mi rajtis fordoniĝi al la plej belaj revoj? Amaj revoj kaj malpli ĥimeraj revoj, kial ne tion konfesi? La Andréŝy estas bona puatua familio, sed ilia blazono estas iom senorigita, kaj ne ŝajnas al mi malinde je ĝentlemano pensi redoni al ĝia nomo la perditan brilon.

Kaj tiuj revoj, tion mi sentis, ne ofendis Nelly. Ŝiaj ridetantaj okuloj permesis al mi fari tion. La mildeco de ŝia voĉo diris al mi, ke mi esperu.

Kaj ĝis la lasta momento, kubutapogite al la ferdeka balustrado, ni restis unu apud la alia, dum la linio de la amerikaj marbordoj flosis antaŭ ni.

Oni estis interrompinta la traserĉadojn. Oni atendis. De la unuaj klasoj ĝis la interferdeko kie svarmis la emigrantoj, oni atendis la ekstreman momenton, kiam finfine klariĝus la nesolvebla enigmo. Kiu estis Arseno Lupeno? Sub kiel nomo, sub kiel masko sin kaŝis la fama Arseno Lupeno?

Kaj tiu ekstrema momento alvenis. Eĉ se mi vivu dum cent jaroj, mi ne forgesos el ĝi la plej malgrandan detalon.

– Kiel pala vi estas, F-ino Nelly, mi diris al mia kunulino, kiu sin apogis, tute ŝanceliĝanta, al mia brako.

– Kaj vi! ŝi respondis al mi. Ha! vi tiom ŝanĝiĝis!

– Pensu do! Tiu minuto estas pasiiga, kaj mi feliĉas travivi ĝin apud vi, F-ino Nelly. Ŝajnas al mi, ke rememoro pri vi postiros kelkfoje...

Anhelanta kaj febra, ŝi ne aŭskultis. La ponteto falis. Sed antaŭ ol ni povis transpasi ĝin, homoj aliris surŝipen, doganistoj, viroj en uniformo, poŝtistoj.

F-ino Nelly balbutis:

– Se oni konstatus, ke Arseno Lupeno forfuĝis dum la traveturado, tion ne surprizus min.

– Li eble preferis morton ol senhonorigon, kaj plonĝis en Atlantikon prefere ol esti arestita.

– Ne ridu, ŝi diris, agacite.

Subite, mi ektremis, kaj, ĉar ŝi pridemandis min, mi respondis al ŝi:

– Vidu tiun maljunan etulon starantan ĉe la ekstremaĵo de la ponteto...

– Ĉu kun pluvombrelo kaj olivoverda redingoto?

– Li estas Ganimardo.

– Ganimardo?

– Jes, la fama policisto, tiu kiu ĵuris, ke Arseno Lupeno estos arestita de li propramane. Ha! mi komprenas kial oni ne ricevis informojn el tiu flanko de la oceano. Ganimardo estis tie. Li ŝatas, ke neniu zorgas pri liaj aferetoj.

– Do Arseno Lupeno certe estos kaptita?

– Kiu scias? Laŭdire, Ganimardo ĉiam vidis lin nur ŝminkita kaj maskovestita. Krom se li konas lian kaŝnomon...

– Ha! ŝi diris, kun tia iom kruela scivolo de virino, se mi povus spekti la areston!

– Ni paciencu. Certe Arseno Lupeno jam rimarkis la ĉeeston de sia malamiko. Li preferos eliri inter la lastaj, kiam la okulo de la maljunulo estos laca.

La elŝipiĝo komenciĝis. Apogite sur sia pluvombrelo, kun indiferenta mieno, Ganimardo ne ŝajnis atenti la homamason, kiu sin premis inter la du balustradoj. Mi notis ke ŝipoficiro, postenanta malantaŭ li, fojfoje informis lin.

La markizo de Raverdan, la majoro Rawson, la italo Rivolta defilis, kaj aliaj, multaj aliaj... Kaj mi ekvidis Rozenon, kiu alproksimiĝis.

Kompatinda Rozeno! Li ŝajne ankoraŭ ne resaniĝis de siaj misaventuroj!

– Eble estas li malgraŭe, diris al mi F-ino Nelly... Kion vi pensas pri tio?

– Mi pensas, ke estus ja interese havi sur sama fotografaĵo Ganimardon kaj Rozenon. Prenu do mian fotilon, mi estas tiom ŝargita.

Mi ĝin donis al ŝi, sed tro malfrue por ke ŝi uzu ĝin. Rozeno estis pasanta. La oficiro sin klinis al la orelo de Ganimardo, tiu ĉi iomete ŝultrolevis, kaj Rozeno pasis.

Sed ĉi-okaze, Dio mia, kiu estis Arseno Lupeno?

– Jes, ŝi diris laŭte, kiu li estas?

Restis nur dudeko da homoj. Ŝi observis ilin laŭvice kun la konfuza timo, ke li ne enestis tiun dudekon.

Mi diris al ŝi:

– Ni ne povas atendi pli longe.

Ŝi antaŭeniris. Mi sekvis ŝin. Sed ni ne faris dek paŝojn, kiam Ganimardo baris al ni la vojon.

– Nu, kio? mi ekkriis.

– Momenton, sinjoro, kiu urĝas vin?

– Mi akompanas la fraŭlinon.

– Momenton, li ripetis per pli ordona voĉo.

Li profunde rigardegis min, kaj poste li diris al mi, vizaĝalvizaĝe:

– Arseno Lupeno, ĉu ne?

Mi ekridis.

– Ne, Bernard d’Andrésy, tutsimple.

– Bernard d’Andrésy mortis antaŭ tri jaroj en Makedonio.

– Se Bernard d’Andrésy estus mortinta, mi ne plu estus ĉimonda. Kaj ne estas tiel. Jen miaj legitimaĵoj.

– Tiuj estas liaj. Kiel vi akiris ilin, tion mi plezure klarigos al vi.

– Sed vi estas freneza! Arseno Lupeno enŝipiĝis sub la nomo R.

– Jes, ankoraŭ spritaĵo el vi, malĝusta vojo sur kiun vi enkondukis ilin, tie for! Ha! vi estas bele forta, ulaĉo mia. Sed ĉi-foje, la fortune deturnis sin de vi. Ek, Lupeno, sciu lojale perdi.

Mi hezitis sekundon. Per abrupta ekbato li frapis min sur la dekstran antaŭbrakon. Mi ekkriis pro doloro. Li estis frapinta ĉe la ankoraŭ ne cikatriĝintan vundon, kiun indikis la telegramo.

Nu, necesis rezignacii. Mi turnis min al F-ino Nelly. Ŝi aŭskultis, livida, ŝanceliĝanta.

Ŝia rigardo renkontis la mian, kaj poste malleviĝis sur la Kodakon, kiun mi transdonis al ŝi. Ŝi faris abruptan geston, kaj mi havis la impreson, mi havis la certecon, ke ŝi subite komprenas. Jes, estis tie, inter la maldikaj vandoj el nigra grajnoledo, ene de la objekteto, kiun mi antaŭzorge deponis en ŝiajn manojn antaŭ ol Ganimardo arestos min, ja estis tie, ke troviĝas la dudek mil frankoj de Rozeno, la perloj kaj la diamantoj de S-ino Jerland.

Ha! tion mi ĵuras, je tiu solena momento, dum Ganimardo kaj liaj du akolitoj ĉirkaŭis min, ĉio indiferentis al mi, mia aresto, la malamikeco de la homoj, ĉio, krom tio ĉi: la decido, kiun baldaŭ faros F-ino Nelly, pri kion mi konfidis al ŝi.

Ke oni havus kontraŭ mi tiun konkretan kaj decidan pruvon, mi eĉ ne pensis tion timi, sed ĉu tiun pruvon F-ino Nelly decidus liveri?

Ĉu mi estus perfidita de ŝi? perdita de ŝi? Ĉu ŝi agus kiel malamiko, kiu ne pardonas, aŭ kiel virino kiu memoras kaj kies malestimo mildiĝas per iomete da indulgo, iomete da nevola simpatio?

Ŝi preterpasis min. Mi salutis ŝin tre respekte, senvorte. Miksate kun la aliaj vojaĝantoj, ŝi direktiĝis al la ponteto, mian Kodakon enmane.

Kredeble, mi pensis, ŝi ne aŭdacas publike. Post unu horo, post momento, ŝi donos ĝin.

Sed alveninte meze de la ponteto, per ŝajnige mallerta movo, ŝi lasis ĝin fali en la akvon, inter la kaja muro kaj la ŝipa flanko.

Poste, mi vidis ŝin malproksimiĝi.

Ŝia bela silueto perdiĝis en la homamaso, denove aperis al mi kaj malaperis. Tio estis finita, porĉiame finita.

Momenton, mi restis senmova, samtempe malgaja kaj penetrita de milda kortuŝiĝo, kaj tiam, mi suspiris, je la mirego de Ganimardo:

– Estas tamen domaĝe, ne esti honesta viro...

Jen kiel, dum vintra vespero, Arseno Lupeno rakontis al mi la historion pri sia arestado. La hazardo de okazaĵoj, kies rakonton mi verkos iun tagon, ligis inter ni rilatojn... mi dirus amikecajn? Jes, mi ja esperas, ke Arseno Lupeno honoras min per ia amikeco, kaj ke pro amikeco li foje alvenas ĉe min neatendite, kunportante, en la silenton de mia laborkabineto, sian junecan gajon, la disradiadon de sia arda vivo, sian belan humoron de viro por kiu destino nur havas favorojn kaj ridetojn.

Lian portreton? Kiel mi povus ĝin fari? Dudek fojojn mi vidis Arsenon Lupenon, kaj dudek fojojn malsama estaĵo aperis al mi... aŭ pliĝuste, la sama estaĵo, kies samkvantajn distorditajn bildojn dudek speguloj estus reflektintaj al mi, ĉiun kun siaspecaj okuloj, sia aparta visaĝoformo, sia propra gesto, sia silueto kaj karaktero.

– Mi mem, li diris al mi, ne plu klare scias, kiu mi estas. En spegulo, mi ne plu rekonas min.

Ja ŝerco, kaj paradokso, sed vero por tiuj, kiuj renkontas lin kaj kiuj ne scias liajn senfinajn kapablojn, lian paciencon, lian arton pri ŝminkado, lian mirindegan talenton por transformi eĉ

la proporciojn de sia visaĝo, kaj aliigi la rilatojn de siaj trajtoj inter ili.

– Kial, li diris ankaŭ, mi havus difinitan aspekton? Kial ne eviti tiun danĝeron de ĉiam sama personeco? Miaj agoj sufiĉe almontras min.

Kaj li aldonis, kun iom da orgojlo:

– Des pli bone se oni neniam povas diri tutcerte: “Jen Arseno Lupeno”. La ĉefa afero estas, ke oni diras sen timo pro eraro: “Arseno Lupeno faris tion”.

Kelkajn el tiuj agoj, kelkajn el tiuj aventuroj mi provas rekomponi, laŭ la konfidencoj, kiujn li favore malkaŝis al mi, dum iuj vintraj vesperoj, en la silento de mia laborkabineto...

Arseno Lupeno en malliberejo

Ne ekzistas inda turisto, kiu ne konas la bordojn de Sejno, kaj kiu ne rimarkis, irante de la ruinoj de Jumièges al la ruinoj de Saint-Wandrille, la strangan feŭdan kasteleton Malaquis, tiel fiere postenantan sur sia roko, plenmeze de rivero. Arkaĵo de ponto ligas ĝin al la ŝoseo. La bazo de ĝiaj malhelaj turetoj konfuziĝas kun la granito kiu subportas ĝin, grandega bloko defalinta oni ne scias el kiu monto kaj tien ĵetita de ia mirinda konvulsio. Ĉirkaŭe, la kvietaj akvo de la granda rivero ludas inter la kanoj, kaj motaciloj tremas sur la malseketa kresto de la ŝtonetoj.

La historio de Malaquis estas kruda kiel ĝia nomo, aspra kiel ĝia silueto. Nur estis bataloj, sieĝoj, sturmoj, priraboj kaj masakroj. Dum la vesperoj de la lando Caux, oni elvokas tremetante la tieajn krimojn. Oni rakontas misterajn legendojn. Oni parolas pri la fama subteraĵo, kiu iam alkondukis al la abatejo de Jumièges kaj al la kasteleteto de Agnès Sorel, la reĝamantino de Karlo la 7-a.

En tiu malnova rifuĝejo de herooj kaj rabistoj, loĝas la barono Natano Kahorno, la barono Satano, kiel oni lin iam nomis en la Borso, kie li riĉiĝis iomete tro abrupte. La senjoroj de Malaquis, ruinigite, devis vendi al li, kontraŭ bagatela prezo, la domon de siaj prauloj. Tie li instalas siajn admirindajn kolektojn da mebloj kaj pentraĵoj, da fajencaĵoj kaj skulptitaj lignaĵoj. Li vivas sola, kun tri maljunaj servistoj. Neniu tien eniĝas. Neniu iam kontemplan en la dekoracio de tiuj antikvaj

ĉambroj la tri Rubens, kiujn li posedas, liajn du Watteau, lian katedron de Jean Goujon, kaj tiom da aliaj mirindaĵoj elŝiritaj per monbiletoj al la plej riĉaj kutimantoj de la publikaj vendoj.

La barono Satano timas. Li timas ne pri li, sed pri la trezoroj amasigitaj kun ege obstina pasio kaj la sagaceco de amatoro, kiun la plej ruzaj komercistoj ne povus erarigi. Li amas ilin. Li akre amas ilin, kiel avarulo; ĵaluze, kiel amanto.

Ĉiutage, je sunsubiro, la kvar ferkirasaj pordoj, kiuj komandas ambaŭ ekstremaĵojn de la ponto kaj la enirejon de la honora korto, estas fermitaj kaj riglitaj. Pro la plej eta tremo, elektraĵ sonoriloj vibras en la silento. Ĉe la Sejna flanko, nenio timindas: la roko tie krute staras.

Tamen, dum septembra vendredo, la poŝtisto alvenis kiel kutime antaŭ la ponto. Kaj, laŭ la ĉiutaga regulo, la barono mem malfermetis la pezan klapeton.

Li pririgardis la viron tiel detale, kiel se li ne jam konus, de jaroj, tiun bonan ĝojan vizaĝon kaj tiujn mokajn okulojn de kamparano, kaj la viro diris ridante:

– Plu estas mi, sinjoro barono. Mi ne estas aliulo, kiu estus preninta mian bluzon kaj mian kasketon.

– Kiu scias? flustris Kahorno.

La poŝtisto transdonis al li stakon da ĵurnaloj. Poste li aldonis:

– Kaj nun, sinjoro barono, estas io nova.

– Ĉu io nova?

– Letero... kaj plie, registrita.

Izolita, sen iu amiko kaj iu, kiu interesiĝis pri li, la barono neniam ricevis leteron, kaj tio tuj ŝajnis al li malbonaŭgura okazaĵo, pri kiu oni maltrankviliĝu. Kiu estis tiu mistera korespondanto, kiu venis ĝeni lin en lia retiriĝejo?

– Vi devas subskribi, sinjoro barono.

Li subskribis grumblante. Poste li prenis la leteron, atendis ke la poŝtisto malaperos ĉe la vojturno, kaj iomete paŝinte tien kaj reen, li apogis sin kontraŭ la ponta parapeto kaj ŝiris la koverton. Ĝi enhavis folion da kvadrata papero kun tiu manskribita paĝokapo: Malliberejo de La Sano, Parizo. Li rigardis la subskribon: Arseno Lupeno. Konsternite, li legis:

“Sinjoro barono,

Estas, en la galerio kiu kunligas viajn du salonojn, pentraĵo de Philippe de Champaigne de bonega fasono, kaj kiu treege plaĉas al mi. Viaj Rubens ankaŭ aspektas laŭ mia gusto, samkiel via plej malgranda Watteau. En la dekstra salono, mi notas la kredencon en stilo Ludoviko la 13-a, la tapiŝojn de Beauvais, la Empiran tableton subskribitan de Jacob kaj la Renesanco-stilan kofron. En tiu maldekstre, la tutan vitrinon de juveloj kaj miniaturoj.

Ĉi-foje, mi kontentiĝos per tiuj objektoj, kius estos, mi kredas, facile forvendeblaj. Mi do petas al vi, ke vi konvene enpakigu ilin, kaj ke vi ekspedu ilin al mia nomo (pagita transporto), en la stacidomo de Les Batignolles, antaŭ ok tagoj... se ne, mi mem procedigos ilian translokadon, dum la

nokto de merkredo la 27-a al jaŭdo la 28-a de septembro. Kaj kompreneble, mi ne kontentiĝos per la ĉi-supre indikitaj objektoj.

Bonvolu pardoni la etan estigitan ĝenon, kaj akcepti la esprimon de miaj sentoj de respektoplena konsidero.

Arseno Lupeno.

PS: Nepre ne sendu al mi la plej grandan Watteau. Kvankam vi pagis por ĝi tridek mil frankojn en la Aŭkciodomo, ĝi estas nur kopio, ĉar la originalo estis bruligita de Barras, dum la Direktorio, orgian vesperon. Konsultu la Originalajn Memoraĵojn de Garat.

Mi ankaŭ ne deziras la kastelaninan ornamaĵon en la stilo de Ludoviko la 15-a, kies aŭtentikeco ŝajnas al mi dubinda.”

Tiu letero forte emociis la baronon Kahorno. Subskribita de iu alia, ĝi jam konsiderinde estus alarminta lin, sed subskribita de Arseno Lupeno!

Kiel diligenta leganto de ĵurnaloj, informita pri ĉio, kio okazis en la mondo rilate ŝteladon kaj krimadon, li ĉion sciis pri la heroaĵoj de la infera ŝtelisto. Certe, li sciis ke Lupeno, arestita en Usono de sia malamiko Ganimardo, ja estas enkarcerigita, ke oni pretigas lian proceson – kun kia peno! Sed li ankaŭ sciis, ke oni ĉion povas atendi de li. Cetere, tiu ekzakta kono pri la kastelo, pri la aranĝo de la pentraĵoj kaj la mebloj, estis plej timinda indico. Kiu informis lin pri aferoj kiujn neniu vidis?

La barono rigardis supren kaj kontemplis la minacan silueton de Malaquis, ĝian krutan piedestalon, la profundan

akvon kiu ĉirkaŭas ĝin, kaj ŝultrolevis. Ne, tutcerte, estis nenio danĝero. Neniu en la mondo povus penetri ĝis la neprofanebla sanktejo de liaj kolektoj.

Neniu, jes, sed ĉu Arseno Lupeno? Por Arseno Lupeno, ĉu ekzistas pordoj, levpontoj, muregoj? Al kio utilas la plej bone imagitaj obstakloj, la plej lertaj antaŭzorgoj, se Arseno Lupeno decidis atingi la celon?

Tuj de la vespero, li skribis al la respublika prokuroro de Rueno. Li sendis la minacan leteron kaj postulis helpon kaj protekton.

La respondo alvenis post nelonge: la nomato Arseno Lupeno estas nun malliberigita en La Sano, atente observate, kaj ne povas skribi; la leteron do verkis nur mistifikanto. Ĉio pruvis tion, la logiko kaj la prudento, kiel la realeco de la faktoj. Tamen, kaj pro troa singardo, oni nomumis ekspertiziston por ekzameni la manskribon, kaj la spertulo deklaris, ke *malgraŭ iuj analogecoj*, tiu manskribo ne estis tiu de la kaptito.

“Malgraŭ iuj analogecoj”, la barono memoris nur tiujn tri terurajn vortojn, en kiuj li vidis la konfeson de dubo, kiu sole estus sufiĉa por ke la justico intervenu. Liaj timoj ekflamis. Li senĉese relegis la leteron. “*Mi mem procedigos ilian translokadon.*” Kaj tiu preciza dato: la nokton de merkredo la 27-a al jaŭdo la 28-a de septembro!...

Suspektema kaj silentema, li ne aŭdacis sin konfidi al siaj servistoj, kies sindono ne ŝajnis al li absolute fidinda. Tamen, por la unua fojo de post jaroj, li sentis la bezonon paroli, peti konsilon. Forlasita de la justico de sia lando, li ne plu esperis sin defendi per siaj propraj rimedoj, kaj li estis irona ĝis Parizo

por petegi la helpon de iu malnova policisto.

Du tagoj pasis. La trian, legante siajn ĵurnalojn, li ektremis pro ĝojo. *Le Réveil de Caudebec* publikigis tiun artikoleon:

“Ni havas la plezuron gastigi en niaj muroj, de baldaŭ tri semajnoj, la ĉefinspektoron Ganimardo, unu el la veteranoj de la Sekureca servo. S-ro Ganimardo, al kiu la aresto de Arseno Lupeno, lia lasta heroaĵo, havigis eŭropan reputacion, ripozas de siaj longaj lacecoj, fiŝhokante gobion kaj alburnon.”

Ganimardo! Tia ja estis la helpanto, kiun serĉis la barono Kahorno! Kiu pli bone ol la ruza kaj pacienca Ganimardo sciis malsukcesigi la projektojn de Lupeno?

La barono ne hezitis. Ses kilometroj apartigas la kastelon disde la eta urbo Caudebec. Li transpasis ilin gaje, kiel viro kiun espero de savo ekscitegas.

Post pluraj malsukcesaj provoj por scii la adreson de la ĉefa inspektoro, li direktiĝis al la oficejoj de Le Réveil, situantaj meze de la kajo. Li tie trovis la redaktinton de la artikolo, kiu, proksimiĝante al la fenestro, ekkriis:

– Ĉu Ganimardon? Vi certe renkontos lin laŭ la kajo, kun hokfaden enmane. Tie ni interkonatiĝis, kaj mi legis hazarde lian nomon gravuritan sur lia fiŝkano. Vidu, jen li, la maljunulo tie, sub la arboj de la promenejo.

– Ĉu kun redingoto kaj pajla ĉapelo?

– Ĝuste! Ha! strangulo ne babilema kaj relative kruda.

Kvin minutojn poste, la barono aliris la faman Ganimardon, prezentis sin kaj provis ekkonversacii. Ne sukcesinte, li malkaŝe ekparolis pri la temo kaj eksponis sian kazon.

La alia aŭskultis, senmova, ne deturnante la okulojn de la fiŝo kiun li gvatis, poste li rigardis al li, observis lin de piedoj ĝis kapo kun mieno de profunda kompato, kaj eldiris:

– Sinjoro, estas nekutime averti la homojn, kiujn oni volas priŝteli. Arseno Lupeno, precipe, ne faras tiajn mallertaĵojn.

– Tamen...

– Sinjoro, se mi havus ajnan dubon, ja kredu ke la plezuro ankoraŭ enmeti tiun karan Lupenon, venkus ĉiun alian konsideron. Malfeliĉe, tiu junulo estas enkarcerigita.

– Se li eskapas?...

– Oni ne eskapas el La Sano.

– Sed li...

– Li ne pli ol alia.

– Tamen...

– Nu, se li eskapas, des pli bone, mi rekaptos lin. Atendante, dormu trankvile, kaj ne fortimigu tiun alburnon pli longe.

La konversacio estis finita. La barono reiris hejmen, iom trankviligite de la senzorgeco de Ganimardo. Li kontrolis la serurojn, spionis la servistojn, kaj kvardek ok horoj pasis, dum kiuj li preskaŭ sukcesis persvadi sin ke, sume, liaj timoj estas ĥimeraj. Ne, finfine, kiel diris Ganimardo, oni ne avertas la homojn, kiujn oni volas priŝteli.

La dato alproksimiĝis. Mardon matene, la tagon antaŭ la 27-a, nenio aparta. Sed je la tria, bubo sonorigis. Li alportis depeŝon.

“Neniu pakaĵo en stacidomo Batignolles. Ĉion pretigu por morgaŭ vespere. Arseno.”

Denove, ekestis panikiĝo, tiel ke li demandis al si ĉu li ne cedus al la postuloj de Arseno Lupeno.

Li kuris al Caudebec. Ganimardo fiŝkaptis je la sama loko, sidante sur faldebla seĝo. Senvorte, li antaŭmetis al li la telegramon.

– Kaj poste? diris la inspektoro.

– Poste? sed tio estas por morgaŭ!

– Kio?

– La rompoŝtelo! la prirabo de miaj kolektoj!

Ganimardo delasis sian fiŝkanon, turnis sin al li, kaj, kun ambaŭ brakoj krucitaj ĉebruste, ekkris per senpacienca tono:

– Ha, tio! Ĉu vi imagas, ke mi okupiĝos pri tiel stulta historio?!

– Kiun monkompenson vi petas por pasigi al la kastelo la nokton de la 27-a al la 28-a de septembro?

– Eĉ ne unu groŝon, lasu min trankvila.

– Fiksu vian prezon, mi estas riĉa, ekstreme riĉa.

La abrupteco de la propono konsternis Ganimardon, kiu daŭrigis, pli kvieta:

– Mi estas tie en ferioj kaj mi ne rajtas miksi min en...

– Neniu tion scios. Mi min devontigas silenti, kio ajn okazos.

– Ho! Nenio okazos.

– Nu, ĉu tri mil frankoj sufiĉos?

La inspektoro ensorbis en sian nazon spiron de tabako, pripensis, kaj rezignis:

– Konsentite. Tamen, mi devas lojale deklari al vi, ke tio ja estas mona malŝparego.

– Tio egalas al mi.

– Tiukaze... Kaj poste, finfine, oni neniam scias, kun tiu diabla Lupeno! Li kredeble havas sub sia komando tutan bandon... Ĉu vi certas pri viaj servistoj?

– Nu...

– Tiam, ni ne kalkulu je ili. Mi tuj avertos per depeŝo du ulegojn el miaj amikoj, kiuj estos pli sekuraj... Kaj nun, forpafiĝu, oni ne vidu nin kune. Ĝis morgaŭ, ĉirkaŭ la naŭa.

La morgaŭon, la daton fiksitan de Arseno Lupeno, la barono Kahorno dekroĉis sian panoplion, frotpurigis siajn armilojn, kaj promenis en la ĉirkaŭaĵo de Malaquis. Nenio suspektinda trafis lin.

La vesperon, je la oka kaj duono, li eksigis la servistojn. Ili loĝis en alo fronte al la strato, sed iom distance, kaj fine de la kastelo. Iĝinte sola, li mallaŭte malfermis la kvar pordojn. Post momento, li aŭdis paŝojn, kiuj alproksimiĝis.

Ganimardo prezentis siajn du helpantojn, grandajn fortikulojn kun virbova kolo kaj potencaj manoj, poste petis kelkajn klarigojn. Konstatinte la lokajn aranĝojn, li zorge fermis kaj barikadis ĉiujn vojojn, per kiuj oni povis eniri la minacatajn ĉambrojn. Li ekzamenis la murojn, levis la tapiŝojn, kaj fine li postenigis siajn agentojn en la centra galerio.

– Nenian stultaĵon, ĉu? Ni ne estas ĉi tie por dormi. Je la plej eta alarmo, malfermu la kortajn fenestrojn kaj voku min. Ankaŭ atentu la riveran flankon. Dek metroj da kruta klifo ne timigas tiajn diablojn.

Li enfermis ilin, kunprenis la ŝlosilojn, kaj diris al la barono:

– Kaj nun, al nia posteno.

Li elektis, por tranokti, etan ĉambron elkonstruitan en la diko de la remparzonaj muregoj, inter la du ĉefaj pordoj, kaj kiu estis, iam, la kamero de la vaĉisto. Luketo rigardis al la ponto, alia al la korto. En angulo oni ekvidis kvazaŭ aperturon de puto.

– Vi ja diris al mi, sinjoro barono, ke tiu puto estas la ununura enirejo de la subteraĵoj, kaj ke, laŭ homa memoro, ĝi estas ŝtopita, ĉu?

– Jes.

– Do, krom se ekzistas alia enirvojo nekonata de ĉiuj, escepte de Arseno Lupeno, kio ŝajnas iom problema, ni estas trankvilaj.

Li vicigis tri seĝojn, etendis sin komforte, ekbruligis sian pipon kaj suspiris:

– Vere, sinjoro barono, necesas ke mi ege deziru aldoni etaĝon al la dometo kie mi devas fini mian vivon, por akcepti tiel elementan laboron. Mi rakontos la historion al la amiko Lupeno, li ridos ĝis tordiĝo.

La barono ne ridis. Atente aŭskultante, li pridemandis la silenton kun kreskanta maltrankvilo. Tempaltempe li kliniĝis super la puton kaj enĵetis anksian okulon en la faŭkantan truon.

La dek-unua, noktomezo, la unua sonoris.

Subite, li ekkaptis la brakon de Ganimardo, kiu vekigis eksalte.

– Ĉu vi aŭdas?

– Jes.

– Kio estas tio?

– Ronkas mi.

– Ne, aŭskultu...

– Ha! perfekte, tio estas aŭtokorno.

– Nu?

– Nu! malmulte probablas, ke Lupeno uzas aŭtomobilon kiel ramon por malkonstrui vian kastelon. Tial, sinjoro barono, se mi estus vi, mi dormus... kiel mi tuj havos la honoron denove fari. Bonan vesperon.

Tio estis la sola alarmo. Ganimardo povis daŭrigi sian interrompitan dormon, kaj la barono nur aŭdis lian sonoratan kaj regulan ronkadon.

Ĉe tagiĝo, ili eliris el sia ĉelo. Granda serena paco, la matena paco rande de freŝa akvo, envolvis la kastelon. Kahorno ĝojradia, kaj Ganimardo plu pacema, supreniris la ŝtuparon. Neniu bruo. Neniu suspektinda.

– Kion mi diris al vi, sinjoro barono? Finfine, mi ne estus devinta akcepti... Mi hontas...

Li prenis la ŝlosilojn kaj eniris la galerion.

Sur du seĝoj, kurbiĝante, kun pendantaj brakoj, la du agentoj dormis.

– Fulmotondro! graŭlis la inspektoro.

Sammomente, la barono eligis krion:

– La pentraĵoj!... la kredenco!...

Li balbutis, sufokiĝis, manon etenditan al la malplenaj lokoj, al la nudigitaj muroj, kie pintis la najloj, kie pendis la senutilaj ŝnuroj. La Watteau, malaperinta! La Rubens, formetitaj! La tapiŝoj, malkroĉitaj! La vitrinoj, senigitaj je siaj juveloj!

– Kaj miaj kandelabroj en stilo Ludoviko la 16-a!... kaj la Regento-stila kandelingo, kaj mia Virgulino de la 12-a jarcento!...

Li kuris de unu loko al alia, hororigite, malesperinte. Li rememoris la aĉetajn prezojn, adiciis la suferitajn malprofitojn, akumulis ciferojn, ĉio ĉi senorde, en malklaraj vortoj, en nefinitaj frazoj. Li stamfis, konvulsiis, furioza pro kolero kaj doloro. Li ŝajnis kvazaŭ ruinigita viro, kiu nur bruligu al si la cerbon.

Se io povus konsoli lin, tio estus vidi la stuporon de Ganimardo. Male al la barono, la inspektoro, siaflanke, ne moviĝis. Li ŝajnis ŝtoniĝinta, kaj per neklara rigardo, li ekzamenis la aferojn. La fenestroj? fermitaj. La seruroj de la pordoj? nedamaĝitaj. Neniu breĉo ĉeplafone. Neniu truo ĉeplanke. La ordo estis perfekta. Ĉio tio kredeble okazis metodeme, laŭ senindulga kaj logika plano.

– Arseno Lupeno... Arseno Lupeno, li flustris, konsternite.

Subite, li eksaltis sur la du agentojn, kvazaŭ kolero fine skuus lin, kaj li furioze puŝis ilin kaj insultis ilin. Ili ne vekiĝis!

– Diable, li diris, ĉu hazarde...?

Li kliniĝis super ilin, kaj, laŭvice, atente observis ilin: ili dormis, sed nenature.

Li diris al la barono:

– Oni endormigis ilin.

– Sed kiu?

– He! li, evidente!... aŭ lia bando, sed regita de li. Tio estas ago laŭ lia maniero. Lia distingilo ja ĉeestas.

– Tiukaze, mi estas senespera, estas nenio farebla.

– Nenio fareblas.

– Sed tio estas abomena, tio estas monstra.

– Metu plendon.

– Kiautile?

– Damne! provu malgraŭe... La justico havas rimedojn...

– La justico! sed vi mem ja konstatas... Jen, ĉi-momente, vi povus serĉi indicon, malkovri ion, vi eĉ ne moviĝas.

– Malkovri ion, kun Arseno Lupeno! Sed, kara sinjoro mia, Arseno Lupeno neniam lasas ion ajn malantaŭ si! Ne estas hazardo kun Arseno Lupeno! Nun mi demandas al mi, ĉu ne intence li iĝis arestita de mi, en Usono!

– Tiam mi rezignu pri miaj pentraĵoj, pri ĉio! Sed la perlojn de mia kolekto li forŝtelis de mi. Mi donus riĉegaĵon por ilin retrovi. Se oni nenion povas kontraŭ li, li diru sian prezon!

Ganimardo fikse rigardis lin.

– Saĝa parolo, tio estas. Ĉu vi ne retiras ĝin?

– Ne, ne, ne. Sed kial?

– Nur ideo kiun mi havas.

– Kiun ideon?

– Ni reparolos pri tio se la enketo nenion konkludos... Tamen, eĉ ne unu vorton pri mi, se vi volas, ke mi sukcesu.

Li aldonis tra la dentoj:

– Kaj poste, verdire, mi ne indas fanfaroni.

La du agentoj iom post iom rekonsciiĝis, kun tiu hebeta mieno de tiuj, kiuj eliras hipnotan dormon. Ili malfermis mirajn

okulojn, ili provis kompreni. Kiam Ganimardo pridemandis ilin, ili ne memoris ion ajn.

– Tamen, vi verŝajne vidis iun, ĉu?

– Ne.

– Rememoru!

– Ne, ne.

– Kaj ĉu vi ne trinkis?

Ili pripensis, kaj unu el ili respondis:

– Jes, mi trinkis iom da akvo.

– Ĉu akvon el tiu karafo?

– Jes.

– Ankaŭ mi, deklaris la dua.

Ganimardo flaris ĝin, gustumis ĝin. Ĝi havis nenian apartan guston, nenian odoron.

– Nu, li diris, ni malŝparas nian tempon. Ne en kvin minutoj oni solvas la problemojn starigitajn de Arseno Lupeno. Sed fulmotondro, mi ja ĵuras, ke mi rekaptos lin. Li gajnas la duan ludpartion. La revanĉo estos por mi!

La saman tagon, plendo pro pligravigita ŝtelo estis depoziciita de la barono Kahorno, kontraŭ Arseno Lupeno, enkarcerigita en La Sano!

Tiun plendon la barono ofte bedaŭris, kiam li vidis la kastelon Malaquis liverita al la ĝendarmoj, al la prokuroro, al la enketa juĝisto, al la ĵurnalistoj, al ĉiuj scivolemuloj, kiuj enŝoviĝas ĉien kie ili ne devus esti.

La afero jam pasiigis la publikopinion. Ĝi okazis en tiel neordinaraj cirkonstancoj, la nomo de Arseno Lupeno tiom ekscitis la imagojn, ke la plej fantaziaj historioj plenigis la ĵurnalajn kolumnojn kaj estis kredataj de la publiko.

Sed la una letero de Arseno Lupeno, kiun publikigis *Écho de France* (kaj neniu iam sciis, kiu sciigis ĝian tekston), tiu letero, per kiu la barono Kahorno estis impertinente avertita pri kio minacis lin, kaŭzis konsiderindan emocion. Fabelaj klarigoj tuj estis proponitaj. Oni rememorigis la ekziston de la famaj subteraĵoj. Kaj la prokuroraro, influite, petis pliajn esplorojn tiudirekten.

Oni zorge traserĉis la tutan kastelon. Oni inspektis ĉiun ŝtonon. Oni esploris la lignaĵojn kaj la kamenojn, la kadrojn de la speguloj kaj la plafonajn trabojn. Ĉe torĉobrililo oni ekzamenis la grandegajn kelojn, kien la senjoroj de Malaquis iam amasigis siajn municiojn kaj proviantojn. Oni sondis la internaĵon de la roko. Tio estis vana. Oni ne malkovri eĉ la plej etan vestiĝon de subteraĵo. Tute ne ekzistis sekreta pasejo.

En ordo, oni respondis ĉiuflanke, sed mebloj kaj pentraĵoj ne forsvenas kiel fantomoj. Ili foriĝas tra pordojn kaj fenestrojn, kaj la homoj, kiuj ilin ekkaptas, eniĝas kaj eliĝas ankaŭ tra pordojn kaj fenestrojn. Kiaj estas tiuj homoj? Kiel ili eniris? Kaj kiel ili foriris?

La prokuroraro de Rueno, konvinkite pri sia senpovo, petis la helpon de parizaj agentoj. S-ro Dudouis, la Sekureca estro, sendis siajn plej bonajn detektivojn el la speciala brigado. Li mem pasigis kvardek-ok-horan restadon en Malaquis. Li ne pli sukcesis.

Tiam li alvokis la inspektoron Ganimardo, kies servojn li tiel ofte aprezis.

Ganimardo silente aŭskultis la instrukciojn de sia superulo, poste, kapskuante, li eldiris:

– Mi kredas, ke ni vojeraras obstine traserçante la kastelon. La solvo estas aliloke.

– Kaj kie do?

– Ĉe Arseno Lupeno.

– Ĉe Arseno Lupeno! Tion supozi estas agnoski lian intervenon.

– Tion mi koncedas. Eĉ pli, mi konsideras ĝin certa.

– Nu, Ganimardo, estas stulte. Arseno Lupeno estas en malliberejo.

– Arseno Lupeno estas en malliberejo, prave. Li estas pririgardita, mi konsentas. Sed se li havus katenojn ĉe la piedoj, ŝnurojn ĉe la manartikoj kaj buŝoŝtopilon surbuŝe, mi ne ŝanĝus mian opinion.

– Kaj kial tiu obstino?

– Ĉar nur Arseno Lupeno kapablas kombini tiel ampleksan maĥinacion, kaj kombini ĝin tiel, ke ĝi sukcesu... kiel ĝi sukcesis.

– Nur vortoj, Ganimardo!

– Kiuj estas realaĵoj. Sed jen, oni ne serĉu subteraĵon, ŝtonojn turniĝantajn sur pivoto, kaj aliajn stultaĵojn tiajn. Nia ulo ne uzas rimedojn tiel eksmodajn. Li estas nuntempa, aŭ pliĝuste morgaŭa.

– Kaj kion vi konkludas?

– Mi konkludas ja petante de vi la permeson pasigi unu horon kun li.

– En lia karcero?

– Jes. Revenante el Usono ni bonege interrilitis, dum la traveturado, kaj mi eĉ dirus, ke li havas ian simpatian por tiu, kiu scipovis aresti lin. Se li povas informi min sen kompromiti sin, li ne hezitos evitigi al mi senutilan vojaĝon.

Estis iom pli ol tagmezo, kiam Ganimardo estis enkondukita en la ĉelon de Arseno Lupeno. Tiu ĉi, sternite sur sia lito, levis la kapon kaj ekkris pro ĝojo.

– Ha! Tio ja estas vera surprizo. Tiu kara Ganimardo, tie!

– Li mem.

– Multajn aferojn mi deziris en la retiriĝejo, kiun mi elektis... sed neniun pli pasie ol gastigi vin.

– Tro afabla.

– Ne, ne, mi esprimas pri vi la plej altan estimon.

– Pri tio mi fieras.

– Mi ĉiam asertis tion: Ganimardo estas nia plej bona detektivo. Li preskaŭ egalas – vi vidas, ke mi estas sincera – li preskaŭ egalas Ŝerlokono Holmsono. Sed, verdire, mi bedaŭras, ke mi povas proponi al vi nur tiun ŝtupareton. Kaj eĉ ne unu refreŝigaĵon! neniun glason da biero! Pardonu min, mi estas tie nur provizore.

Ganimardo sidiĝis ridetante, kaj la malliberulo daŭrigis, ĝoja pro parolado:

– Dio mia, mi tiel feliĉas revidi la vizaĝon de honestulo! Min tendas ĉiuj tiuj spionaj kaj stukaĉaj kapoj, kiuj po dek fojojn tage inspektas miajn poŝojn kaj mian modestan ĉelon, por certiĝi, ĉu mi ne preparas eskapon. Diable, kiom amas min la registaro!...

– Ĝi pravas.

– Tute ne! Mi tiel feliĉus, se oni lasus min vivi trankvila!

– Per la rentoj de la aliaj.

– Ĉu ne? Tio estus tiel simpla! Sed mi babilas, mi diras stultaĵojn, kaj vi eble hastas. Ni parolu rekte pri la fakto, Ganimardo! Kial vi honoras min per vizito?

– Pro la afero Kahorno, senpere deklaris Ganimardo.

– Halt! momenteton... Tio estas, ke tiom da aferoj mi havas! Mi unue trovu en mia cerbo la dosieron de la afero Kahorno... Ha! jen ĝi estas. Afero Kahorno, kastelo Malaquis, Malsupra-Sejno... Du Rubens, unu Watteau, kaj kelkaj bagateloj.

– Bagateloj!

– Ho! nu, ĉio tio mezaĉe gravas. Oni trovas pli bone. Sed sufiĉas, ke la afero interesas vin... Parolu do, Ganimard.

– Ĉu mi klarigu, kie ni estas pri la enketo?

– Senutile. Mi legis la ĉi-matenajn gazetojn. Mi eĉ permesos al mi diri, ke vi ne rapide antaŭeniras.

– Jen ĝuste la kialo, pro kiu mi min turnas al via komplezo.

– Tute laŭ viaj ordonoj.

– Unue ĉi tio: ĉu la afero estis kondukita ja de vi?

– De A ĝis Z.

– La aviza letero? la telegramo?

– Estas de via servisto. Mi eĉ devas havi iliajn kvitancojn ie.

Arseno malfermis la tirkeston de tableto el blanka ligno, kiu konsistigis, kun la lito kaj la stupareto, la tutan meblaron de la ĉelo, prenis el ĝi du paperajn ĉifonojn kaj ilin antaŭtenis al Ganimardo.

– Ha! ĉi tiu ekkriis, sed mi kredis vin pririgardita kaj priserĉita por iu ajn bagatela kialo. Tamen, vi legas la gazetojn, vi kolektas la poŝtajn kvitancojn...

– Ba! tiuj homoj estas tiom stultaj! Ili malkudras la subŝtofon de mia jako, ili esploras la plandumojn de miaj botetoj, ili aŭskultumas la murojn de tiu ĉambro, sed ne unu havus la ideon, ke Arseno Lupeno estus sufiĉe naiva por elekti tiel facilan kaŝejon. Ja pri tio mi kalkulis.

Ganimardo, amuzite, ekkriis:

– Kia stranga knabo! Vi konsternas min. Ek, rakontu al mi la aventuron.

– Ho! ho! Vi tro rapidas! Inici vin pri ĉiuj miaj sekretoj... senvualigi al vi miajn, etajn trukojn... Tio ja estas grava.

– Ĉu mi malpravis kalkulante pri via komplezo?

– Ne, Ganimardo, kaj ĉar vi insistas...

Arseno Lupeno trapaŝis la ĉambron du aŭ tri fojojn, kaj haltante diris:

– Kion vi pensas pri mia letero al la barono?

– Mi pensas, ke vi volis distri vin, kaj iom fanfaroni.

– Ha! jen, fanfaroni! Nu, mi certigas al vi, Ganimardo, ke mi kredis vin pli forta. Ĉu mi, Arseno Lupeno, malŝparas tempon per tiuj infanaĵoj? Ĉu mi estus skribinta tiun leteron, se mi estus povinta priŝtelis la baronon sen skribi al li? Sed komprenu do, vi kaj la aliaj, ke tiu letero estas la nepra komencopunkto, la risorto kiu ekmovigis la tutan maĥinacion. Nu, ni orde procedu, kaj ni kune preparu, se vi volas, la ŝteladon de Malaquis.

– Mi aŭskultas vin.

– Do, ni supozu kastelon rigore ŝlositan, barikaditan, kiel estis tiu de la barono Kahorno. Ĉu mi forlasos la partion kaj rezignos trezorojn kiujn mi avidas, pretekste ke la kastelo kiu enhavas ilin estas neatingebla?

– Evidente ne.

– Ĉu mi provos sturmon kiel malnovtempe, estrante trupon da aventuristoj?

– Infane!

– Ĉu mi inside enŝteliros?

– Neeble.

– Restas rimedo, la ununura miaopinie, tiu estas, ke mi iĝu invitita de la proprietulo de la koncerna kastelo.

– La rimedo estas originala.

– Kaj kiom facila! Ni supozu, ke tagon, la koncerna proprietulo ricevus leteron, avertantan lin, pri tio kion teksas kontraŭ li ulo nomata Arseno Lupeno, fama ŝtelisto. Kion li faros?

– Li sendos la leteron al la prokuroro.

– Kiu mokos lin, *ĉar la koncerna Lupeno estas nun malliberigita*. Do, panikiĝo de la ulo, kiu plene pretas peti helpon de kiu ajn, ĉu ne vere?

– Tio estas eksterduba.

– Kaj se li okaze legas en gazetaĉo, ke fama policisto ferias en najbara urbeto...

– Li iros alparoli tiun policiston.

– Vi prave parolis. Sed aliflanke, ni imagu, ke antaŭvidinte tiun neeviteblan demarŝon, Arseno Lupeno invitis unu el siaj plej lertaj amikoj instaligi en Caudebec, poste interilatiĝi kun redaktisto de *Le Réveil*, *gazeto abonita de la barono*, kaj aludi ke tiu fama policisto estas tiu viro, kio okazos?

– Okazos, ke la redaktisto anoncos en *Le Réveil* la ĉeeston de la koncerna policisto en Caudebec.

– Perfekte, poste du ebloj: aŭ la fiŝo – mi celas Kahornon – ne buŝaptas la hokon, kaj tiam nenio okazos. Aŭ, kaj tio estas la plej verŝajna hipotezo, li alkuras, svingante la voston. Kaj jen do mia Kahorno petegante kontraŭ mi la helpon de unu el miaj amikoj.

– Pli kaj pli originale.

– Kompreneble, la pseŭdo-policisto unue rifuzas sian subtenon. Tiam, depeŝo de Arseno Lupeno. Teruro de la barono, kiu petegas denove mian amikon, kaj proponas al li tiom por sekurigi lian savon. La koncerna amiko akceptas, kunvenigas du ulegojn el nia bando, kiuj, nokte, dum Kahorno estas gvatita de sia protektanto, translokas tra la fenestron iujn objektojn kaj lasas ilin degliti, per ŝnuroj, en bonan ŝalupeton taŭge menditan. Tio simplas kiel Lupeno.

– Kaj tio tute simple mirindas, ekkriis Ganimardo, kaj mi ne povus tro laŭdi la aŭdacon de la elpensado kaj la spritecon pri la detaloj. Sed mi ne vidas sufiĉe faman policiston, por ke lia nomo povu tiom logi kaj influi la baronon.

– Estas unu, kaj estas nur unu.

– Kiu?

– Tiu de la plej glora, de la persona malamiko de Arseno Lupeno, resume, de la inspektoro Ganimardo.

– Mi!

– Vi mem, Ganimardo. Kaj jen kio estas delica: se vi iros tien kaj la barono decidiĝos pri babili, vi fine malkovros, ke via devo estas aresti vin mem, kiel vi arestis min en Usono. La revanĉo estas komika, ĉu? Mi arestigas Ganimardon de Ganimardo!

Arseno Lupeno plenkore ridis. La inspektoro, iom ofendite, mordis al si la lipojn. La ŝerco ne ŝajnis al li inda je tiaj eksplodoj de ĝojo.

La alveno de gardisto permesis al li rekvietiĝi. La viro alportis la manĝon, kiun Arseno Lupeno, pro speciala favoro, venigis de la najbara restoracio. Surtabliginte la pleton, li retiriĝis. Arseno instaligis, rompis sian panon, manĝis el ĝi du aŭ tri mordaĵojn kaj daŭrigis:

– Sed estu trankvila, mia kara Ganimardo, vi ne iros tien. Mi tuj malkaŝos al vi ion, kiu konsternos vin: la afero Kahorno estas fermota.

– Kion?

– Ĝi estas fermota, mi diras al vi.

– Certe ne, mi ĵus forlasis la Sekurecan estron.

– Kaj poste? Ĉu S-ro Dudouis scias pli ol mi, pri kio koncernas min? Vi ekscios, ke Ganimardo – pardonu – ke la pseŭdo-Ganimardo plu havas bonegajn rilatojn kun la barono. Tiu ĉi, kaj tio estas la ĉefa kialo pro kiu li nenion konfesis, taskis al li la tre delikatan mision prinegoci kun mi transakcion, kaj ĉi-momente, kontraŭ iu monsumo, la barono probable reakiris siajn karajn kolektaĵojn. Kompense, li forigos sian plendon. Do, neniuj ŝteloj plu. Do, ja necesos ke la prokuroraro forlasu...

Ganimardo rigardis la kaptiton kun stupora mieno.

– Kaj kiel vi scias ĉion ĉi?

– Mi ĵus ricevis la depeŝon, kiun mi atendis.

– Vi ĵus ricevis depeŝon, ĉu?

– Ĝuste nun, kara amiko. Pro ĝentileco, mi ne volis legi ĝin en via ĉeesto. Sed se vi permesas al mi...

– Vi priridas min, Lupeno.

– Bonvolu, kara amiko mia, milde senkapigi tiun duonboligitan ovon. Vi mem konstatos, ke mi ne mokridas vin.

Maŝine, Ganimardo obeis, kaj rompis la ovon per tranĉila klingo. Li eligis krion pro surprizo. La malplena ŝelo enhavis folion el blua papero. Laŭ la peto de Arseno, li malfaldis ĝin. Ĝi estis telegramo, aŭ pliĝuste parto de telegramo, el kiu oni deŝiris la poŝtajn indikaĵojn. Li legis:

“Interkonsento konkludita. Cent mil monumoj liveritaj. Ĉio glatas.”

– Cent mil monumoj? li diris.

– Jes, cent mil frankoj! Tio estas malmulto, sed fine, la tempoj estas malfacilaj... Kaj mi havas tiom pezajn ĝeneralajn elspezojn! Se vi scius mian buĝeton... buĝeton de granda urbo!

Ganimardo ekstaris. Lia malbona humoro jam disiĝis. Li cerbumis kelkajn sekundojn, pripensis rapide la tutan aferon, provante malkovri ĝian malfortan punkton. Poste li eldiris per tono, tra kiu li malkaŝe lasis sian spertulan admiron traflui:

– Feliçe, ne ekzistas dekoj kiel vi, alie ni nur rezignu la metion.

Arseno Lupeno alprenis modestan mieneton kaj respondis:

– Ba! ja necesis distriĝi, okupi la libertempon... des pli ke la afero povis sukcesi nur se mi estus en malliberejo.

– Kion! ekkris Ganimardo, via proceso, via defendo, la enketo, ĉu ĉio tio ne do sufiĉas al vi por vin distri?

– Ne, ĉar mi decidis, ke mi ne ĉeestos mian proceson.

– Ho! ho!

Arseno Lupeno kviete ripetis:

– Mi ne ĉeestos mian proceson.

– Verdire!

– Ha, mia kara, ĉu vi imagas, ke mi putros sur la malseketa pajlo? Vi ofendas min. Arseno Lupeno restas en malliberejo nur dum la tempo kiu plaĉas al li, kaj ne unu plian minuton.

– Eble estis pli prudente unue ne eniri tien, obĵetis la inspektoro per ironia tono.

– Ha! sinjoro mokas? sinjoro memoras, ke li havis la honoron aresti min? Eksciis, respektinda amiko mia, ke neniu, ne pli vi ol alia, estus povinta kapti min, se multe pli konsiderinda intereso ne estus loginta min je tiu preciza momento.

– Ĉu?

– Virino estis rigardanta min, Ganimardo, kaj mi amis ŝin. Ĉu vi komprenas ĉion, kion enhavas la fakto esti rigardata de virino, kiun oni amas? La cetero ne gravis al mi, tion mi ĵuras. Kaj tial mi estas tie.

– Jam delonge, permesu ke mi rimarkigu tion.

– Mi volis unue forgesi. Ne ridu: la aventuro estis ĉarma, kaj mi plu konservas kortuŝan memoron pri ĝi... Kaj poste, mi estas iom neŭrastenia! La vivo estas tiel febra, nuntempe! Oni decidu, laŭnecese, fari tielnomatan izolan kuracadon. Tiu loko estas efikega por tiaj reĝimoj. Oni praktikas tie la kuracadon de La Sano en ĝia tuta rigoreco.

– Arseno Lupeno, rimarkis Ganimardo, vi primokas min.

– Ganimardo, asertis Lupeno, hodiaŭ estas vendredo. La venontan merkredon, mi iros fumi mian cigaron en via domo, ĉe la strato Pergolèse, je la kvara posttagmeze.

– Arseno Lupeno, mi atendas vin.

Ili manpremis, kiel du bonaj amikoj kiuj estimas unu la alian laŭ sia ĝusta valoro, kaj la maljuna policisto direktiĝis al la pordo.

– Ganimardo!

Tiu ĉi sin turnis.

– Kio okazas?

– Ganimardo, vi forgesas vian poŝhorloĝon.

– Mian poŝhorloĝon?

– Jes, ĝi perdiĝis en mia poŝo.

Li redonis ĝin ekskuzante sin.

– Pardonu min... malbona kutimo... Sed tio, ke ili prenis la mian, ne estas sufiĉa kialo, por ke mi senigu vin je la via. Des pli ke mi havas tie kronometron, pri kiu mi ne plendu kaj kiu plene kontentigas miajn bezonojn.

Li eligis el la tirkesto larĝan poŝhorloĝon el oro, dikan kaj komfortan, ornamitan de peza ĉeno.

– Kaj tiu ĉi, el kiu poŝo ĝi devenas? demandis Ganimardo.

Arseno Lupeno malzorge ekzamenis la inicialojn.

– J. B... Kiu diable li ja povus esti?... Ha! jes, mi rememoras, Jules Bouvier, mia enketa juĝisto, ĉarma viro...

La eskapo de Arseno Lupeno

Kiam Arseno Lupeno, finmanĝinte, elpoŝigis belan cigaron ore ringitan kaj ekzamenis ĝin kun kontenteco, la pordo de lia karcero malfermiĝis. Li havis nur la tempon ĵeti ĝin en la tirkeston kaj malproksimiĝi de la tablo. La gardisto eniris, estis la promena horo.

— Mi atendis vin, kara amiko mia, ekkriis Lupeno, plu bonhumora.

Ili eliris. Apenaŭ ili malaperis ĉe la koridora angulo, du homoj siavice eniris la ĉelon kaj komencis detale esplori ĝin. Unu estis la inspektoro Dieuzy, la alia la inspektoro Folenfant.

Oni volis ĉesigi la aferon. Ne estis iu dubo: Arseno Lupeno konservis interrilatojn kun la ekstero, kaj komunikis kun siaj bandanoj. La hieraŭon ankoraŭ, *Grand Journal* publikigis tiujn liniojn adresitajn al sia jura kunlaboranto:

“Sinjoro,

En lastatempe aperinta artikolo, vi esprimis vin pri mi per terminoj, kiujn nenio povus pravigi. Kelkajn tagojn antaŭ la komenco de mia proceso, mi postulos al vi konton.

Respektoplenajn salutojn,

Arseno Lupeno.”

La manskribo ja estis tiu de Arseno Lupeno. Do, li sendis leterojn. Do li ricevis iujn. Do estis certe, ke li preparas tiun eskapon tiel arogante anoncitan de li.

La situacio fariĝis netolerebla. Konsente kun la enketa juĝisto, la Sekureca estro, S-ro Dudouis, mem iris al La Sano por eksponi al la mallibereja estro la aplikindajn rimedojn. Kaj, tuj de sia alveno, li sendis du virojn en la ĉelon de la kaptito.

Ili levis ĉiun slabon, malmuntis la liton, faris ĉion kutiman en tia okazaĵo, kaj fine nenion malkovris. Ili estis rezignontaj siajn esploradojn, kiam la gardisto hastege alkuris kaj diris al ili:

– La tirkeston... rigardu la tirkeston de la tablo. Kiam mi eniris, ŝajnis al mi, ke li ĝin repuŝas.

Ili enrigardis, kaj Dieuzy ekkriis:

– Je Dio, ĉi-foje la klienton ni tenas.

Folenfant kontraŭbaris lin.

– Haltu, etulo mia, la ĉefo mem inventaros.

– Tamen, tiu luksa cigaro...

– Lasu la Havanon kaj ni avertu la ĉefon.

Du minutojn poste, S-ro Dudouis esploris la tirkeston. Li trovis unue stakon da gazetaj artikoloj detranĉitaj fare de *Argus de la Presse*, kaj kiuj koncernis Arsenon Lupenon, poste tabakujon, pipon, paperon nomatan cepa ŝelo, kaj fine du librojn.

Li rigardis ties titolon. Estis *Kulto de la herooj*, de Carlyle, angla eldono, kaj ĉarma elzeviro, kun malnovstila bindaĵo, *Manlibro de Epikteto*, germana traduko eldonita en Lejdeno en 1634. Ilin foliuminte, li konstatis, ke ĉiuj paĝoj estas difektitaj, substrekitaj, prinititaj. Ĉu tio estis ĉifro, aŭ tiaj markoj montrantaj la fervoron, kiun oni havas por libro?

– Ni detale vidos tion, diris S-ro Dudouis.

Li esplori la tabakujon, la pipon. Poste, ekprenante la faman ore ringitan cigaron:

– Diable, li ne ĝenas sin, nia amiko, li ekkris, unu Henri Clay !

Per maŝina gesto de fumanto, li almovis ĝin ĉe sian orelon kaj kraketigis ĝin. Kaj tuj ekkrio eliĝis el li. La cigaro moliĝis sub la premo de liaj fingroj. Li ekzamenis ĝin pli atente kaj baldaŭ distingis ion blankan inter la tabakaj folioj. Kaj delikate, pere de pinglo, li altiris rulon da tre maldika papero, apenaŭ tiel larĝan kiel dentopikilo. Ĝi estis bileto. Li malvolvis ĝin kaj legis tiujn vortojn, skribitajn per virina eta manskribo:

“La korbo anstataŭis la alian. Ok el dek estas preparitaj. Kiam oni premas per la ekstera piedo, la plato leviĝas desupre malsupren. De la dek-dua ĝis la dek-sesa ĉiutage, H-P

atendos. Sed kie? Tujan respondon. Estu trankvila, via amikino prigardas vin.”

S-ro Dudouis pripensis momenteton kaj diris:

– Tio estas sufiĉe klara... la korbo... la ok fakoj... de la dek-dua ĝis la dek-sesa, tio estas de tagmezo ĝis la kvara horo...

– Sed pri tiu H-P, kiu atendos?

– H-P ĉi-kaze, devas signifi aŭtomobilon, H-P, horse power, ĉu ne tiel oni indikas la forton de motoro en la sporta faklingvo? Unu dudek kvar H-P, tio estas dudek-kvar-ĉevalpova aŭtomobilo.

Li ekstaris kaj demandis:

– Ĉu la kaptito estis finanta la tagmanĝon?

– Jes.

– Kaj ĉar li ne ankoraŭ legis tiun mesaĝon, kiel pruvas la stato de la cigaro, probable li ĵus ricevis ĝin.

– Kiel?

– En siaj manĝaĵoj, meze de sia pano aŭ de terpomo, mi ne scias.

– Neeble, oni permesis al li venigi sian nutraĵon nur por lin faligi kaptilen, kaj ni nenion trovis.

– Ĉi-vespere ni serĉos la respondon de Lupeno. Nunmomente, retenu lin ekster lia karcero. Mi tuj alportos tion

al sinjoro enketa juĝisto. Se li samopinias kiel mi, ni tuj fotigos la leteron, kaj post unu horo vi povos remeti en la tirkeston, krom tiujn objektojn, identan cigaron, enhavantan la originalan mesaĝon mem. Necesas, ke la kaptito ne suspektu ion ajn.

Ne sen ia scivolo, S-ro Dudouis vespere revenis al la aktejo de La Sano kune kun la inspektoro Dieuzy. En angulo, sur la hejtoforno, tri teleroj sterniĝis.

– Ĉu li manĝis?

– Jes, respondis la direktoro.

– Dieuzy, bonvolu distranĉi en tre maldikajn pecojn tiujn kelkajn erojn da makaronioj kaj malfermi tiun buleton da pano... Ĉu nenio?

– Ne, ĉefo.

S-ro Dudouis ekzamenis la telerojn, la forkon, la kuleron, fine la tranĉilon, regulan tranĉilon kun ronda klingo. Li turnis ĝian tenilon maldekstren, poste dekstren. Dekstren la tenilo cedis kaj malŝraŭbiĝis. La tranĉilo estis kava kaj servis kiel ujo al paperfolio.

– Pa! li diris, tio ne estas tre ruza por tia viro, kia Arseno. Sed ni ne malŝparu tempon. Vi, Dieuzy, iru do enketi en tiun restoracion.

Poste li legis:

“Mi konfidas min al vi, H-P sekvos de malproksime, ĉiutage. Mi iros antaŭen. Ĝis baldaŭ, kara kaj admirinda amikino.”

– Fine, ekkriis S-ro Dudouis frotante al si la manojn, mi kredas ke la afero estas sur la bona vojo. Helpeto de ni, kaj la eskapo sukcesos... almenaŭ sufiĉe por ebligi, ke ni kaptu la komplicojn.

– Kaj se Arseno Lupeno tamen forfuĝas? obĵetis la direktoro.

– Ni uzos la sufiĉan kvanton da viroj. Se tamen li tro lertus... nu, des pli malbone por li! Koncerne la bandon, ĉar la ĉefo rifuzas paroli, la aliaj parolos.

Kaj, fakte, li ne multe parolis, Arseno Lupeno. De monatoj, S-ro Jules Bouvier, la enketa juĝisto, vane klopodis tiucele. La pridemandadoj estis nur senutilaj kolokvoj inter la juĝisto kaj la advokato, majstro Danval, unu el la princoj de la advokataro, kiu cetere sciis pri la kulpigito proksimume tiom, kiom la unua alveninto.

Tempaltempe, pro ĝentileco, Arseno Lupeno ellasis:

– Jes ja, sinjoro Juĝisto, ni interkonsentas: la ŝtelo de Crédit Lyonnais, la ŝtelo de la strato Babylone, la emisio de falsaj monbiletoj, la afero de la asekurkontraktoj, la prirabo de la kasteloj Armesnil, Gouret, Imblevain, Groselliers, Malaquis, ĉio tio estas de via servanto.

– Tiam, ĉu vi povus klarigi...

– Senutile, mi ĉion konfesas, entute, kaj eĉ dekoble pli ol vi supozas.

Laca pro batalado, la juĝisto estis interrompinta tiujn enuigajn pridemandadojn. Sed li rekomencis ilin, eksciinte pri la du interkaptitaj biletoj. Kaj regule, je tagmezo, Arseno Lupeno estis kondukita de La Sano al la Deponejo, en mallibereja veturilo, kun kelke da kaptitoj. Ili foriris reen ĉirkaŭ la tria aŭ la kvara horo.

Nu, tagmezon, tiu reiro okazis en apartaj kondiĉoj. Ĉar la aliaj kaptitoj de La Sano ne ankoraŭ estis pridemanditaj, oni decidis rekonduki unue Arsenon Lupenon. Li do eniris sola en la veturilon.

Tiaj malliberejaj veturiloj, vulgare nomataj “salatkorboj”, estas dividitaj, laŭ la longo, de centra korodoro, al kiu malfermiĝas dek fakoj: kvin dekstre kaj kvin maldekstre. Ĉiu el tiuj fakoj estas aranĝita tiamaniere, ke oni ene restu sidanta, kaj ke la kvin malliberuloj, krom tio ke ili disponas po nur tre mallarĝan lokon, estas disigitaj unu disde la aliaj de paralelaj vandoj. Municipa gardisto, postenigita ĉe la ekstremaĵo, pririgardas la koridoron.

Arseno estis enkondukita en la trian dekstran ĉelon, kaj la peza veturilo ekmoviĝis. Li ekkonsciis, ke ili forlasas la kajon de la Horloĝo, kaj ke ili preterpasas la Justican Palacon. Tiam, ĉirkaŭ la mezo de la ponto Saint-Michel, li premis per la dekstra piedo, kiel li faris ĉiufoje, la ladan platon kiu fermis lian ĉelon. Tuj, io ekagis, la lada plato nepercepteble disiĝis. Li povis konstati, ke li trovas ĝuste inter la du radoj.

Li atendis, atenteme. La veturilo malrapide supreniris la bulvardon Saint-Michel. Ĉe la vojkruciĝo Saint-Germain, ĝi haltis.

La ĉevalo de ŝarĝoveturilo kolapsis. Ĉar la trafiko estis interrompita, tre rapide, ekestis ŝtopiĝo de fiakroj kaj omnibusoj.

Arseno Lupeno eksterigis la kapon. Alia mallibereja veturilo estis parkita laŭ tiu, kiun li okupis. Li pli levis la kapon, metis piedon sur unu el la spokoj de la granda rado kaj saltis surgrunden.

Koĉero vidis lin, ekridegis, poste volis voki. Sed lia voĉo perdiĝis en la bruego de la veturiloj, kiuj denove fluis. Cetere, Arseno Lupeno jam estis for.

Li faris kelkajn paŝojn kurante, kaj, sur la maldekstra trotuaro, li turnis sin, ĉirkaŭrigardis, ŝajnis serĉanta la taŭgan vojon, kiel iu ne ankoraŭ scianta, kiun direkton li sekvos. Tiam, decidema, li enigis la manojn en siajn poŝojn, kaj kun senzorga mieno de vaganta promenanto, li daŭre supreniris la bulvardon.

La vetero estis milda, feliĉa kaj leĝera vetero de aŭtuno. La kafejoj estis plenaj. Li sidiĝis ĉe la teraso de unu el ili.

Li mendis bierglasegon kaj cigaredpaketon. Li malplenis sian glason per malgrandaj glutoj, trankvile fumis cigaredon, ekbruligis duan. Fine, stariĝinte, li petis al la kelneron venigi la estron.

La estro venis, kaj Arseno Lupeno diris al li, sufiĉe laŭte por esti aŭdita de ĉiuj;

– Mi bedaŭras, sinjoro, mi forgesis mian monujon. Eble mia nomo estas sufiĉe konata de vi, por ke vi konsentu al mi kelktagan krediton: Arseno Lupeno.

La estro rigardis lin, kredante pri ŝerco. Sed Arseno ripetis:

– Lupeno, kaptita en La Sano, nuntempe en stato de eskapo. Mi ja esperas, ke tiu nomo inspiras al vi plenan fidon.

Kaj li malproksimiĝis, meze de la ridoj, sen ke la alia intencis postuli ion ajn.

Li oblikve transiris la straton Soufflot kaj prenis la straton Saint-Jacques. Li pace laŭiris ĝin, haltante ĉe la vitrinoj kaj fumante cigaredojn. En la bulvardo Port-Royal, li orientiĝis, informiĝis, kaj marŝis rekten al la stato de La Sano. La altaj malgajaj muroj de la malliberejo baldaŭ stariĝis. Laŭirinte ilin, li alvenis proksime al la municipa gardisto, kiu vaĉis, kaj, demetante sian ĉapeloj diris:

– Ĉu ja estas ĉi tie la malliberejo de La Sano?

– Jes.

– Mi dezirus reiri en mian karceron. La veturilo lasis min survoje, kaj mi ne volus troi...

La viro grumblis...

– Ej vi, cirkulu, laŭ vojo via, rapide!

– Pardonon, pardonon! Tio estas, ke mia vojo pasas tra tiu pordo. Kaj se vi malhelpus Arsenon Lupenon transiri ĝin, tio povus multe kosti al vi, amiko mia!

– Arsenon Lupenon! Kion vi rakontas al mi?

– Mi bedaŭras, ke mi ne havas mian vizitkarton, diris Arseno, ŝajnigante traserĉi siajn poŝojn.

La gardisto observis lin de piedoj ĝis kapo, konsternite. Poste, senvorte, kvazaŭ kontraŭvole, li tiris sonorilon. La fera pordo duonmalfermiĝis.

Kelkajn minutojn poste, la direktoro alkuris ĝis la aktejo, gestadante kaj afektante furiozan koleron. Arseno ridetis:

– Nu, sinjoro Direktoro, ne ludu kun mi je kiu estos la plej sprita. Kiel do! Oni zorge atentis rekonduki min sola en la veturilo, oni pretigas bonan ŝtopiĝon, kaj oni imagas, ke mi forleporos por rekuniĝi kun miaj amikoj! Nu! Kaj pri la dudek Sekurecaj agentoj, kiuj eskortis nin piede, fiakre kaj bicikle? Ne, ili tiom favorus min! Mi tiam ne elirus el ĝi viva. Ej, sinjoro Direktoro, oni eble kalkulis pri tio, ĉu?

Li ŝultrolevis kaj aldonis:

– Mi petegas, sinjoro Direktoro, oni ne okupiĝu pri mi. La tagon, kiam mi deziros eskapi, mi bezonos neniun.

La postmorgaŭon, *Écho de France*, kiu finfine iĝis la oficiala vitrino de la heroaĵoj de Arseno Lupeno – onidire li estis unu el ĝiaj ĉefaj komanditantoj – *Écho de France* publikigis la plej kompletajn detalojn pri tiu eskapa provo. Eĉ la teksto de la biletoj interŝanĝitaj inter la kaptito kaj lia mistera amikino, la uzitaj rimedoj por tiu korespondo, la komplikeco de la polico, la promenado sur la bulvarado Saint-Michel, la incidento ĉe la kafejo Soufflot, ĉio estis senvualigita. Oni sciis,

ke la esploroj de la inspektoro Dieuzy ĉe la restoraciaj kelneroj neniom rezultigis. Kaj oni eksciis, krome, tiun konsternantan aferon, kiu montris la senliman diversecon de la kapabloj, kiujn tiu viro havis: la mallibereja veturilo, en kiu oni transportis lin, estis tute falsita veturilo, kiun lia bando substituis al unu el la ses kutimaj veturiloj, kiuj konsistigas la malliberejan servon.

La venonta eskapo de Arseno Lupeno ne plu dubigis iun ajn. Li mem, cetere, anoncis ĝin per kategoriaj terminoj, kiel pruvis lia respondo al S-ro Bouvier, la tagon post la incidento. Ĉar la juĝisto primokis lian fiaskon, li rigardis lin kaj malvarme diris:

– Atente aŭskultu tion, sinjoro, kaj kredu min laŭparole: tiu eskapa provo estis parto de mia eskapa plano.

– Mi ne komprenas, rikanis la juĝisto.

– Estas senutile, ke vi komprenu.

Kaj ĉar la juĝisto, dum tiu pridemandado, kiu plene aperis en la paĝoj de *Écho de France*, ĉar la juĝisto revenis al sia enketo, li ekkris, kun laceca mieno.

– Dio mia, Dio mia, kiautile! ĉiuj tiuj demandoj havas nenian gravecon.

– Kiel do, nenian gravecon?

– Tute ne, ĉar mi ne ĉeestos mian proceson.

– Vi ne ĉeestos...

– Ne, tio estas fiksa ideo, definitiva decido. Nenio povos kompromisigi min.

Tia aplombo, la neklarigeblaj maldiskretaĵoj, kiuj okazis ĉiutage, incitis kaj konsternis la justicon. Tie estis sekretoj, kiujn nur Arseno Lupeno konis, kaj kies malkaŝo, konsekvence, povis deveni nur de li. Sed kiucele li senvualigis ilin? Kaj kiel?

Oni translokis Arsenon Lupenon en alian ĉelon. Iun vesperon, li malsupreniris al la malsupra etaĝo. Siaflanke, la juĝisto fermis sian enketon kaj transdonis la aferon al la Akuzoĉambro.

Estiĝis silento. Ĝi daŭris du monatojn. Arseno pasigis ilin sternite sur sia lito, kun la vizaĝo preskaŭ ĉiam turnita al la muro. Ŝajnis, ke tiu ŝanĝo de karcero senkuraĝigis lin. Li rifuzis akcepti sian advokaton. Li apenaŭ interŝanĝis kelkajn vortojn kun siaj gardistoj.

Dum la du semajnoj antaŭ lia proceso, li ŝajnis revigliĝanta. Li plendis pro aermanko. Oni eligis lin en la korton, frumatene, flankitan de du viroj.

La publika scivolo, tamen ne malfortiĝis. Ĉiutage oni atendis la novaĵon de lia eskapo. Oni preskaŭ deziris ĝin, tiom la persono plaĉis al la homamaso kun sia vervo, sia gajeco, sia diverseco, sia genia inventemo kaj la mistero de sia vivo. Arseno Lupeno sin eskapu. Tio estis neevitebla, nepra. Oni eĉ miris, ke tio tiom longe malfruas. Ĉiumatene, la polica Prefekto demandis al sia sekretario:

– Nu! ĉu li ne ankoraŭ foriris?

– Ne, sinjoro Prefekto.

– Tio do okazos morgaŭ.

Kaj, la tagon antaŭ la proceso, iu sinjoro sin prezentis en la oficejoj de *Grand Journal*, petis la juran kunlaboranton, ĵetis sian vizitkarton al lia vizaĝo, kaj rapide forkuris. Sur la karto, tiuj vortoj estis skribitaj:

“Arseno Lupeno ĉiam plenumas siajn promesojn.”

En tiaj kondiĉoj komenciĝis la debatoj.

Grandega homamaso alfluis. Neniu, kiu ne volis vidi la faman Lupenon kaj ne antaŭĝuis la kielon, per kiu li mistifikus la prezidanton. Advokatoj kaj juĝistoj, kronikistoj kaj mondumanoj, artistoj kaj altrangulinoj, ĉiuj parizaj gravuloj premiĝis sur la benkoj de la aŭdienco.

Pluvis, ekstere la tago estis malhela, oni malbone vidis Arsenon Lupenon, kiam la gardistoj lin enkondukis. Tamen lia peza sinteno, la maniero per kiu li lasis sin fali sur sian sidlokon, lia indiferenta kaj pasiva senmoveco ne antaŭfavoris lin. Plurfoje lia advokato – unu el la sekretarioj de M-ro Danval, ĉar tiu lasta taksis malinda je si la rolon, al kiu li estis reduktita – plurfoje lia advokato alparolis lin. Li kapjesis kaj silentis.

La aktisto legis la akuzakton, poste la prezidanto eldiris:

– Akuzito, ekstaru. Vian nomon, antaŭnomon, aĝon kaj profesion?

Ne ricevante respondon, li ripetis:

– Vian nomon? Mi petas al vi vian nomon.

Dika kaj laca voĉo artikulaciis:

– Baudru, Désiré.

Ekestis murmuroj. Sed la prezidanto daŭrigis:

– Baudru, Désiré, ĉu? Ha! bone, nova avataro! Ĉar ĝi estas proksimume la oka nomo, kiun vi pretendas, kaj kiu kredeble estas tiel imaga kiel la aliaj, ni nin limigos, se vi bonvolas, je tiu de Arseno Lupeno, sub kiu vi estas pli avantaĝe konata.

La prezidanto konsultis siajn notojn kaj plu diris:

– Ĉar, malgraŭ ĉiuj esploroj, estis neeble rekrei vian identecon. Vi prezentas tiun kazon iom originalan en nia moderna socio, ke vi ne havas pasintecon. Ni ne scias, kiu vi estas, de kie vi venas, kie pasis via infanaĝo, resume, nenion. Vi subite aperas, antaŭ tri jaroj, oni ne ekzakte scias el kiu medio, por subite riveliĝi kiel Arseno Lupeno, tio estas bizara kombinaĵo de inteligenteco kaj perverseco, de malmoraleco kaj malavareco. La donitaĵoj, kiujn ni havas pri vi antaŭ tiu epoko, pliĝuste estas supozoj. Estas probable, ke la nomito Rostat, kiu laboris, antaŭ ok jaroj, kun la prestidigitisto Dickson estis neniu alia ol Arseno Lupeno. Estas probable, ke la rusa studento, kiu frekventis antaŭ ses jaroj la laboratorion de doktoro Altier, en la hospitalo Saint-Louis, kaj kiu ofte surprizis la majstron pro la inĝenio de siaj hipotezoj pri bakteriologio kaj la aŭdaco de siaj eksperimentoj pri haŭtmalsanoj, estis neniu alia ol Arseno Lupeno. Arseno Lupeno, ankaŭ, la instruisto pri japana lukto, kiu instaligis en Parizo longe antaŭ ol oni ekparolis pri ĵuĵicuo. Arseno Lupeno, ni kredas, la konkursobiciklisto, kiu gajnis la

Grandan Premion de la Ekspozicio, ricevis siajn dek mil frankojn kaj neniam plu reaperis. Arseno Lupeno eble ankaŭ tiu, kiu savis tiom da homoj tra la lukto de la Bazaro de la Karitato... kaj poste prirabis ilin.

Kaj, post paŭzo, la prezidanto konkludis:

– Tia estas tiu epoko, kiu ŝajne estis nur zorga preparado por la lukto, kiun vi entreprenis kontraŭ la socio, metoda lernado kie vi plej alten alportis vian forton, vian energion kaj vian lertecon. Ĉu vi agnoskas la verecon de tiuj faktoj?

Dum tiu parolado, la akuzito balanciĝis de unu kruro al la alia, kun ronda dorso kaj inertaj brakoj. Sub pli viva lumo, oni rimarkis lian ekstreman maldikecon, liajn kavajn vangojn, liajn strange elstarajn vangostojn, lian terkoloran vizaĝon, marmorumitan de ruĝaj makuletoj, kaj ĉirkaŭitan de malofta kaj neegala barbo. La malliberejo konsiderinde maljunigis kaj velkigis lin. Oni ne plu rekonis la elegantan figuron kaj la junan vizaĝon, kies simpatian portreton la gazetoj tiel ofte publikigis.

Li aspektis, kvazaŭ li ne aŭdus la demandon, kiun oni starigis al li. Dufoje ĝi estis ripetita al li. Tiam li levis la okulojn, ŝajnis pripensanta, poste, forte penante, murmuris:

– Baudru, Désiré.

La prezidanto ekridis.

– Mi ne bone komprenas la defendan sistemon, kiun vi adoptis, Arseno Lupeno. Se ĝi estas ludi stultulojn kaj senrespondeculojn, laŭplace. Koncerne min, mi iros rekte al la celo sen zorgi pri viaj fantaziaĵoj.

Kaj li ekdetalis la ŝtelojn, friponaĵojn kaj trompojn riproĉitajn al Lupeno. Foje li pridemandis la akuziton. Tiu ĉi eligis grumblon aŭ ne respondis.

La defilado de la atestantoj komenciĝis. Estis pluraj sensignifaj depozicioj, aliaj pli seriozaj, kiuj ĉiuj havis tiun komunan karakteron, ke ili kontraŭdiris unu la alian. Konfuzanta mallumo ĉirkaŭvolvis la debatojn, sed la ĉefinspektoro Ganimardo estis enkondukita, kaj la intereso vekiĝis.

Tuj de la komenco, tamen, la maljuna policisto estigis ian seniluziigon. Li aspektis, ne timidigita – li ja spertis aliaĵojn – sed malkvieta, embarasita. Plurfoje, li alrigardis la akuziton kun videbla ĝeno. Malgraŭe, ambaŭ manojn apogitajn sur la pledbarilo, li rakontis la incidentojn, en kiuj li estis kompromitita, sian persekutadon tra Eŭropo, sian alvenon en Usonon. Kaj oni aŭskultis lin kun avido, kvazaŭ oni aŭskultus la priskribon de la plej pasiigaj aventuroj. Sed, ĉirkaŭ la fino, aludinte siajn interparolojn kun Arseno Lupeno, dufoje li haltis, distriĝema, sendecida.

Estis klare, ke alia penso obsedas lin. La prezidanto diris al li:

– Se vi malsanas, vu prefere interrompu vian ateston.

– Ne, ne, mi nur...

Li eksilentis, rigardis la akuziton longe, profunde, poste li diris:

– Mi petas la permeson pli proksime ekzameni la akuziton, tie estas mistero, kiun mi klarigu.

Li alproksimiĝis, konsideris lin ankoraŭ pli longe, per sia tuta koncentrita atento, poste li revenis al la pledbarilo. Kaj tiam, per iom solena tono li eldiris:

– Sinjoro Prezidanto, mi asertas, ke la viro estanta ĉi-tie, fronte al mi, ne estas Arseno Lupeno.

Silentegon estigis tiuj paroloj. La prezidanto, konsternite, unue, ekkriis:

– Ha! kion vi diras? Vi estas freneza!

La inspektoro kviete asertis:

– Unuavide, oni povas esti trompita de ia simileco, kiu fakte ekzistas, tion mi konfesas, sed unu sekundo da atento sufiĉas. La nazo, la buŝo, la haroj, la haŭtkoloro... resume: li ne estas Arseno Lupeno. Kaj la okuloj do! Ĉu li iam havis tiujn drinkulajn okulojn?

– Nu, nu, klarigu. Kion vi pretendas, atestanto?

– Mi ne scias! Li estus lokinta anstataŭ si kondamnotan kompatindulon. Krom se li estas komplico.

Krioj, ridoj, eksklamacioj disiris ĉiuflanken, en la ĉambro agitata de tiu neatenditaĵo. La prezidanto vokis la enketan juĝiston, la direktoron de La Sano, la gardistojn, kaj interrompis la aŭdiencon.

Je la rekomenco, S-ro Bouvier kaj la direktoro, ĉeeste de la akuzito, deklaris, ke estis inter Arseno Lupeno kaj tiu viro nur tre malpreciza simileco de trajtoj.

– Sed tiam, ekkriis la prezidanto, kiu estas tiu viro? De kie li venas? Kiel li troviĝas en la manoj de la justico?

Oni enkondukis ambaŭ gardistojn de La Sano. Miriga kontraŭdiro, ili rekonis la kaptiton, kiun ili laŭvice vaĉis!

La prezidanto malpeziĝe ekspiris.

Sed unu el la gardistoj aldonis:

– Jes, jes, mi kredas, ke li estas tiu.

– Kiel do, vi kredas?

– Damne! mi apenaŭ vidis lin. Oni lin liveris al mi vespere, kaj, de du monatoj, li ĉiam restas kuŝanta kontraŭ la muro.

– Sed antaŭ tiuj du monatoj?

– Ha! antaŭe, li ne okupis la ĉelon 24.

La malliberejestro precizigis tiun punkton:

– Ni transĉeligis la kaptiton post lia eskapa provo.

– Sed vi, sinjoro direktoro, ĉu vi vidis lin de du monatoj?

– Mi ne havis la okazon vidi lin... li tenis sin trankvila.

– Kaj ĉu tiu viro ne estas la kaptito, kiu estis konfidita al vi?

– Ne.

– Tiam, kiu li estas?

– Mi ne povus diri.

– Ni do ĉeestas substituon, kiu efektiviĝis antaŭ du monatoj. Kiel vi klarigas ĝin?

– Tio neblas.

– Do?

Sen alternativa solvo, la prezidanto turnis sin al la akuzito, kaj, per afabla voĉo:

– Nu, akuzito, ĉu vi povus klarigi al mi kiel kaj de kiam vi estas en la manoj de la justico?

Ŝajnis, ke tiu kompatema tono malarmis la malfidon aŭ stimulis la komprenon de la viro. Li provis respondi. Fine, lerte kaj milde pridemandite, li sukcesis arigi kelkajn frazojn, el kiuj rezultiĝis tio ĉi: du monatojn antaŭe, li estis kondukita al la Deponejo. Li pasigis tie unu nokton kaj unu matenon. Posedinte sumon de sepdek kvin centimoj, li estis liberigita. Sed, ĉar li trairis la korton, du gardistoj prenis lin je la brako, kaj kondukis lin ĝis la mallibereja veturilo. De tiam, li vivis en la ĉelo dudek kvar, ne malfeliĉa... tie oni bone manĝas... oni ne malbone dormas... Tial li ne protestis...

Ĉio tio aspektis verŝajna. Meze de ridoj kaj de granda efervesko, la prezidanto forsendis la aferon al alia sesio por enketa suplemento.

La enketo, unue, starigis tiun fakton enskribitan en la malliberiga registrolibro: ok semajnojn antaŭe, nomato Baudru Désiré tranoktis en la Deponejo. Liberigite la morgaŭon, li forlasis la Deponejon je la dua posttagmeze. Nu, tiun tagon, je la dua, pridemandite por la lasta fojo, Arseno Lupeno eliris el la enketado kaj denove foriris per mallibereja veturilo.

Ĉu la gardistoj faris eraron? Ĉu, trompite de la simileco, ili mem, pro momento da senatento, substituis tiun viron al sia kaptito? Ili vere estu montrintaj komplezon, kiun liajn servadajn etatojn ne ebligis supozi.

Ĉu la substituo estis antaŭplanita? Krom tio, ke la loka aranĝo igis la aferon preskaŭ nerealigebla, estis necese tiukaze, ke Baudru estu komplico, kaj ke li estu arestita kun la preciza celo anstataŭi Arsenon Lupenon. Sed tiam, per kiu miraklo tia plano, fondita nur sur serio da neverŝajnaj ŝancoj, da hazardaj renkontiĝoj kaj da fabelaj eraroj, povis sukcesi?

Oni pasigis Désiré Baudru en la antropometria sekcio: ne estis informa slipo kongruanta kun lia priskribo. Cetere oni facile trovis liajn spurojn. En Courbevoie, en Asnières, en Levallois, li estis konata. Li vivis de almozoj kaj dormis en unu el tiuj ĉifonistaj kabanoj, kiuj amasiĝas apud la pordo de la kvartalo de Ternes. De unu jaro, tamen, li malaperis.

Ĉu li estis dungita de Arseno Lupeno? Nenio permesis tion kredi. Kaj malgraŭe, oni ne sciis pli pri la fuĝo de la

malliberulo. La admirindaĵo restis sama. El la dudek hipotezoj, kiuj provis ĝin klarigi, neniuj estis kontentiga. La eskapo sola estis eksterduba, kaj eskapo nekomprenebla, impona, en kiu la publiko, samkiel la justico, sentis la klopodon de longa preparado, aron da agoj interplektitaj unu en la alia, kaj kies elnodiĝo pravigis la orgojlan antaŭdiron de Arseno Lupeno: “Mi ne ĉeestos mian proceson.”

Post unu monato da zorgaj priserĉoj, la enigmo sin prezentis kun la same malĉifrebla karaktero. Tamen oni ne povis senfine gardi tiun kompatindan Baudru. Lia proceso estus ridinda: kiajn ŝarĝojn oni havis kontraŭ li? Lia liberigo estis subskribita de la enketa juĝisto. Sed la Sekureca estro decidis starigi ĉirkaŭ li aktivan inspektadon.

La ideo devenis de Ganimardo. Laŭ lia vidpunkto, estis nek komplaceco, nek hazardo. Baudru estis instrumento, per kiu Arseno Lupeno ludis kun sia eksterordinara lerteco. Kiam Baudru estos libera, per li oni reiros ĝis Arseno Lupeno aŭ almenaŭ ĝis iu el lia bando.

Oni aldonis al Ganimardo ambaŭ inspektorojn Folenfant kaj Dieuzy, kaj, dum januara mateno, sub nebuleta vetero, la malliberejaj pordoj malfermiĝis antaŭ Baudru Désiré.

Li unue estis embarasita, kaj marŝis kiel viro, kiu ne havas tre precizajn ideojn pri sia tempouzo. Li laŭiris la straton de La Sano kaj la straton Saint-Jacques. Antaŭ la butiko de vestisto, li demetis siajn jakon kaj veŝton, vendis sian veŝton kontraŭ kelkaj moneroj, kaj, remetante sian jakon, foriris.

Li transiris Sejnon. Ĉe Châtelet, omnibuso preterpasis lin. Li volis eniri en ĝin. Ne plu estis libera loko. Ĉar la kontrolisto konsilis al li preni numeron, li eniris la atendejon.

Tiam, Ganimardo vokis siajn du agentojn apud li, kaj, ĉiam gvatante la oficejon, li diris al ili haste:

– Haltigu unu veturilon... ne, du, estas pli singarde. Mi iros kun unu el vi kaj ni sekvos lin.

La agentoj obeis. Baudru tamen ne aperis. Ganimardo antaŭeniris: estis neniuj en la atendejo.

– Stultulo mi estas, li flustris, mi forgesis la duan elirejon.

Efektive, la oficejo interkomunikas, per interna koridoro, kun tiu de la strato Saint-Martin. Ganimardo impetis. Li alvenis lastmomente por ekvidi Baudru sur la imperialo de la omnibuso Batignolles-Jardin des Plantes, kiu turniĝis ĉe la angulo de la strato Rivoli. Li kuris kaj reatingis la omnibuson. Sed li estis perdinta siajn du agentojn. Li estis sola por daŭrigi la postkuron.

En sia furiozo, li estis kaptonta lin ĉe la kolumo sen plia formalajo. Ĉu ne antaŭpensinte kaj per inĝenia ruzo, tiu laŭdira idioto estis disiginta lin disde liaj helpantoj?

Li rigardis Baudru. Li dormetis sur la benko kaj lia kapo balanciĝis dekstren kaj maldekstren. Kun buŝo iomete malfermita, lia vizaĝo havis nekredeblan esprimon de stulteco. Ne, li ja ne estis kontraŭulo kapabla superruzi la maljunan Ganimardon. Hazardo helpis lin, jen ĉio.

Ĉe la vojkruciĝo de la Galerioj Lafayette la viro saltis el la omnibuso en la tramon de Muette. Li sekvis la bulvardon

Hausmann, la avenueo Viktoro Hugo. Baudru eltramiĝis nur antaŭ la stacio de Murette. Kaj maldiligentpaŝe, li profundigis en la arbaron de Bulonjo.

Li pasis de aleo al alia, paŝis returne, malproksimiĝis. Kion li serĉis? Ĉu li havis celon?

Post unu horo da tiu intrigo, li ŝajnis elĉerpita pro laceco. Tial, vidinte benkon, li eksidis. La loko, situanta proksime al Auteuil, rande de eta lago kaŝita inter arboj, estis absolute senhoma. Duonhoro pasis. Senpacienca, Ganimardo decidis ekkonversacii.

Li do alproksimiĝis kaj instaligis apud Baudru. Li ekbruligis cigaredon, desegnis rondojn sur la sablo per la fino de sia lambastono, kaj diris:

– Ne estas varme.

Silento. Kaj subite, en tiu silento, ekridego eksplodis, sed rido ĝoja, feliĉa, rido de infano trafita de nekontrolata ridego, kaj kiu ne povas malhelpi sin ridi. Klare, reale, Ganimardo sentis siajn harojn hirtiĝi sur la haŭto suprenlevita de lia kranio. Tiu rido, tiu infera rido, kiun li tiom bone konis!...

Per abrupta gesto, li ekkaptis la viron ĉe la ornamaĵoj de lia jako kaj rigardis lin, profunde, furioze, eĉ pli bone ol li rigardis lin en la juĝejo, kaj verdire li ne plu estis la viro, kiun li vidis. Li estis la viro, sed samtempe li estis la alia, la vera.

Helpata de komplica volo, li retrovis la ardan vivon de liaj okuloj, li kompletigis la malgrasigitan maskon, li ekvidis la realan karnon sub la difektita epidermo, la realan buŝon tra la

grimaco, kiu misformis ĝin. Kaj tio estis la okuloj de la alia, la buŝo de la alia, tio estis ĉefe lia vizaĝesprimo sagaca, viva, moka, sprita, tiom klara kaj tiom juna.

– Arseno Lupeno, Arseno Lupeno, li balbutis.

Kaj subite, frapite de furiozo, ĉirkaŭpremante al li la gorĝon, li provis renversi lin. Malgraŭ siaj kvindek jaroj, li estis ankoraŭ neordinare vigla, dum lia kontraŭulo ŝajnis iom malbonfarta. Kaj poste, kia majstropafo se li sukcesus rekonduki lin!

La lukto estis mallonga. Arseno Lupeno apenaŭ defendis sin, kaj, tiel rapide kiel li estis atakinta, Ganimardo kapitulacis. Lia brako pendis, senmova, rigidiĝinta.

– Se oni lernus al vi ĵuĵicuon ĉe la kajo de Orfèvres, deklaris Lupeno, vi scius, ke tiu tekniko nomiĝas ude-hiŝigi en la japana.

Kaj li aldonis malvarme:

– Unu plian sekundon, mi rompus vian brakon, kaj vi trafus nur tion, kion vi meritas. Kiel, vi, malnova amiko kiun mi estimas, antaŭ kiu mi spontanee senvualigas mian inkognitecon, vi trouzas mian fidon! Tio estas malbona... Nu! kio do okazas al vi?

Ganimard silentis. Rilate tiu eskapo, pri kiu li taksis sin kulpa, ĉu ne li, kiu per sia sensacia depozicio, erarigis la justicon? Tiu eskapo ŝajnis al li la honto de lia kariero. Larmo rulfalis al lia griza liphararo.

– He! Dio mia, Ganimardo, ne maltrankviliĝu: se vi ne estus parolinta, mi estus manovrinta por ke aliulo parolu. Nu,

ĉu mi povis akcepti, ke oni kondamnas Baudru Désiré?

– Do, murmuris Ganimardo, estis vi, kiu estis tie! Estas vi, kiu estas ĉi tie!

– Mi, ĉiam mi, nur mi.

– Ĉu tio eblas?

– Ho! Ne necesas esti sorĉisto. Sufiĉas, kiel diris tiu brava prezidanto, sin prepari dum jardeko por esti preta je ĉiuj eventualaĵoj.

– Sed via vizaĝo? Viaj okuloj?

– Vi ja komprenas, ke se mi laboris dek ok monatojn en Saint-Louis kun doktoro Altier, tio ne estas pro amo de la arto. Mi pensis, ke tiu kiu iam havus la honoron nomiĝi Arseno Lupeno devus liberiĝi de la ordinaraj leĝoj pri aspekto kaj identeco. Aspekto? Sed oni modifas ĝin laŭvole. Tia hipoderma injekto de parafino ŝveligas al vi la haŭton, ĝuste en la elektita loko. Pirogajlolo transformas vin en Ruĝhaŭtulon. La suko de kelidonio ornamas vin per plej efikaj dartroj kaj tumoroj. Tia kemia procedo agas sur la kreskadon de via barbo kaj viaj haroj, tia alia sur la sonon de via voĉo. Ni aldonu al tio du monatojn da dieto en la ĉelo 24, milfoje ripetitajn ekzercojn por malfermi mian buŝon laŭ tiu ridgrimaco, por teni mian kapon laŭ tiu klinangulo kaj mian dorson laŭ tiu kurbo. Fine kvin gutoj da atropino en la okulojn por igi ilin konfuzaj kaj evitemaj, kaj la afero pretas.

– Mi ne povas imagi, ke la gardistoj...

– La metamorfozo estis grada. Ili ne povis rimarki la ĉiutagan evoluon.

– Sed Baudru Désiré?

– Baudru ekzistas. Li estas kompatinda senkulpulo, kiun mi renkontis la pasintan jaron, kaj kiu ja prezentas iun trajtan similecon kun mi. Anticipe al aresto ĉiam ebla, mi metis lin en sekuran lokon, kaj mi diligentis por unue distingi la malsimilecajn punktojn, kiuj apartigis nin, por plejeble malpliigi ilin en mi. Miaj amikoj tranoktigis lin en la Deponejo, tiel ke li eliru proksimume je la sama horo kiel mi, kaj ke la koincido estu facile konstatebla. Ĉar, notu tion, necesis ke oni trovu la spuron de lia paso, alie la justico estus demandinta sin, kiu mi estas. Danke al la ofero de tiu bonega Baudru, estis neeviteble, vi aŭdas, neeviteble, ke ĝi eksaltus sur lin, kaj ke malgraŭ la nesupereblaj malfacilaĵoj de substituo, ĝi preferus kredi pri substituo ol konfesi sian nescion.

– Jes, jes, efektive, flustris Ganimardo.

– Kaj poste, ekkriis Arseno Lupeno, mi havis en la manoj mirindan atuton, karton konceptitan de mi dekomence: la atento de mia eskapo, en kiu ĉiuj estis. Kaj jen la ĉefa eraro, kien vi enfalis, vi kaj la aliaj, en tiu pasiiga partio, kiun la justico kaj mi komencis, kaj kies veto estis mia libereco: vi supozis ankoraŭfoje, ke mi agas pro fanfaronado, ke mi estas ekzaltita de miaj sukcesoj kiel flavbekulo. Mi, Arseno Lupeno, tian malfortaĵon! Kaj ne pli ol en la afero Kahorno vi pensis: “Se Arseno Lupeno distrumpetas ke li eskapos, tio signifas ke li havas kialojn por tion trumpeti.” Sed, fulmotondro, komprenu do, ke por ke mi eskapu... sen eskapi, necesus ke oni antaŭkreditu pri tiu eskapo, ke tio estu firma fido, absoluta

konvinko, vero klara kiel la suno. Kaj tio estiĝis, laŭ mia volo. Arseno Lupeno eskapos, Arseno Lupeno ne ĉeestos sian proceson. Kaj kiam vi ekstaris por diri: “Tiu viro ne estas Arseno Lupeno”, estus supernature ke ĉiuj ne tuj kredus ke mi ne estas Arseno Lupeno. Se nur unu persono estus dubinta, nur unu estus eldirinta tiun simplan rimarkon: “Kaj se li estus Arseno Lupeno?”, ĝuste tiam mi estintus perdita. Oni nur kliniĝus al mi, ne kun la ideo ke mi ne estus Arseno Lupeno, kiel vi kaj la aliaj faris, sed kun la ideo ke mi povus esti Arseno Lupeno, kaj malgraŭ ĉiuj miaj singardoj, oni rekonus min. Sed mi estis trankvila. Logike, psikologie, neniuj povus havi tiun simplan etan ideon.

Li subite kaptis la manon de Ganimardo.

– Nu, Ganimardo, konfesu, ke ok tagojn post nia interparolo en la malliberejo La Sano, vi atendis min je la kvara, ĉe vi, kiel mi petis al vi.

– Kaj via mallibereja veturilo? diris Ganimardo evitante respondi.

– Blufo! Miaj amikoj modifis kaj substituis tiun malnovan nefunkciantan veturilon, kaj ili volis provi ion. Sed mi sciis tiun planon neefektivebla sen escepta cirkonstancaro. Tamen, mi trovis utile fajli tiun eskapan provon kaj doni al ĝi la plej grandan reklamon. Unua eskapo aŭdace konceptita donos al la dua la valoron de anticipe realigita eskapo.

– Tial la cigaro...

– Kavigita de mi, samkiel la tranĉilo.

– Kaj la biletoj?

– Skribitaj de mi.

– Kaj la mistero korespondantino?

– Ŝi kaj mi estas nur unu persono. Mi scipovas ĉiajn manskribojn laŭvole.

Ganimardo pripensis dum momento kaj obĵetis:

– Kiel eblas, ke en la antropometria sekcio, kiam oni prenis la slipon de Baudru, oni ne eksciis, ke ĝi kongruis kun tiu de Arseno Lupeno?

– La slipo de Arseno Lupeno ne ekzistas.

– Nu do!

– Aŭ almenaŭ ĝi estas falsa. Tiun punkton mi multe studis. La sistemo Bertillon enhavas unue la vidan informon – kaj vi vidas, ke ĝi ne estas senerara – kaj poste, la mezuran informon, mezurojn de la kapo, de la fingroj, de la oreloj, ktp. Tie, kontraŭe, nenio fareblas.

– Do?

– Do, necesis pagi. Eĉ antaŭ mia reveno de Usono, unu el la servaj dungitoj akceptis tiom por enskribi falsan mezuron je la komenco de mia mezurado. Tio sufiĉas, por ke la tuta sistemo deĵiĝu, kaj ke slipo direktiĝu al fako tute kontraŭa al tiu celita. La slipo Baudru do ne devis kongrui kun tiu de Arseno Lupeno.

Ankoraŭ estis silento, poste Ganimardo demandis:

– Kaj nun, kion vi faros?

– Nun, ekkriis Lupeno, mi ripozos, sekvos supernutran dieton kaj iom post iom reîĝos mi. Estis interesege esti Baudru au tiu alia, ŝanĝi sian personecon kiel ĉemizon kaj elekti sian aspekton, sian voĉon, sian rigardon, sian skribon. Sed okazas, ke oni ne plu rekonas sin en ĉio ĉi, kaj tio estas ege malgaja. Nuntempe, mi sentas tion, kion devis senti la viro, kiu perdis sian ombron. Mi serĉos min... kaj retrovos min.

Li promenis tien kaj reen. Iom da mallumo miksiĝis kun la taglumo. Li haltis antaŭ Ganimardo.

– Mi pensas, ke ni havas nenion plian por interparoli, ĉu?

– Jes, respondis la inspektoro, mi dezirus scii ĉu vi rivelos la veron pri via eskapo... La eraron, kiun mi faris...

– Ho! neniuj iam scios, ke estas Arseno Lupeno, kiu estis liberigita. Mi havas tro da intereso akumuli ĉirkaŭ mi la plej misterajn mallumojn por ne lasi al tiu eskapo ĝian karakteron preskaŭ miraklan. Tial, nenion timu, mia bona amiko, kaj adiaŭ. Hodiaŭ, mi vespermanĝos enurbe, kaj mi havas tempon nur por vesti min.

– Mi kredis vin tiel avida pri ripozo!

– Ve! estas mondumaj devigoj, kiujn oni ne povas eviti. La ripozo komenciĝos morgaŭ.

– Kaj kie do vi vespermanĝos?

– En la anglia ambasadejo.

La mistera vojaĝanto

La antaŭan tagon, mi sendis mian aŭtomobilon al Rueno laŭ la ŝoseo. Mi devis rekuniĝi kun ĝi per trajne, kaj, de tie, viziti amikojn kiuj loĝas ĉe la bordoj de Sejno.

Nu, en Parizo, kelkajn minutojn antaŭ la foriro, sep sinjoroj invadis mian kupeon; kvin el ili fumis. Kiel ajn mallonga estas la veturado per rapidtrajno, la perspektivo ĝin fari kun tia akompanantaro estis malagraba al mi, des pli ke la vagono, de malnova modelo, ne havis koridoron. Mi do prenis mian surtuton, miajn gazetojn, mian indikilon, kaj rifuĝis en unu el la apudaj kupeoj.

SinJORINO tie troviĝis. Ekvidante min, ŝi faris geston de ĉagreno, kiun mi ne pretervidis, kaj ŝi kliniĝis al sinjoro staranta sur la ŝtupareto, sia edzo kredeble, kiu estis akompaninta ŝin al la stacidomo. La sinjoro observis min, kaj la ekzameno probable finiĝis avantaĝe al mi, ĉar li mallaŭte parolis al sia edzino, ridetante, kun mieno per kiu oni trankviligas timantan infanon. Ŝi ridetis siavice, kaj alrigardis min amike, kvazaŭ ŝi subite komprenus, ke mi estas unu el tiuj galantuloj, kun kiuj virino povas resti enfermita dum du horoj, en eta skatolo ses kvadrاتفutojn granda, sen io ajn timinda.

Lia edzo diris al ŝi:

– Ne rankoru kontraŭ mi, karulino mia, sed mi havas urĝan rendevuon, kaj mi ne povas atendi.

Li kisis ŝin tenere, kaj foriris. Lia edzino sendis al li tra la fenesto diskretajn kisetajn, kaj svingis sian poŝtukon.

Tiam sonoris fajfilo. La trajno ekmoviĝis.

Je tiu preciza momento, kaj malgraŭ la protestoj de la trajnlaboristoj, la pordo malfermiĝis kaj viro subite eniris en nian kupeon. Mia kunulino, kiu tiam staris kaj ordigis siajn aferojn laŭlonge de la reto, ekkriis pro teruro kaj falis sur la benkon.

Mi ne estas timema, tute male, sed mi konfesas, ke tiuj lastmomentaj entrudiĝoj estas ĉiam tedaj. Ili ŝajnas ambiguaj, malmulte naturaj. Kredeble teksigis io suspektinda, se ne...

Tamen, la aspekto kaj la sinteno de la ĵus alveninto pli volonte moderigus la malbonan impreson kaŭzitan de ŝia ago. Dececon, preskaŭ elegantecon, bongustan kravaton, purajn gantojn, energian vizaĝon... Sed, cetere, kie diable mi vidis tiun vizaĝon? Ĉar neniue dubo eblis, mi jam vidis lin. Almenaŭ, pli ekzakte, mi retrovis en mi tian rememoron, kian lasas la vido de portreto plurfoje ekvidita, kaj kies originalon oni neniam kontemplis. Kaj, samtempe, mi sentis la senutilecon de ĉiu memora klopodo, tiom senenhava kaj neklara estis tiu rememoro.

Sed, devove direktinte mian atenton al la virino, mi estis konsternita pro ŝia paleco kaj la ŝangiĝo de ŝiaj trajtoj. Ŝi rigardis sian najbaron – ili sidis ĉe la sama flanko – kun vizaĝesprimo de vera timego, kaj mi konstatis, ke unu el ŝiaj

manoj, tute tremanta, alglitis al eta vojaĝsako kuŝanta surbenke dudek centimetrojn for de ŝiaj genuoj. Ŝi fine ekkaptis ĝin kaj nervoze premis ĝin kontraŭ si.

Niaj okuloj renkontiĝis, kaj mi legis en ŝiaj tiom da ĝenateco kaj anksio, ke mi ne povis malhelpi min diri al ŝi:

– Ĉu vi estas suferanta, sinjorino?... Ĉu mi malfermu tiun fenestron?

Ne respondante, ŝi almontri al mi la ulon per timema gesto. Mi ridetis, kiel faris ŝia edzino, ŝultrolevis kaj klarigis al ŝi per signoj, ke ŝi nenion timu, ke mi estas tie, kaj cetere ke tiu sinjoro ŝajnas ja sendanĝera.

Tiumomente, li turniĝis al ni unu post la alia, konsideris nin de piedoj ĝis kapo, poste reprofundiĝis en sia angulo kaj ne plu moviĝis.

Estis silento, sed la virino, kvazaŭ ŝi estus kolektinta sian tutan energion por plenumi senesperan agon, diris al mi per apenaŭ komprenebla voĉo:

– Ĉu vi scias, ke li estas en nia trajno?

– Kiu?

– Sed li... li... mi certigas al vi.

– Kiu, li?

– Arseno Lupeno!

Ŝi ne deturnis la rigardon de la vojaĝanto, kaj al li prefere al mi ŝi ĵetis la silabojn de tiu malkvietiga nomo.

Li mallevis sian ĉapelon sur sian nazon. Ĉu tio estis por maski sian perturbon, aŭ simple, ĉu li prepariĝis al dormo?

Mi obĵetis tion:

– Arseno Lupeno estis kondamnita hieraŭ, kontumace, al dudek jaroj da devigata laboro. Do malmulte probablas, ke li hodiaŭ nesingarde aperus publike. Krome, ĉu la ĝazetoj ne raportis lian ĉeeston en Turkio, tiun vintron, de lia fama eskapo el La Sano?

– Li troviĝas en tiu trajno, ripetis la virino, kun la pli kaj pli forta intenco esti aŭdita de nia kunulo. Mia edzo estas vicedirektoro de la malliberejaj servoj, kaj la stacidoma komisaro mem diris al ni, ke oni serĉas Arsenon Lupenon.

– Tio ne estas kialo...

– Oni renkontis lin en la centra halo. Li prenis unuaklasan bileton al Rueno

– Estis facile kapti lin.

– Li malaperis. La kontrolisto, ĉe la enirejo de la atendejoj, ne vidis lin, sed oni supozis, ke li pasis tra la antaŭurbaj kajoj, kaj ke li eniris la ekspreson, kiu foriris dek minutojn post ni.

– Tiukaze, tie oni lin estos kaptinta.

– Kaj se, lastmomente, li saltis el tiu ekspreso por veni tien, en nian trajnon... kiel probable... kiel certe, ĉu?

– Tiukaze, tie li estos kaptita. Ĉar la dungitoj kaj la agentoj senmanke estos vidintaj tiun pason de trajno al alia, kaj, kiam ni alvenos en Ruenon, oni kaptos lin tute nete.

– Lin, neniam! Li trovos rimedon por denove eskapi.

– Tiukaze, mi deziras al li bonan vojaĝon.

– Sed ĝis tiam, ĉio kion li povas fari...

– Kion?

– Mi ne scias. Oni ĉion atendu de li.

Ŝi estis tre agitata, kaj verdire la situacio pravigis ĝis certa grado tiun nervosan ekscitiĝon.

Preskaŭ malgraŭ mi, mi diris al ŝi:

– Estas efektive kuriozaj koincidoj... Sed tranviliĝu. Se eventuale Arseno Lupeno estas en unu el tiuj vagonoj, li diskrete restos tie, kaj, prefere ol altiri al si novajn malagrablaĵojn, li nur deziros eviti la danĝeron kiu minacas lin.

Miaj paroloj tute ne trankviligis ŝin. Tamen ŝi silentis, verŝajne timante esti sentakta.

Miaflanke, mi malfaldis miajn gazetojn kaj legis la raportojn pri la proceso de Arseno Lupeno. Ĉar ili enhavis nenion, kion oni jam sciis, ili nur mezaĉe interesis min. Krome, mi estis laca, mi malbone estis dorminta, mi sentis miajn palpebrojn peziĝi kaj mian kapon kliniĝi.

– Sed, sinjoro, vi ja ne dormos.

La virino eltiris miajn gazetojn kaj rigardis min indigne.

– Evidente ne, mi respondis, mi tute ne emas.

– Tio estus pleje malsaĝa, ŝi diris al mi.

– Pleje, mi ripetis.

Kaj mi energie luktis, alkroĉiĝante al la pejzaĝo, al la nuboj kiuj striis la ĉielon. Kaj baldaŭ ĉio tio malklariĝis en la spaco, la bildo de la agitata sinjorino kaj de la dormanta sinjoro forvelkis en mia spirito, kaj ekestis en mi la granda, la profunda silento de dormo.

Aeraj kaj malpezaj sonĝoj baldaŭ beligis ĝin. Estulo, kiu ludis la rolon kaj havis la nomon Arseno Lupeno, okupis iun partoprenon en ĝi. Li moviĝis ĉe la horizonto, kun la dorso ŝarĝita per grandvaloraj objektoj, trapasis murojn kaj malmeblis kastelojn.

Sed la silueto de tiu estulo, kiu cetere ne plu estis Arseno Lupeno, preciziĝis. Li venis al mi, iĝis pli kaj pli granda, saltis en la vagonon kun nekredebla lerteco, kaj falis plenmeze de mia brusto.

Akra doloro... ŝira krio. Mi vekiĝis. La viro, la vojaĝanto, kun genuo sur mia brusto, premis mian gorĝon.

Mi vidis tion tre malklare, ĉar miaj okuloj sange ruĝis. Mi ankaŭ vidis la virinon, kiu konvulsiis en angulo trafite de nerva kolapso. Mi eĉ ne provis rezisti. Cetere, mi ne estus havinta sufiĉan forton: miaj tempioj zumis, mi sufokiĝis... mi stertoris... Ankoraŭ unu minuton... kaj estis asfiksio.

La viro kredeble sentis tion. Li malstriktegis sian premon. Ne flankenirante, per la dekstra mano, li streĉis ŝnuron ĉe kiu li estis preparinta glitnodon, kaj, per seka gesto, li ligis al mi ambaŭ pojnojn. Fulmorapide, mi estis ŝnurita, buŝoŝtopilita, senmovigita.

Kaj li plenumis tiun laboron plej nature, kun facileco en kiu montriĝis la scio de majstro, de profesiulo pri ŝtelo kaj krimo. Ne unu vorton, ne unu febran movon. Memregadon kaj aŭdacon. Kaj mi estis tie, sur la benko, ĉirkaŭligita kiel mumio, mi, Arseno Lupeno!

Verdire, estis ridinde. Kaj, malgraŭ la gravecon de la cirkonstancoj, mi ne estis sen aprezi ĉion ironian kaj frandan, kion la situacio enhavis. Arseno Lupeno trompita kiel novulo! prirabita kiel la unua alveninto – ĉar, kompreneble, la bandito malpezigis min je miaj monujo kaj paperujo! Arseno Lupeno, siavice viktimo, priruzita, venkita... Kia aventuro!

Restis la virino. Li eĉ ne atentis ŝin. Li nur prenis la saketon, kiu kuŝis sur la tapiŝo kaj eltiris el ĝi la juvelojn, monujon, orajn kaj arĝentajn objektojn, kiujn ĝi enhavis. La virino malfermis okulon, ekstremis pro hororo, demetis siajn ringojn kaj prezentis ilin al la viro kvazaŭ ŝi volus ŝparigi al li

ĉiun senutilan klopodon. Li prenis la ringojn kaj rigardis ŝin: ŝi svenis.

Tiam, daŭre silenta kaj trankvila, ne plu zorgante pri ni, li reiris al sia sidloko, ekbruligis cigaredon kaj komencis fundan ekzamenon de la trezoroj kiujn li konkeris, ekzamenon kiu ŝajnis plene kontentigi lin.

Mi estis multe malpli kontenta. Mi ne parolas pri la dek du mil frankoj kiujn oni maljuste priŝtelis al mi: tio estis damaĝo kiun mi nur provizore akceptis kaj mi ja intencis, ke tiuj dek du mil frankoj revenu en mian posedaĵon plejeble rapide, samkiel la ege gravaj dokumentoj kiujn entenis mia paperujo: projektoj, prezopropoj, adresoj, listoj da korespondantoj, kompromitaj leteroj. Sed, en la nuna momento, pli tuja kaj pli serioza zorgo min maltrankviligis:

Kio okazos?

Kiel oni ja pensas, la agitadon kaŭzitan de mia paso tra la stacidomo Saint-Lazare mi ne preteratentis. Invitite ĉe amikoj, kiujn mi frekventis sub la nomo Vilhelmo Berlat, kaj por kiuj mia simileco kun Arseno Lupeno estis temo de teneraj ŝercoj, mi ne povis min ŝminki laŭvole, kaj mia ĉeesto estis sciigita. Krome, oni vidis viron impetantan el la ekspreso al la rapidtrajno. Kiu estis tiu viro, se ne Arseno Lupeno? Do, neeviteble, fatale, la polica komisaro de Rueno, avertite per telegramo, kaj helpate de respektinda nombro da agentoj, troviĝus ĉe la alveno de la trajno, pridemandus la suspektindajn vojaĝantojn, kaj procedus pri detala inspektado de la vagonoj.

Ĉion tion mi antaŭvidis, kaj mi ne multe emociis pri tio, certa ke la polico de Rueno ne estus pli sagaca ol tiu de Parizo, kaj ke mi ja scius resti nerimarkita – ĉu ne sufiĉus al mi, je la

eliro, neglekteme montri mian karton de deputito, danke al kiu mi jam inspiris plenan fidon al la kontrolisto de Saint-Lazare? Sed kiom la aferoj ŝanĝis! Mi ne plu estis libera. Neeblis provi unu el miaj kutimaj agoj. En unu el la vagonoj, la komisaro malkovrus la sinjoron Arseno Lupeno, kiun favora hazardo sendis al li kun piedoj kaj poĵoj ligitaj, obeeman kiel ŝafido, pakitan, tute pretigitan. Li nur prenu la liveraĵon, kiel oni ricevas poŝtaĵon adresitan en stacidomo, keston da ĉasaĵo aŭ korbon da fruktoj kaj legomoj.

Kaj por eviti tiun malplezurigan elnodiĝon, kion mi povis, ĉirkaŭŝpinite en miaj ŝnuretoj?

Kaj la rapidtrajno galopis al Rueno, unika kaj venonta stacio, fulme trairante Vernon, Saint-Pierre.

Scivoligis min alia problemo, kiu malpli rekte koncernis min, sed kies solvo vekis mian profesiulan interesigon. Kiaj estis la intencoj de mia kunulo?

Se mi estus sola, li havus la tempon, en Rueno, eltrajniĝi tute trankvile. Sed pri la virino? Apenaŭ la pordo estos malfermita, la virino nuntempe tiel kvieta kal humila, krios, baraktos, vokos helpon!

Kaj pro tio mi miris! Kial li ne reduktis ŝin al la sama senpoveco kiel mi, kio donus al li la tempon por malaperi antaŭ ol oni ekrimarkus lian duoblan krimon?

Li plu fumis, kun okuloj fiksitaj al la loko, kiun hezitema pluvo ekstriis per grandaj oblikvaj linioj. Unu fojon tamen li sin deturnis, ekprenis mian indikilon kaj konsultis ĝin.

La virino, siaflanke, klopodis resti sveninta, por trankviligi sian malamikon. Sed tusatakoj kaŭzitaj de la fumo malkonfirmis tiun svenon.

Koncerne min, mi estis tre malkomforta, kaj havis fortajn muskoldolorojn. Kaj mi pripensis... mi kombinis...

Pont-de-l'Arche, Oissel... La rapidtrajno hastis, ĝoja, ebria pro rapideco.

Saint-Étienne... Je tiu momento, la viro ekstaris, kaj faris du paŝojn al ni, al kio la virino tuj respondis per nova krio kaj per nesimulita sveno.

Sed kiu estis lia celo? Li mallevis la glacon je nia flanko. La pluvo nun falis kolere, kaj lia gesto signis la embarason, kiun li sentis havante nek pluvombrelon nek surtuton. Li ĵetis rigardon al la reto: la manĝeto de la virino tie troviĝis. Li prenis ĝin. Li ankaŭ prenis mian surtuton kaj surmetis ĝin.

Ni estis transirantaj Sejnon. Li kuspis la malsupron de sia pantalono, poste kliniĝante, li levis la eksteran klinkon.

Ĉu li sin ĵetos sur la vojon? Je tiu rapideco, tio estus certa morto. Ni eniĝis en la tunelon boritan sub la monteto Sainte-Catherine. La viro malfermetis la pordon kaj, per la piedo, palpis la unuan ŝtupon. Kia frenezo! Mallumo, fumo, bruego, ĉio ĉi donis al tia provo fantastan ŝajnon. Sed, subite, la trajno malakcelis, la bremsoj Westinghouse kontraŭis la forton de la radoj. En unu minuto la rapido normaligis, kaj plue malpliiĝis. Sendube firmigadaj laboroj estis projektitaj en tiu parto de la tunelo, kiuj necesos malrapidan pason de la trajnoj, eble ekde kelkaj tagoj, kaj la viro tion sciis.

Li do bezonis nur meti la alian piedon sur la ŝtupon, malsupreniri sur la duan kaj pace foriri, ja antaŭe repuŝinte la klinkon kaj referminte la pordon.

Apenaŭ li malaperis, taglumo heligis la pli blankan fumon. Ni alvenis en valon. Ankoraŭ unu tunelo kaj ni estis en Rueno.

La virino tuj rekonsciiĝis kaj ŝia unua zorgo estis lamenti pri la perdo de siaj juveloj. Mi petegis ŝin per la okuloj. Ŝi komprenis kaj liberigis min el la buŝoŝtopilo kiu sufokis min. Ŝi ankaŭ volis malnodi mian ligilojn, sed mi malhelpis ŝin.

– Ne, ne, necesas ke la polico vidu la aferoj tiel. Mi deziras, ke ĝi estu sciigita pri tiu kanajlo.

– Kaj se mi sonorigus la alarmilon?

– Tro malfrue, necesis pensi pri tio dum li atakis min.

– Sed li estus mortiginta min! Ha! sinjoro, mi ja diris al vi, ke li vojaĝas en tiu trajno! Mi tuj rekonis lin, laŭ lia portreto. Kaj jen li foriris kun miaj juveloj.

– Oni retrovos lin, ne timu.

– Retrovi Arsenon Lupenon! Neniam.

– Tio dependas de vi, sinjorino. Aŭskultu. Tuj de la alveno, estu ĉe la pordo, kaj voku, faru bruon. Agentoj kaj dungitoj alvenos. Tiam rakontu, kion vi vidis, per kelkaj vortoj la agreson, kies viktimo mi estis, kaj la fuĝo de Arseno Lupeno,

donu lian priskribon, molfeltan ĉapelon, pluvombrelon – la vian – grizan surtuton kun talio.

– La vian, ŝi diris.

– Kiel do la mian? Ne, ne, la lian. Mi ne havis.

– Ŝajnis al mi, ke ankaŭ li ne havis kiam li entrajniĝis.

– Jes, jes... krom se ĝi estas vestaĵo forgesita en la reto. Ĉiuokaze, li surhavis ĝin kiam li eltrajniĝis, kaj tio estas la ĉefa afero... grizan surtuton, kun talio, memoru... Ha! mi forgesis... diru vian nomon, tuj de komenco. La ofico de via edzo spronos la diligentecon de ĉiuj tiuj homoj.

Ni alvenis. Ŝi jam kliniĝis el la pordo. Mi daŭrigis per iom laŭta voĉo, preskaŭ ordonema, por ke miaj paroloj bone gravuriĝu en ŝia cerbo:

– Ankaŭ diru mian nomon, Vilhelmo Berlat. Laŭbezone, diru ke vi konas min... Tio ŝparigos al ni tempon... Necesas, ke oni plej rapide malembarasiĝu je la antaŭenketon... La plej grava afero estas la postĉasado de Arseno Lupeno... viaj juveloj... Ne estas eraro, ĉu ne? Vilhelmo Berlat, amiko de via edzo.

– Konsentite... Vilhelmo Berlat.

Si jam vokis kaj gestadis. La trajno ankoraŭ ne estis haltinta, kiam sinjoro envagoniĝis, sekvate de pluraj viroj. Batis la kriza horo.

Anhelante, la virino ekkriis:

– Arseno Lupeno... li atakis nin... li ŝtelis miajn juvelojn... Mi estas sinjorino Renaud... mia edzo estas vicdirektoro de la malliberejaj servoj... Ha! jen ĝuste mia frato, Georgo Ardelle, direktoro de Crédit Rouennais... vi devas scii...

Ŝi brakumis junulon, kiu ĵus kuniĝis al ni, kaj kiun la komisaro salutis, kaj ŝi daŭrigis, plorante:

– Jes, Arseno Lupeno... dum sinjoro dormis, li ĵetiĝis al lia gorĝo... Sinjoro Berlat, amiko de mia edzo.

La komisaro demandis:

– Sed kie li estas, Arseno Lupeno?

– Li saltis el la trajno sub la tunelo, post Sejno.

– Ĉu vi certas, ke temis pri li?

– Se mi certas! Mi perfekte rekonis lin. Cetere oni lin vidis en la stacidomo Saint-Lazare. Li surhavis molfeltan ĉapelon...

– Ne... ĉapelon el malmola felto, kiel tiun ĉi, korektis la komisaro montrante mian ĉapelon.

– Molfeltan ĉapelon, mi asertas tion, ripetis S-ino Renaud, kaj grizan surtuton kun talio.

– Efektive, flustris la komisaro, la telegramo raportis tiun grizan surtuton kun talio kaj kolumo el nigra veluro.

– Kun kolumo el nigra veluro, ĝuste, ekkriis S-ino Renaud triumfe.

Mi malpeziĝe elspiris. Ha! kian komplezan, bonegan amikinon mi havis tie!

La agentoj tamen senigis min je miaj malhelpaĵoj. Mi violente mordis al mi la lipojn, sango elfluis. Fleksiĝinte, kun poŝtuko sur la buso, kiel farus homo, kiu longe restis en nekomforta pozicio, kaj kiu havas ĉevizage la sangan postsignon de la buŝoŝtopilo, mi diris al la komisaro, per malfortiĝinta voĉo:

– Sinjoro, li estis Arseno Lupeno, estas sendube... Diligentante oni reatingos lin... Mi kredas, ke mi povas iel utili al vi...

La vagono, kiu devis servi al la konstatoj de la justico, estis disligita. La trajno plu veturis al Havro. Oni kondukis nin al la oficejo de la staciestro, tra amaso da scivolemuloj, kiu obstrukcis la kajon.

Tiumomente, trafis min hezito. Pro ajna preteksto, mi povis malproksimiĝi, retrovi mian aŭtomobilon kaj forŝteliri. Atendi estis danĝere. Se incidento okazus, se depeŝo ekvenus el Parizo, tiam mi estus perdita.

Jes, sed pri mia ŝtelisto? Forlasite je miaj propraj rimedoj, en regiono kiun mi ne tre bone konis, mi ne esperu reatingi lin.

“Ba! provu tion, mi pensis, kaj restu. La partio estas malfacile gajnebla, sed tiom amuze ludinda! Kaj la veto valoras la penon.”

Kaj ĉar oni petis de ni provizore renovigi niajn depoziciojn, mi ekkriis:

– Sinjoro komisaro, nuntempe Arseno Lupeno preterdistancas nin. Mia aŭtomobilo atendas min en la korto. Se vi bonvolas fari al mi la komplezon eniri ĝin, ni provus...

La komisaro ridetis kun idiota mieno:

– La ideo ne estas malbona... eĉ tiom malmulte malbona, ke ĝi estas ekzekuciota.

– Ha!

– Jes, sinjoro, du el miaj agentoj foriris bicikle... jam de kelka tempo.

– Sed kie?

– Je la eliro mem de la tunelo. Tie, ili kolektos la indicojn, la atestojn, kaj sekvos la spuron de Arseno Lupeno.

Mi ne povis malhelpi min ŝultrolevi.

– Viaj du agentoj kolektoj nek indicon nek ateston.

– Ĉu vere?

– Arseno Lupeno estos manovrinta, por ke neniu vidu lin eliri la tunelon. Li estos atinginta la unuan vojon kaj, de tie...

– Kaj de tie, al Rueno, kie ni kaptos lin.

– Li ne iros al Rueno.

– Tiam, li restos en la ĉirkaŭaĵo kie ni ankoraŭ pli certas...

– Li ne restos en la ĉirkaŭaĵo.

– Ho! ho! Kaj kie do li sin kaŝos?

Mi elpoŝigis mian horloĝon.

– Je la nuna horo, Arseno Lupeno vagaĉas ĉirkaŭ la stacidomo de Darnétal. Je la deka kaj kvindek, tio estas post dudek du minutoj, li prenos la trajnon kondukantan de Rueno, ĉe la Norda stacidomo, al Amiens.

– Ĉu vi kredas? Kaj kiel vi scias tion?

– Ho! tio ja estas simpla. En la kupeo, Arseno Lupeno konsultis mian indikilon. Pro kiu kialo? Ĉu estis, ne malproksime de la loko kie li malaperis, alia linio, stacidomo sur tiu linio, kaj trajno haltanta en tiu stacidomo? Miavice mi ĵus konsultis la indikilon. Ĝi informis min.

– Verdire, sinjoro, diris la komisaro, tio estas mirinde deduktita. Kia kompetenteco!

Forportite de mia konvinko, mi agis mallerte montrante tiom da spriteco. Li rigardis min kun miro, kaj mi preskaŭ sentis, ke suspekto ekĝermis en li. – Ho! apenaŭ, ĉar la fotografaĵoj senditaj ĉiuflanken de la prokuroraro estis tro neperfektaj, prezentis ian Arsenon Lupenon tro malsaman ol tiu, kiu staris antaŭ li, por ke li povu rekoni min. Sed, malgraŭe, li estis konfuzita, nebule malkvieta.

Okazis momento da silento. Io ambigua kaj malcerta haltigis niajn parolojn. Min mem skuis ekstremo pro ĝeno. Ĉu fortune baldaŭ ŝanĝiĝos kontraŭ mi? Regante min, mi ekridis.

– Dio mia, nenio pli komprenigas aferojn ol la perdo de monpaperujo kaj la deziro trovi ĝin. Kaj ŝajnas al mi, ke se vi bonvulus doni al mi du el viaj agentoj, ili kaj mi, ni povus eble...

– Ho! mi petegas, sinjoro komisaro, ekkriis S-ino Renaud, aŭskultu S-ron Berlat.

La intermeto de mia bonega amikino estis decida. Elparolite de ŝi, la edzino de influa persono, tiu nomo Berlat reale iĝis la mia kaj donis al mi identecon, kiun neniu suspekto povis atingi. La komisaro ekstaris:

– Mi estus tiel feliĉa sinjoro Berlat, ja kredu tion, vidi vin sukcesi. Kiom vi mi deziras la areston de Arseno Lupeno.

Li kondukis min ĝis la aŭtomobilo. Du el liaj agentoj, kiujn li prezentis al mi, Honoré Massol kaj Gaston Delivet, eksidis en ĝi. Mi instalis min ĉe la stirilo. Mia mekanikisto faris la krankoturnon. Kelkajn sekundojn poste, ni forlasis la stacidomon. Mi estis savita.

Ha! mi konfesas, ke veturante sur la bulvaroj kiuj ĉirkaŭas la malnovan normandan civiton, je la potenca rapideco de mia tridek-kvin-ĉevalpova Moreau-Lepton, mi ne estis sen spertian orgojlon. La motoro ronkis harmonie. Dekstre kaj maldekstre, la arboj forfuĝis malantaŭ ni. Kaj libera, eksterdanĝera, nun mi nur enordigu miajn personajn aferetojn,

kun la helpo de la du honestaj reprezentantoj de la publika forto. Arseno Lupeno iris serĉi Arsenon Lupenon!

Modestaj subtenoj de la socia ordo, Delivet Gaston kaj Massol Honoré, kiom via asistado estis valora al mi! Kion mi estus farinta sen vi? Sen vi, kiomfoje, ĉe la vojkruciĝoj, mi estus elektinta la malĝustan vojon? Sen vi, Arseno Lupeno eraris, kaj la alia eskapis!

Sed ĉio ne finiĝis. Tute male. Restis al mi unue reatingi la ulon kaj poste mem repreni la paperojn kiujn li ŝtelis al mi. Neniapreze, miaj du kunuloj ŝovu la nazon en tiujn dokumentojn, des malpli ili ekkaptu ilin. Manipuli ilin kaj agi ekster ili, jen kion mi volis kaj kio ne facilis.

En Darnétal, ni alvenis tri minutojn post la paso de la trajno. Efektive, mi konsoliĝis eksciante, ke individuo en griza surtuto, kun talio, kun kolumo el nigra veluro, eniris en duaklasan kupeon, havante bileton por Amiens. Videble, miaj debutoj kiel policisto estis promesplenaj.

Delivet diris al mi:

– La trajno estas ekspresa kaj ne plu haltos ĝis Montérolier-Buchy, post dek naŭ minutoj. Se ni ne estos tie antaŭ Arseno Lupeno, li povos daŭrigi al Amiens, kiel devojiĝi al Clères, kaj de tie atingi Dieppe aŭ Parizon.

– Montérolier, kiom for?

– Dudek tri kilometrojn.

– Dudek tri kilometrojn en dek naŭ minutoj... Ni estos tie antaŭ li.

Kia pasiiga veturo! Neniam mia fidela Moreau-Lepton respondis al mia malpacienco kun pli da ardo kaj reguleco. Ŝajnis al mi, ke mi komunikas al ĝi mian volon rekte, senpere de la levieroj kaj de la kontroliloj. Ĝi havis la samajn dezirojn kiel mi. Ĝi aprobis mian obstinon. Ĝi komprenis mian malsimpation kontraŭ tiu kanajla Arseno Lupeno. Kia mallojalulo! kia perfidulo! Ĉu mi venkos lin? Ĉu li plian fojon mokos la aŭtoritaton, tiun aŭtoritaton, kies enkorpiĝo mi estis?

– Dekstren, kriis Delivet!... Maldekstren!... Rekten!...

Ni glitis super la grundo. La mejloŝtonoj aspektis kvazaŭ timemaj bestetoj, kiuj svenis je nia alproksimiĝo.

Kaj subite, post vojturniĝo, fumokirlo, la Norda ekspreso.

Dum unu kilometro, tio estis lukto, flankon ĉe flanko, neegala lukto, kies fino estis certa. Je la alveno, ni venkis ĝin per dudek longoj.

En tri sekundoj, ni estis sur la kajo, antaŭ la duaj klasoj. La pordoj malfermiĝis. Kelkaj personoj eltraniĝis. Mia ŝtelisto ne. Ni inspektis la kupeojn. Neniu Arseno Lupeno.

Skorzonero! mi ekkriis, li verŝajne rekonis min en la aŭto dum ni veturis unu apud la alia, kaj li estos elsaltinta.

La trajnestro konfirmis tiun supozon. Li vidis viron rulfalantan laŭlonge de la terplenigo, ducent metrojn antaŭ la stacidomo.

– Jen, tie... tiu kiu trairas la traknivelan pasejon.

Mi impetis, sekvate de miaj du kunuloj, aŭ pliĝuste sekvate de unu el ili, ĉar la alia, Massol, fakte estis escepta kuranto, havanta tiom da eltenpovo kiom da rapideco. Post mallonga tempo, la interspaco kiu apartigis lin de la fuĝanto konsiderinde malpliĝis. La viro ekvidis tion, transsaltis heĝon kaj rapide forkuris al taluso, kiun li suprengrimpis. Ni vidis lin ankoraŭ pli fora: li eniris en arbareton.

Kiam ni atingis la arbareton, Massol jam atendis nin tie. Li taksis senutile aŭdaci pluen, pro la timo perdi nin.

– Kaj mi gratulas vin, mian karan amikon, mi diris. Post tia kurado, nia ulo certe spirmankas. Ni tenas lin.

Mi ekzamenis la ĉirkaŭaĵon, pripensante pri kiel aresti sola la fuĝanton, por mem fari reprenojn, kiujn la justico kredeble estus tolerinta nur post multaj malagrablaj enketoj. Poste, mi revenis al miaj kunuloj.

– Jen, tio estas facila. Vi, Massol, postenu maldekstre. Vi, Delivet, dekstre. De tie, vi gvatos la tutan malantaŭan limon de la bosko, kaj li povos eliri ĝin, ne vidite de vi, nur laŭ tiu pado, kie mi postenas. Se li ne eliros, mi eniros, kaj nepre, mi elpelos lin al unu aŭ la alia. Vi do nur atendu. Ha! mi forgesis: okaze de alarmo, pafon.

Massol kaj Delivet malproksimiĝis ĉiu siaflanken. Tuj kiam ili malaperis, mi penetris en la arbareton, plej singarde, por ne

esti vidita nek aŭdita. Estis dikaj densaĵoj, aranĝitaj por ĉasado, kaj tranĉitaj de tre mallarĝaj padoj, kie eblis marŝi nur kliniĝinte kiel en vegetaĵaj subteraĵoj.

Unu el ili finiĝis al maldensejo, kie la malseka herbo prezentis piedsignojn. Mi sekvis ilin zorge kaŝirante tra la arbetoj. Ilin kondukis min ĉe la piedo de malgranda monteto, kiun ĉirkaŭis domaĉo el gipsaĵoj, duondetruita.

“Li devas esti tie, mi pensis. La observejo estas bone elektita.”

Mi rampis proksimen al la konstruaĵo. Mallaŭta bruo avertis min pri lia ĉeesto, kaj efektive, tra aperturo, mi ekvidis lin turnantan al mi la dorson.

Dusalte mi estis sur li. Li provis direkti la enmanan revolveron. Mi ne lasis al li la tempon, kaj kuntrenis lin teren, tiel ke ambaŭ liaj brakoj estis blokitaj sub li, torditaj, kaj ke mi pezis per mia genuo sur lian bruston.

– Aŭskultu, etulo mia, mi diris liaorelen, mi estas Arseno Lupeno. Vi redonos al mi tujtuje kaj bonvole mian paperujon kaj la mansakon de la virino... kontraŭ kio mi malembarasas vin je la polico, kaj mi dungas vin en miajn amikojn. Nur unu vorton: jes aŭ ne?

– Jes, li flustris.

– Des pli bone. Via afero, ĉi-matene, estis bele elturnita. Ni kunakordos.

Mi restariĝis. Li traserĉis sian poŝon, eligis larĝan tranĉilon kaj volis min frapi per ĝi.

– Stultulo! mi ekkriis.

Per unu mano, mi baris la atakon. Per la alia, mi forte frapis lin sur la karotidan arterion, kio nomiĝas “hoko je karotido”. Li falis svenigite.

En mia paperujo, mi retrovis miajn dokumentojn kaj miajn monbiletojn. Pro scivolemo, mi prenis lian. Sur koverto adresita al li, mi legis lian nomon: Pierre Onfrey.

Mi ekstremis. Pierre Onfrey, la murdinto de la strato Lafontaine, en Auteuil! Pierre Onfrey, tiu kiu buĉis S-inon Delbois kaj ŝiajn du filinojn. Mi kliniĝis super lin. Jes, li estis tiu vizaĝo, kiu en la kupeo, vekis en mi la rememoron pri trajtoj jam kontemplitaj.

Sed la tempo pasis. Mi metis en koverton du centfrankajn biletojn, karton kaj tiujn vortojn:

“Arseno Lupeno al siaj bonaj kolegoj Honoré Massol kaj Gaston Delivet, kiel ateston de sia dankemo.”

Mi metis tion videble meze de la ĉambro. Apude, la mansakon de S-ino Renaud. Ĉu mi povis ne redoni ĝin al la bonega amikino, kiu sukuris min?

Mi konfesas tamen, ke mi antaŭe detiris de ĝi ĉion, kio prezentis ian intereson, lasante nur kombilon el testudŝelo, kaj malplenan monujon. Diable! Negoco estas negoco. Kaj poste, vere, lia edzo praktikis metion tiom malmulte honorindan!...

Restis la viro. Li ekmoviĝis. Kion mi faru? Mi havis neniun kompetentecon por lin savi, nek por lin kondamni.

Mi deprenis liajn armilojn kaj revolvere pafis aeren.

– La du aliaj baldaŭ alvenos, mi pensis, li elturniĝu! La aferoj plenumiĝos laŭ lia destino.

Kaj mi malproksimiĝis kurante al la unua pado.

Dudek minutojn poste, ŝparvojo, kiun mi rimarkis dum nia postkurado, rekondukis min ĉe mian aŭtomobilon.

Je la kvara, mi telegrafis al miaj amikoj el Rueno, ke neantaŭvidita incidento devigas min prokrasti mian viziton. Inter ni dirite, mi ja timas, pro kion ili verŝajne scias nun, ke mi devas senfine prokrasti ĝin. Krue la senluziigo por ili!

Je la sesa, mi revenis al Parizo tra l'Isle-Adam, Enghien kaj la pordo Bineau.

La vesperaj gazetoj sciigis al mi, ke oni fine sukcesis kapti Pierre Onfrey.

La morgaŭon – ni ne malestimu la avantaĝojn de sagaca reklamo – *Écho de France* publikigis tiun sensacian artikoleon:

“Hieraŭ, en la ĉirkaŭaĵo de Buchy, post multaj incidentoj, Arseno Lupeno plenumis la areston de Pierre Onfrey. La murdinto de la strato Lafontaine ĵus priŝtelis, sur la linio de Parizo al Havro, S-inon Renaud, la edzinon de la vicdirektoro de la malliberejaj servoj. Arseno Lupeno redonis al S-ino Renaud la mansakon, kiu enhavis ŝiajn juvelojn, kaj malavare

rekompencis la du Sekurecajn agentojn, kiuj helpis lin dum tiu drama aresto.”

La Koliero de la Reĝino

Du aŭ tri fojojn jare, okaze de gravaj solenaĵoj, kiel la baloj de la aŭstria ambasadejo aŭ la amuzvesperoj de S-ino Billingstone, la grafino de Dreux-Soubise metis sur siajn blankajn ŝultrojn “la Kolieron de la Reĝino”.

Ĝi ja estis la fama koliero, la legenda koliero kiun Böhmer kaj Bassenge, juvelistoj de la krono, destinis al la grafino du Barry, kiun la kardinalo Rohan-Soubise kredis donaci al Marie-Antoinette, franca reĝino, kaj kiun la aventuristino Jeanne de Valois, grafino de La Motte, dispecigis dum vespero de februaro 1785, helpe de sia edzo kaj de ilia komplico Rétaux de Villette.

Verdire, nur la muntumo estis aŭtentika. Rétaux de Villette konservis ĝin, dum la sinjoro de La Motte kaj lia edzino disigis ien-tien la gemojn krude malmuntitajn, la admirindajn gemojn tiel zorge elektitajn de Böhmer. Poste, en Italio, li vendis ĝin al Gaston de Dreux-Soubise, nevo kaj heredonto de la kardinalo, savita de li kontraŭ ruiniĝo dum la tondra bankroto de Rohan-Guéménée, kaj kiu memore al sia onklo, reaĉetis la kelkajn diamantojn kiujn la angla juvelisto Jefferys ankoraŭ posedis, kompletigis ilin per aliaj multe malpli altvaloraj, sed samdimensiaj, kaj sukcese rekreis la mirindan “kolieron de sklaveco”, tian kia ĝi eliĝis el la manoj de Böhmer kaj Bassenge.

Pri tiu historia juvelo, dum preskaŭ unu jarcento, la familio Dreux-Soubise orgojlis. Kvankam diversaj cirkonstancoj nepreterinde malpliigis ilian riĉaĵon, ili preferis malaltigi sian vivmanieron ol forcedi la reĝan kaj altvaloran relikvon. Precipe la nuna grafo estis korligita al ĝi kiel oni estas korligita al la domo de la prapatroj. Pro singardo, li luis monŝrankon en la banko Crédit Lyonnais por ĝin deponi. Li mem iris preni ĝin dum la posttagmezo kiam lia edzino volis ĝin surmeti, kaj mem reportis ĝin la morgaŭon.

Tiun vesperon, en la balo de la Kastilia Palaco – la aventuro datiĝas de la komenco de la jarcento – la grafino rikoltis ĉies admiron, kaj la reĝo Kristiano, honore al kiu la festo estis organizita, rimarkis ŝian belegecon. La juvelŝtonoj rojis ĉirkaŭ la gracia kolo. La mil diamantaj facetoj brilis kaj flagris kvazaŭ flamoj en la heleco de la lumoj. Neniu alia ol ŝi, ŝajne, povis surhavi kun tiom da facileco kaj nobeleco la ŝarĝon de tia ornamaĵo.

Tio estis duobla triumfo, kiun la grafo de Dreux profunde gustumis, kaj pri kiu li gratulis sin, kiam ili revenis en la ĉambro de sia malnova hotelo de la antaŭurbo Saint-Germain. Li fieris pri sia edzino kaj eble tiom pri la juvelo, kiu de kvar generacioj ilustris lian domon. Kaj lia edzino tiris el ĝi vantecon iom infanecan, sed kiu ja estis la signo de ŝia malmodesta karaktero.

Ne sen bedaŭro, ŝi malligis la kolieron el siaj ŝultroj kaj transdonis ĝin al sia edzo, kiu admire ekzamenis ĝin, kvazaŭ li tute ne konus ĝin. Poste, remetinte ĝin en ĝian juvelujon el ruĝa ledoro ornamitan de la blazono de la Kardinalo, li pasis en apudan kabineton, pliĝuste ian alkovon, kiun oni plene izolis de la dormoĉambro, kaj kies solsola enirejo troviĝis piede de ilia lito. Kiel la aliaj fojoj, li kaŝis ĝin sur iom alta tabulo, inter ĉapelskatoloj kaj stakoj da tolaĵo. Li fermis la pordon kaj senvestiĝis.

La morgaŭan matenon, li ellitiĝis ĉirkaŭ la naŭa, kun la intenco iri, antaŭ la matenmanĝo, ĝis Crédit Lyonnais. Li sin vestis, trinkis tason da kafo kaj malsupreniris al la ĉevalejo. Tie, li disdonis ordonojn. Unu el la ĉevaloj maltrankviligis lin. Li paŝigis kaj trotigis ĝin antaŭ si en la korto. Poste li reiris al sia edzino.

Ŝi ne elĉambriĝis, kaj sin kombis, helpate de sia servistino. Ŝi diris al li:

– Ĉu vi eliras?

– Jes... por tiu afero...

– Ha! efektive... estas pli prudente...

Li penetris en la kabineton. Sed, post kelkaj sekundoj, li demandis, sen ajna miro cetere:

– Ĉu vi prenis ĝin, kara?

Ŝi replikis:

– Kiel do? Ne ne, mi nenion prenis.

– Ĉu vi metis ĝin aliloken?

– Tute ne... mi eĉ ne malfermis tiun pordon.

Li ŝajnis diseriĝinta, kaj li balbutis, kun apenaŭ aŭdebla voĉo:

– Vi ne... Ne estas vi... Do...

Ŝi alkuris, kaj ili febre serĉis, ĵetante la kartonkestojn surplanken kaj faligante la tolaĵajn stakojn. Kaj la grafo ripetadis:

– Senutila... ĉio, kion ni faras estas senutila... Ĉi tien, ĝuste tien, sur tiun tabulon, mi metis ĝin.

– Vi povis erari.

– Ĉi tien, ĝuste tien, sur tiun tabulon, kaj ne sur alian.

Ili ekbruligis kandelon, ĉar la ĉambro estis iom malluma, kaj ili formetis la tutan tolaĵon kaj ĉiujn objektojn kiuj ĝin embarasis. Kaj kiam ne plu estis ion ajn en la kabineto, ili devis koncedi kun malespero, ke la fama koliero, “la Koliero de sklaveco de la Reĝino”, malaperis.

Nature decidema, la grafino, sen malŝpari tempon pro vanaj lamentoj, avertigis la komisaron, S-ron Valorbe, kies sagacan spiriton kaj klarvidecon ili jam havis la okazon aprezi. Oni detale informis lin, kaj li tuj demandis:

– Ĉu vi certas, sinjoro grafo, ke neniu povis trairi vian dormoĉambron nokte?

– Absolute certa. Mi dormas tre malpeze. Eĉ pli bone: la pordo de tiu ĉambro estis fermita per riglilo. Mi devis ĝin tiri ĉi-matene kiam mia edzino sonorigis al la servistino.

– Kaj ĉu ekzistas alia pasejo, kiu ebligus eniĝi en la kabineton?

– Neniu.

– Ĉu ne fenestro?

– Jes, sed ĝi estas ŝtopita.

– Mi dezirus mem konstati...

Oni ekbruligis kandelojn, kaj S-ro Valorbe tuj rimarkigis, ke la fenestro estas ŝtopita nur duonalte, de kofro, kiu krome ne ekzakte tuŝas la fenestroframon.

– Ĝi tuŝas ĝin sufiĉe, rebatis S-ro de Dreux, por ke neeblu ĝin movi sen fari multe da bruoj.

– Kaj al kio rigardas tiu fenestro?

– Al interna korteto.

– Kaj ĉu vi havas plian etaĝon super tiu ĉi?

– Du pliajn, sed ĉe tiu de la servistoj, la korteto estas ŝirmata de etmaŝa krado. Tial ni havas tiom malmulte da taglumo.

Cetere, forŝovinte la kofron, oni konstatis ke la fenestro estas fermita, kio ne okazus, se iu estus penetrinta elekstere.

– Krom, notis la grafo, se tiu iu eliris tra nia dormoĉambro.

– Tiuokaze, vi ne estus trovinta ties riglilon puŝita.

La komisaro pripensis momenton, poste turniĝante al la grafino:

– Ĉu oni sciis en via ĉirkaŭantaro, sinjorino, ke vi devos surhavis tiun kolieron hieraŭ vespere?

– Certe, tion mi ne kaŝis. Sed neniuj sciis, ke ni enfermas ĝin en tiu kabineto.

– Ĉu neniuj?

– Neniuj... Krom se...

– Mi petas, sinjorino, precizigu. Tio ja estas unu el la plej ĉefaj punktoj.

Ŝi diris al sia edzo:

– Mi pensis pri Henrieto.

– Ĉu Henrieto? Ŝi ne scias tiun detalon kiel la aliaj.

– Ĉu vi certas?

– Kiu estas tiu virino? demandis S-ro Valorbe.

– Konventa amikino, kiu konfliktis kun sia familio por edziniĝi al ia laboristo. Ĉe la morto de ŝia edzo, mi akceptis ŝin kun ŝia filo kaj meblis al ili apartamenton en tiu hotelo.

Kaj ŝi aldonis embarase:

– Ŝi plenumas kelkajn servojn por mi. Ŝi estas tre lerta per siaj manoj.

– En kiu etaĝo ŝi loĝas?

– En la nia, cetere ne malproksime... ĉe la fino de tiu koridoro... Kaj, mi pensas pri tio... la fenestro de ŝia kuirejo...

– Rigardas al tiu korteto, ĉu ne?

– Jes, tuj fronte al la nia.

Malpeza silento sekvis tiun deklaron.

Poste S-ro Valorbe petis, ke oni lin konduku al Henrieto.

Ili trovis ŝin kudranta, dum ŝia filo Raulo, ses aŭ sepjara knabeto, legis apud ŝi. Iom surprizita vidante la mizeran apartamenton, kiun oni meblis por ŝi, kaj kiu entute konsistis el senkamena ĉambro kaj kamero uzata kiel kuirejo, la komisaro ŝin pridemandis. Ŝi aspektis emociegita eksciante pri la plenumita ŝtelo. La hieraŭan vesperon, ŝi mem vestis la grafinon kaj ligis la kolieron ĉirkaŭ ŝia kolo.

– Dio mia! ŝi ekkriis, kiu estus povinta imagi tion?

– Kaj vi havas nenian ideon? eĉ ne plej etan dubon? Eblas, ke la ŝtelisto pasis tra via ĉambro.

Ŝi plenkore ridis, sen eĉ imagi, ke oni povus eksuspekti ŝin:

– Sed mian ĉambron mi ne forlasis! Mi neniam eliras. Kaj poste, ĉu vi do ne vidis?

Ŝi malfermis la fenestron de la kamero.

– Vidu, ja estas tri metroj ĝis la kontraŭa rando.

– Kiu diris al vi, ke ni hipotezas ŝtelon plenumitan tra tie?

– Sed... ĉu la koliero ne estis en la kabineto?

– Kiel vi tion scias?

– Damne! mi ĉiam sciis, ke oni metas ĝin tien dumnokte... oni parolis pri tio antaŭ mi...

Ŝia vizago, ankoraŭ juna, sed kiun ĉagrenoj estis velkigintaj, signis grandan mildecon kaj rezignemon. Tamen ŝi subite havis, en la silento, angoran esprimon, kvazaŭ danĝero minacus ŝin. Ŝi altiris sian filon kontraŭ sin. La infano prenis ŝian manon kan tenere ĉirkaŭbrakis ŝin.

– Mi ne supozas, diris S-ro de Dreux al la komisaro, kiam ili estis solaj, – mi ne supozas, ke vi suspektis ŝin? Mi respondecas pri ŝi. Ŝi estas honesteco mem.

– Ho! mi tute samopinias kiel vi, asertis S-ro Valorbe. Mi apenaŭ pensis pri pretervola komplaceco. Sed mi agnoskas, ke tiu klarigo estu forlasita, des pli ke ĝi tute ne solvas la problemon, kontraŭ kiu ni kolizias.

La komisaro ne daŭrigis pluen tiun enketon, kiun la enketa juĝisto postprenis kaj kompletigis dum la sekvantaj tagoj. Oni pridemandis la servistojn, oni kontrolis la staton de la riglilo, oni testis la fermon kaj la malfermon de la kabineta fenestro, oni esploris la korteton desupre malsupren... Ĉio estis senutila. La riglilo estis sendifekta. La fenestro ne povis malfermiĝi aŭ fermiĝi elekstere.

Pli speciale, la traserĉoj celis Henrieton, ĉar, malgraŭe, oni ĉiam revenis al tiu flanko. Oni zorge esploris ŝian vivon, kaj oni konstatis, ke de tri jaroj, ŝi eliris nur kvar fojojn el la hotelo, kaj tiujn kvar fojojn por aĉetoj, kiujn oni povis determini. Fakte, ŝi servis kiel ĉambristino kaj kudristino al S-ino de Dreux, kiu montris kontraŭ ŝi rigoron, kiujn ĉiuj servistoj konfidence atestis.

– Cetere, diris la enketa juĝisto, kiu, post semajno, trafis la samajn konkludojn kiel la komisaro, supozante ke ni konus la kulpulon, kaj ni ne atingis tion, ni ne pli sciis pri la maniero kiel la ŝtelo estis plenumita. Ni estas baritaj ambaŭflanke de du obstakloj: unu pordo kaj unu fenestro fermitaj. La mistero estas duobla! Kiel oni povis eniĝi, kaj kiel, kio estis multe pli malfacila, oni povis eskapi lasante malantaŭ si riglitan pordon kaj fermitan fenestron?

Post kvar monatoj da enketo, la sekreta ideo de la juĝisto estis jena: S-ro kaj S-ino de Dreux, urĝitaj de monaj bezonoj, vendis la Kolieron de la Reĝino. Li fermis la aferon.

La ŝtelo de la valora juvelo donis al la Dreux-Soubise baton, kies postsignon ili longe konservis. Ilia kredito ne plu estante subtenita de la kvazaŭ-garantio, kiun konsistigis tia trezoro, ili frontis pli postulemajn kreditorojn kaj malpli favorajn

alpruntistojn. Ili devis senigi sin, forcedi, hipoteke. Resume, ili ja estus ruinigitaj se du grandaj heredaĵoj de malproksimaj parencoj ne estus savintaj ilin.

Ili ankaŭ suferis en sia orgojlo, kvazaŭ ili estus perdintaj parton de nobeleco. Kaj, stranga afero, sian malnovan amikinson de pensionato la grafino riproĉis. Ŝi sentis kontraŭ ŝi veran rankoron kaj akuzis ŝin malkaŝe. Unue oni relegaciis ŝin en la etaĝon de la servistoj, poste oni maldungis ŝin abrupte.

Kaj la vivo iradis, sen notinda okazaĵo. Ili multe vojaĝis.

Nur unu fakto rimarkendas dum tiu epoko. Kelkajn monatojn post la foriro de Henrieto, la grafino ricevis de ŝi leteron, kiu plenigis ŝin je miro:

“Sinjorino,

Mi ne scias kiel danki vin. Ĉar ja estas vi, ĉu ne, kiu sendis tion al mi? Povas esti nur vi. Neniu alia konas mian retiriĝejon funde de tiu vilaĝeto. Se mi eraras, senkulpigu min kaj memoru almenaŭ la esprimon de mia dankemo pro viaj pasintaj bonfaroj...”

Kion ŝi volis diri? La nunaj aŭ pasintaj bonfaroj de la grafino al ŝi reduktiĝis al multe da maljustaĵoj. Kion signifis tiuj dankoj?

Ordonite ke ŝi ekspliku sin, ŝi respondis ke ŝi poŝte ricevis, en letero nek registrita nek deklarita, du milfrankajn biletojn. La koverto, kiun ŝi kunsendis al sia respondo, estis poŝtmarkita de Parizo, kaj surhavis nur ŝian adreson, skribitan per videble maskita manskribo.

El kie devenis tiuj du mil frankoj? Kiu sendis ilin? La justico informiĝis. Sed kiun vojon oni povis spuri en tiu mallumo?

Kaj la sama fakto reokazis dekdu monatojn poste. Kaj trian fojon; kaj kvaran fojon; kaj ĉiun jaron dum ses jaroj, kun tiu malsameco, ke la kvinan kaj la sesan jaron, la monsumo duobligis, kio ebligis al Henrieto, subite malsaniĝinte, taŭge sin kuraci.

Alia malsameco: kiam la poŝta administracio kaptis unu el la leteroj pretekste, ke ĝi ne estas deklarita, la du lastaj leteroj estis senditaj laŭ la regularo, la unua estis stampita el Saint-Germain, la alia el Suresnes. La sendinto unue subskribis Anquety, poste Péchard. La adresoj, kiujn li donis, estis falsaj.

Post ses jaroj, Henrieto mortis. La enigmo restis plena.

Ĉiuj tiuj okazintaĵoj estas konataj de la publiko. La afero estis unu el tiuj, kiuj pasiigis la ĝeneralan opinion, kaj strangan destinon havis tiun kolieron, kiu, emociege Francion je la fino de la 18-a jarcento, kaŭzis ankoraŭ tiom da ekscitiĝo cent dudek jarojn poste. Sed kion mi tuj diros estas nekonata de ĉiuj, escepte de la ĉefaj koncernatoj kaj de kelkaj personoj, al kiuj la grafo petis absolutan sekreton. Ĉar estas probable, ke iam aŭ tiam ili malfidelos al sia promeso, mi havas, miaflanke, neniun skrupulon forŝiri la vualon kaj oni tiel scios, samtempe kiel la enigman solvon, la klarigon de la letero publikigita de la gazetoj de la antaŭhieraŭ mateno, eksterordinara letero kiu ankoraŭ aldonis, se tio eblus, iom da ombro kaj mistero al la mallumoj de tiu dramo.

Tio okazis antaŭ kvin tagoj. Inter la invititoj, kiuj tagmanĝis ĉe S-ro de Dreux-Soubise, troviĝis liaj du nevinoj kaj lia kuzino, kaj, kiel viroj, la prezidanto de Essaville, la deputito Bochas, la kavaliro Floriani, kiun la grafo konis en Sicilio, kaj la generalo markizo de Rouzières, malnova rondokamarado.

Post la manĝo, tiuj damoj surtabligis la kafon kaj la viroj havis la permeson por cigaredo, kondiĉe ke ili ne forlasu la salonon. Oni babilis. Unu el la junulinoj amuziĝis kartaŭgurante kaj antaŭdirante la sorton. Poste oni ekparolis pri famaj krimoj. Kaj tiurilate, S-ro de Rouzières, kiu neniam maltrafis okazon moketi la grafon, rememorigis la aventuron de la koliero, konversacia temo kiun S-ro de Dreux abomenis.

Ĉiu tuj ekdonis sian opinion. Ĉiu rekomencis la enketon siamaniere. Kaj, kompreneble, ĉiuj hipotezoj kontraŭdiris unu la alian, ĉiuj ankaŭ neakcepteblaj.

– Kaj vi, sinjoro, demandis la grafino al la kavaliro Floriani, kion vi opinias?

– Ho! mi ne havas opinion, sinjorino.

Oni kriprotestis. Precize, la kavaliro ĵus rakontis brilege diversajn aventurojn, en kiujn li estis enmiksita kun sia patro, magistrato en Palermo, kaj per kiuj evidentiĝis lia prijuĝo kaj lia gusto por tiuj aferoj.

– Mi konfesas, li diris, ke okazis al mi sukcesi dum aliaj pli lertaj rezignis. Sed truis konsideri min kiel ian Ŝerlokona Holmsona... Kaj poste, mi apenaŭ scias pri kio temas.

Oni sin turnis al la dommastro. Kontraŭvole, li devis resumi la faktojn. La kavaliro aŭskultis, pripensis, starigis kelkajn demandojn, kaj murmuris:

– Tio estas amuza... unuavide ne ŝajnas al mi, ke la afero estas tiel malfacile divenebla.

La grafo ŝultrolevis. Sed la aliaj personoj diligentis ĉirkaŭ la kavaliro, kaj li daŭrigis kun tono iom dogma:

– Ĝenerale, por reiri ĝis la aŭtoro de krimo aŭ ŝtelo, necesas determini kiel tiu krimo aŭ tiu ŝtelo estis plenumitaj. En la nuna kazo, nenio pli simpla, laŭ mi, ĉar ni frontas, ne al pluraj hipotezoj, sed al certo, ununura certo, rigora, kaj kiu formuliĝas tiel: la individuo povis eniri nur tra la pordo de la ĉambro aŭ tra la fenestro de la kabineto. Nu, oni ne malfermas, elekstere, riglitan pordon. Do li eniris tra la fenestro.

– Ĝi estis malfermita, kaj oni retrovis ĝin fermita, deklaris S-ro de Dreux.

– Tiucele, daŭrigis Floriani, ne rimarkigante la interrompon, li bezonis nur estigi ponton, tabulo aŭ ŝtupetaro, inter la balkono de la kuirejo kaj la rando de la fenestro, kaj tuj kiam la juvelujo...

– Sed mi ripetas al vi, ke la fenestro estis fermita! senpacience ekkriis la grafo.

Ĉi-foje Floriani devis respondi. Li faris tion kun la plej granda trankvileco, kiel viro kiun tiel sensignifa objekto tute ne konfuzas.

– Mi ja kredas, ke tia ĝi estis, sed ĉu ne estas vazistaso?

– Kiel vi scias tion?

– Unue tio estas preskaŭ regulo, en la tiuepokaj hoteloj. Kaj poste, ja necesas ke estu tiel, ĉar, alie, la ŝtelo estus neklarigebla.

– Efektive, estas unu, sed ĝi estas fermita, kiel la fenestro. Oni eĉ ne atentis ĝin.

– Tio estas eraro. Ĉar se oni estus atentinta, oni estus vidinta memkompreneble, ke ĝi estis malfermita.

– Kaj kiel?

– Mi supozas, ke samkiel ĉiuj aliaj, ĝi malfermiĝas per plektita ferdrato, kun ringon ĉe sia malsupra ekstremaĵo?

– Jes.

– Kaj tiu ringo pendis inter la fenestroframo kaj la kofro?

– Jes, sed mi ne komprenas...

– Jen. Tra fendo farita en la vitro, oni povis, per ia ilo, ni supozu feran vergon provizitan per kroĉilo, ekkapti la ringon, premi kaj malfermi.

La grafo ridaĉis:

– Perfekte! perfekte! Vi senpene aranĝas ĉion ĉi, tamen vi forgesas aferon, kara sinjoro, ne estis fendo farita en la vitro.

– Estis fendo.

– Nu do, oni estus vidinta ĝin.

– Por vidi, necesas rigardi, kaj oni ne rigardis. La fendo ekzistas, kaj materiale neblas, ke ĝi ne ekzistas, laŭlonge de la vitro, apud la mastiko... vertikale, kompreneble.

La grafo ekstaris. Li ŝajnis ege ekscitita. Li nervoze trapaŝis la salonon du aŭ tri fojojn, kaj, proksimiĝante al Floriani:

– Nenio ŝanĝiĝis tie supre de tiu tago... neniu metis piedon en la kabineto.

– Tiukaze, sinjoro, tute eblas al vi certiĝi, ĉu mia klarigo kongruas kun realeco.

– Ĝi kongruas kun neniu el la faktoj, kiun la justico konstatis. Vi nenion vidis, vi nenion scias, kaj vi kontraŭas ĉion kion ni vidis kaj ĉion kion ni scias.

Floriani ne ŝajnis rimarki la iriton de la grafo, kaj diris al li ridetante:

– Dio mia, sinjoro, mi provas klarvidi, jen ĉio. Se mi eraras, pruvu al mi mian eraron.

– Sen plu prokrasti... Mi konfesas, ke finfine via certeco...

S-ro de Dreux grumble respondis ankoraŭ kelkajn parolojn, poste, subite, direktiĝis al la pordo kaj eliris.

Neniu vorto estis elparolita. Oni anksie atendis, kvazaŭ, vere, peceto de la vero estus aperonta. Kaj la silento havis ekstreman gravecon.

Fine, la grafo aperis en la embrazuro de la pordo. Li estis pala kaj neordinare agitata. Li diris al siaj amikoj, per tremanta voĉo:

– Mi pardonpetas... la revelaĵoj de sinjoro estas tiel neantaŭviditaj... mi neniam estus imaginta...

Lia edzino pridemandis lin avide:

– Parolu... mi petegas... kio okazas?

Li balbutis:

– La fendo ekzistas... en la indikita loko mem... laŭlonge de la vitro...

Li abrupte ekkaptis la brakon de la kavaliro kaj diris al li per ordonema tono:

– Kaj nun, sinjoro, daŭrigu... mi agnoskas, ke vi pravas ĝis nun; sed ĉio ne estas finita... respondu... kio okazis, laŭ vi?

Floriani liberigis sin malrapide kaj post momento eldiris:

– Nu, laŭ mi, jen kio okazis. La ulo, sciante ke S-ino de Dreux iris al la balo kun la koliero, ĵetis sian pastabulon dum via foresto. Tra la fenestro, li gvatis vin kaj vidis vin kaŝi la juvelon. Tuj kiam vi foriris, li tranĉis la vitron kaj tiris la ringon.

– Bone, sed la distanco estas tro granda, por ke li povis, tra la vazistaso, atingi la manilon de la fenestro.

– Se li ne povis ĝin malfermi, tio estas ke li eniris tra la vazistaso mem.

– Neeble; ne estas viro sufiĉe maldika por eniri tra tie.

– Tiam li ne estas viro.

– Kion?

– Certe. Se la pasejo estas tro mallarĝa por viro, ja necesas ke li estu infano.

– Infano!

– Ĉu vi ne diris al mi, ke via amikino Henrieto havas filon?

– Efektive... filon, kiu nomiĝas Raulo.

– Estas ege probable, ke tiu Raulo plenumis la ŝtelon.

– Kiun pruvon vi havas?

– Kiun pruvon?... ne mankas pruvoj... Jen, ekzemple...

Li eksilentis kaj pripensis kelkajn sekundojn. Poste li daŭrigis:

– Jen, ekzemple, pri tiu pastabulo, verŝajnas ke la infano ĝin alportis elekstere kaj reportis reen nerimarkite. Li probable uzis tion, kio estis je lia dispono. En la kamero, kie Henrieto kuiradis, estis tabuletoj alkroĉitaj al la muro, kien oni metis kaserolojn, ĉu ne?

– Du tabuletoj, laŭ mia memoro.

– Necesus certiĝi, ĉu tiuj tabuloj estas efektive fiksitaj al la lignaj trabetoj, kiuj ilin subportas. En la mala kazo, ni rajtus pensi, ke la infano malnajlis ilin, kaj ligis ilin unu al la alia. Eble ankaŭ, ĉar estis fornelo, oni trovis la fornelan kroĉilon, kiun li kredeble uzis por malfermi la vazistason.

Senvorte la grafo eliris, kaj ĉi-foje, la ĉeestantoj eĉ ne sentis la etan anksion de nekonataĵo, kiun li spertis la unuan fojon. Li sciis, li nepre sciis, ke la antaŭdiroj de Floriani estas ĝustaj. Emanis el tiu viro impresio de certeco tiel rigora, ke oni aŭskultis lin ne kvazaŭ li deduktus faktojn unu el la alia, sed kvazaŭ li rakontus okazaĵojn, kies aŭtenteco estis iom post iom facile mezurebla.

Kaj neniu miris kiam siavice la grafo deklaris:

– Ja estas la infano, ja estas li, ĉio atestas tion.

– Ĉu vi vidis la tabulojn... la kroĉilon?

– Mi vidis... la tabuloj estis malnajlitaj... la kroĉilo estas ankoraŭ tie.

S-ino de Dreux-Soubise ekkriis:

– Estas li... Vi pliĝuste intencas diri, ke estas lia patrino. Henrieto estas la sola kulpulo. Ŝi devigis sian filon...

– Ne, asertis la kavaliro, la patrino neniel kulpas.

– Nu do! ili loĝis la saman kameron, la infano ne estus povinta agi kaŝe de Henrieto.

– Ili loĝis la saman kameron, sed ĉio okazis en la apuda ĉambro, nokte, dum la patrino dormis.

Kaj la kolieron? diris la grafo, oni estus trovinta ĝin en la aferoj de la infano.

– Pardonon! li eliris. La matenon mem, kiam vi surprizis lin antaŭ lia taskotablo, li venis el la lernejo, kaj eble la justico, anstataŭ elĉerpi siajn rimedojn kontraŭ la senkulpa patrino, pli bone atingus traserĉinte tie, en la pupitro de la infano, inter liaj klaslibroj.

– Konsentite, sed pri tiuj du mil frankoj kiujn Henrieto ricevis ĉiujare, ĉu tio ne estis la plej bona pruvo de ŝia kompliceo?

– Se komplica, ĉu ŝi estus dankinta vin pro tiu mono? Kaj poste, ĉu oni ne priatentis ŝin? Dum siaflanke la infano estis libera, li facile povis kuri ĝis la apuda urbo por akordiĝi kun iu pluvendisto kaj cedi al li kontraŭ aĉa prezo unu diamanton, du diamantojn, laŭ la kazo... sub la sola kondiĉo, ke la monsendo estu realigita de Parizo, kontraŭ kio oni rekomencos la venontan jaron.

Nedifinebla ĝeno korprenmis la du Dreux-Soubise kaj iliajn gastojn. Vere estis en la tono, en la sinteno de Floriani, alia afero ol tiu certeco, kiu dekomence tiel forte incitis la grafon. Estis ia ironio, kaj ironio kiu ŝajnis pli rankorema ol simpatia kaj amika, kiel tio estus konvena.

La grafo afektis ekridon.

– Ĉio ĉi estas rave inĝenia! Miajn komplimentojn! Kia brila imago!

– Ne, ne, ekkriis Floriani kun pli da graveco, mi ne imagas, mi aludas cirkonstancojn, kiuj estis neeviteblaj, kiajn mi montras.

– Kion vi scias pri tio?

– Kion vi mem diris al mi. Mi bildigas al mi la vivon de la patrino kaj de la infano, tie for, funde de la provinco, la patrinon kiu malsaniĝas, la ruzaĵojn kaj la inventaĵojn de la etulo por vendi la juvelŝtonojn kaj savi la patrinon aŭ almenaŭ mildigi ŝiajn lastajn momentojn. Malbono venkas. Ŝi mortas. Jaroj pasas. La infano kreskas, fariĝas viro. Kaj tiam – kaj ĉi-foje, mi bonvolas koncedi, ke mia imago libere sin esprimas – ni supozu, ke tiu viro sentas la bezonon reveni en la lokojn, kie li travivis sian infanaĝon, ke li revidas ilin, ke li retrovas tiujn

kiuj suspektis, akuzis lian patrinon... ĉu vi pensas pri la emociega intereso de tia interparolo en la malnova domo, kie disvolviĝis la peripetioj de la dramo?

Liaj paroloj sonoris dum kelkaj sekundoj en la malkvieta silento, kaj sur la vizaĝo de S-ro kaj S-ino de Dreux, legeblis senkonsila klopodo por kompreni, kaj samtempe la timo, la angoro kompreni. La grafo murmuris:

– Kiu do vi estas, sinjoro?

– Ĉu mi? sed la kavaliro Floriani, kiun vi renkontis en Palermo, kaj kiun vi tiel afable invitis ĉe vi jam plurfoje.

– Tiam, kion signifas tiu historio?

– Ho! sed tute nenion! Tio estas nura ludo de mi. Mi provas imagi la ĝojon, kiun la filo de Henrieto, se li ankoraŭ ekzistus, sentus dirante al vi, ke li estis la sola kulpulo, kaj ke li estis tiu ĉar lia patrino estis malfeliĉa, perdonta la oficon de... servistino, per kiu ŝi vivtenis sin, kaj ĉar la infano suferis vidi sian patrinon malfeliĉa.

Li esprimis sin kun retenita emocio, duonstarante kaj kliniĝinte al la grafino. Neniu dubo povis resti. La kavaliro Floriani estis neniu alia ol la filo de Henrieto. Ĉio, en lia sinteno, en liaj paroloj, tion proklamis. Cetere ĉu tio ne estis lia evidenta intenco, lia volo mem esti rekonita tiele?

La grafo hezitis. Kian konduton li havu al la aŭdaca persono? Sonorigi? Estigi skandalon? Senmaskigi tiun, kiu iam prirabis lin? Sed tio estis antaŭ tiom longe! Kaj kiu povus agnoski tiun absurdan historion pri kulpa infano? Ne, prefere li

akceptu tiun situacion, afektante ne kompreni la veran sencon. Kaj la grafo, proksimiĝante al Floriani, gaje ekkriis:

– Tre amuza, tre kurioza, via romano. Mi ĵuras al vi, ke ĝi pasiigas min. Sed, laŭ vi, kio li fariĝis, tiu bona junulo, tiu fila modelo? Mi esperas, ke li ne haltis sur tiel bela vojo.

– Ho! certe ne.

– Ĉu ne! Post tia komenco! Forpreni la kolieron de la Reĝino sesjaraĝante, la faman kolieron, kiun avidis Marie-Antoinette!

– Kaj forpreni ĝin, rimarkigis Floriani enirante la ludon de la grafo, forpreni ĝin sen suferi la plej etan malagrablaĵon, sen ke iu havis la ideon ekzameni la staton de la vitroj, aŭ rimarki ke la fenestra rando estas tro pura, tiu rando kiun li viŝis por malaperigi la spurojn de sia paso sur la dika polvo... Koncedu, ke estis kialoj por malsaĝigi tiuaĝan bubon. Ĉu do tio tiel facilas? Oni do nur volu kaj etendu la manon?... Nu, li volis...

– Kaj li etendis la manon.

– Ambaŭ manojn, daŭrigis la kavaliro ridetante.

Estis tremeto. Kian misteron kaŝis la vivo de tiu laŭdira Floriani? Kiom eksterordinara devis esti la ekzistado de tiu aventuristo, genia ŝtelisto sesjara, kaj kiu, hodiaŭ, pro rafiniteco de emociiĝema diletanto, aŭ maksimume por kontentigi rankoran senton, venis spiti sian viktimon en ĝia hejmo, aŭdace, freneze, kaj tamen kun la tuta deco de vizitanta galantulo!

Li ekstaris kaj proksimiĝis al la grafino por adiaŭi. Ŝi retenis retroiran moviĝon. Li ridetis.

– Ho! sinjorino, vi timas! Ĉu do mi troigis mian etan komedion de salona sorĉisto?

Ŝi regis sin kaj respondis kun la sama senĝeneco iom moka:

– Neniom, sinjoro. La legendo de tiu bona filo male multe interesis min, kaj mi feliĉas, ke mia koliero estis la okazo de tiel brila destino. Sed ĉu vi ne kredas, ke la filo de tiu... virino, de tiu Henrieto, ĉefe obeis al sia alvokiĝo?

Li ekstremis, sentante la pikon, kaj rebatis:

– Pri tio mi certas, kaj eĉ necesis ke tiu alvokiĝo estu serioza por ke la infano ne senkuraĝiĝu.

– Kaj kiel do?

– Jes, vi ja scias, la plej multaj gemoj estis falsaj. Estis veraj nur la kelkaj diamantoj reaĉetitaj al la angla juvelisto, la aliaj estis venditaj unu post la alia laŭ la malmildaj necesajoj de la vivo.

– Ĝi plu estis la Koliero de la Reĝino, sinjoro, malhumile diris la grafino, kaj jen, ŝajnas al mi, kion la filo de Henrieto ne povis kompreni.

– Li verŝajne komprenis, sinjorino, ke falsa aŭ vera, la koliero estas ĉefe paraĉajo, ŝildo.

S-ro de Dreux faris geston. Lia edzino tuj haltigis lin.

– Sinjoro, ŝi diris, se la viro kiun vi aludas havas la plej etan decon...

Ŝi interrompiĝis, timidigite de la kvieta rigardo de Floriani.

Li repetis:

– Se tiu viro havas la plej etan decon...?

Ŝi sentis, ke ŝi nenion gajnos tiel parolante al li, kaj malgraŭ si, malgraŭ sia kolero kaj sia indigno tute tremetanta pro humiligita orgojlo, ŝi diris al li preskaŭ ĝentile:

– Sinjoro, la legendo diras, ke Rétaux de Villette, kiam li havis la Kolieron de la Reĝino en la manoj kaj detirinte el ĝi ĉiujn diamantojn kun Jeanne de Valois, ne aŭdacis difekti la muntumon. Li komprenis, ke la diamantoj estas nur ornamaĵo, akcesoraĵo, sed ke la muntumo estas la ĉefa verko, la kreaĵo mem de la artisto, kaj li respektis ĝin. Ĉu vi pensas, ke tiu viro ankaŭ komprenis?

– Mi ne dubas, ke la muntumo ekzistas. La infano respektis ĝin.

– Nu! sinjoro, se okazas al vi renkonti lin, vi diros al li, ke li maljuste gardas unu el tiuj relikvoj, kiuj estas la propraĵo kaj la gloro de kelkaj familioj, kaj ke li povis fortiri el ĝi la gemojn sen ke la Koliero de la Reĝino ĉesigis aparteni al la domo de Dreux-Soubise. Ĝi apartenas al ni kiel nia nomo, kiel nia honoro.

La kavaliro simple respondis:

– Mi diros al li, sinjorino.

Li kliniĝis antaŭ ŝi, salutis la grafon, salutis unu post la alia ĉiujn ĉeestantojn kaj eliris.

Kvar tagojn poste, S-ino de Dreux trovis sur la tablo de sia ĉambro ruĝan juvelujon ornamitan de la blazono de la Kardinalo. Ŝi malfermis ĝin. Tio estis la Koliero de sklaveco de la Reĝino.

Sed ĉar ĉiuj aferoj devas, en la vivo de viro zorga pri unueco kaj logikeco, konverĝi al la sama celo – kaj ĉar iom da reklamo neniam malutilas – la morgaŭon, *Écho de France* publikigis tiun sensaciajn liniojn:

“La Koliero de la Reĝino, la fama juvelo iam ŝtelita al la familio de Dreux-Soubise estis retrovita de Arseno Lupeno. Arseno Lupeno rapidis por redoni ĝin al ĝiaj legitimaj posedantoj. Oni povas nur aplaŭdi tiun delikatan kaj kavalirecan konduton.”

La kera sepo

Staras demando kaj ĝi ofte estis starigita al mi: “Kiel mi konis Arsenon Lupenon?”

Neniu dubas, ke mi konas lin. La detaloj kiujn mi akumulas pri tiu surpriza viro, la nerefuteblaj faktoj kiujn mi eksponas, la novaj pruvoj kiujn mi alportas, la interpreto kiun mi donas pri kelkaj agoj kies eksterajn manifestaĵojn sole oni vidis sen penetri iliajn sekretajn kialojn nek ilian nevideblan mekanismon, ĉio tio ja pruvas, krom intimecon kiun la ekzisto mem de Lupeno nebligis, almenaŭ amikajn rilatojn kaj daŭrajn konfidencojn.

Sed kiel mi konis lin? De kie venas mia favoro esti lia historiografo? Kial mi kaj ne alia?

La respondo estas facila: nur hazardo prezidis elekton, kie mia merito neniel partoprenis. Hazardo lokis min sur lian vojon. Hazarde mi estis enmiksita en unu el liaj plej strangaj kaj misteraj aventuroj, hazarde fine mi estis aktoro en dramo, kies mirinda enscenigisto li estis, malluma kaj kompleksa dramo, trafita de tiaj peripetioj, ke mi sentas ian embarason komencante ĝian rakonton.

La unua akto okazas dum tiu fama nokto de la 22-a al la 23-a de junio, pri kiu oni tiom parolis. Kaj miaflanke, tion ni tuj

diru, mi atribuas la iom nenormalan konduton, kiun mi havis tiuokaze, al la tre aparta spiritostato en kiu mi estis reirante hejmen. Ni vespermanĝis inter amikoj en la restoracio de la Kaskado, kaj, la tutan vesperon, dum ni fumis kaj la cigana orkestro ludis melankoliajn valsojn, ni parolis nur pri krimoj kaj ŝteloj, pri timigaj kaj mallumaj intrigoj. Tio ĉiam estas malbona preparo al dormo.

La Saint-Martin foriris aŭte, Jean Daspry – tiu ĉarma kaj facilanima Daspry, kiu ses monatojn poste estos tiel tragike mortigita ĉe la Maroka landlimo – Jean Daspry kaj mi revenis piede en la malhela kaj varma nokto. Kiam ni alvenis antaŭ la etan hotelon, en kiu mi loĝis de unu jaro en Neuilly, sur la bulvardo Maillot, li diris al mi:

– Ĉu vi neniam timas?

– Kia ideo!

– Damne, tiu pavilono estas tiel izolita! neniuj najbaroj... forlasitaj terenoj... Vere, mi ne estas poltrono, kaj tamen...

– Nu! gaja vi estas!

– Ho! mi diras tion kiel mi dirus alion. La Saint-Martin impresis min per siaj historioj pri rabistoj.

Preminte mian manon, li malproksimiĝis. Mi prenis mian ŝlosilon kaj malfermis.

– Pa! mi flustris. Antonio forgesis lumigi kandelon.

Kaj subite mi rememoris: Antonio forestis, mi forpermesis lin.

Tuj, la ombro kaj la silento iĝis malagrablaj al mi. Mi supreniris ĝis mia ĉambro, palpe, plejeble rapide, kaj senprokraste, male de mia kutimo, mi turnis la ŝlosilon kaj puŝis la riglilon. Poste mi eklumigis.

La kandela flamo reakirigis al mi la memregadon. Tamen mi singardeme detiris el ĝia ingo mian revolveron, longpafdistancan dikan revolveron, kaj mi metis ĝin apud mian liton. Tiu zorgo fintrankviligis min. Mi enlitiĝis kaj, kiel ordinare, por endormiĝi, mi prenis sur la noktotablo la libron, kiu tie atendis min ĉiuvespere.

Mi estis tre mirigita. Anstataŭ la papertranĉilo, per kiu mi markis ĝin la hieraŭon, troviĝis koverto, sigelita de kvin sigeloj el ruĝa vakso. Mi vigle ekkaptis ĝin. Ĝi surhavis kiel adreson miajn nomon kaj antaŭnomon, akompanitajn de tiu mencio:

“Urĝa.”

Letero! letero je mia nomo! Kiu povis meti ĝin ĉi-loken? Iom nervoza, mi ŝiris la koverton kaj legis:

“De la momento kiam vi estos malferminta tiun leteron, kio ajn okazos, kion ajn vi aŭdos, ne plu moviĝu, ne faru geston, ne ekĵetu krion. Se ne, vi estas perdita.”

Ankaŭ mi ne estas poltrono, kaj, tiel bone kiel aliulo, mi scias min teni antaŭ reala danĝero, aŭ rideti pro ĥimeraj riskoj, per kiuj teruriĝas nia imago. Sed mi ripetas, mi estis en nenormala spiritostato, pli facile impresebla, ege nervoza. Kaj

cetere, ĉu ne estis en ĉio ĉi io konfuziva kaj neklarigebla, kiu emociigus la animon de la plej maltima?

Miaj fingroj febre premis la paperan folion, kaj miaj okuloj relegis senĉese la minacajn frazojn... “Ne faru geston... ne ekĵetu krion... se ne vi estas perdita...” Nu do! mi pensis, tio estas iu ŝerco, sulta farso.

Mi estis ridonta, mi eĉ volis laŭte ridi. Kiu malhelpos min? Kiu sendecida timo stringis al mi la gorgon?

Almenaŭ mi blovestingos la kandelon. Ne, mi ne povis ĝin blovestingi. “Neniun geston, aŭ vi estas perdita”, estis skribite.

Sed kial lukti kontraŭ tiaj memsugestoj ofte pli nerezisteblaj ol la plej precizaj faktoj? Necesis nur fermi la okulojn. Mi fermis la okulojn.

Samtempe, mallaŭta bruo pasis en la silento, poste krakoj. Kaj tio devenis, ŝajnis al mi, de apuda ĉambrego, kie mi instalis mian laboran kabineton, kaj el kiu mi estis disigita nur de la antaŭĉambro.

La alprokimiĝo de reala danĝero ekscitegis min, kaj mi havis la impreson ke mi tuj ekstaros, ekprenos mian revolveron, impetos en la ĉambregon. Sed mi ne ekstaris: fronte al mi, unu el la kurtenoj de la maldekstra fenestro estis moviĝinta.

Dubo neebulis: ĝi estis moviĝinta. Ĝi moviĝis ankoraŭ! Kaj mi vidis – ho! mi vidis tion klare – ke estas inter la kurtenoj kaj la fenestro, en tiu tro mallarĝa spaco, homan formon, kies dikeco malpermesis al la ŝtofo rekte fali.

Kaj la estulo ankaŭ vidis min, certe li vidis min tra la tre larĝaj maŝoj de la ŝtofo. Tiam mi ĉion komprenis. Dum la aliaj forportis sian stelaĵon, lia misio estis reteni min. Ĉu ekstari? Ĉu ekpreni revolveron? Neeble... Li estis tie! Je la plej eta gesto, je la plej eta krio, mi estis perdita.

Forta frapo skuis la domon, sekvata de frapetoj duope aŭ triope grupigitaj, kiel tiuj de martelo kiu batas najlojn kaj resaltas. Aŭ almenaŭ jen kion mi imagis, en la konfuzo de mia cerbo. Kaj aliaj bruoj interkruciĝis, vera frakaso kiu pruvis ke oni ne ĝenas sin, kaj ke oni agas tute sekure.

Oni pravis: mi ne moviĝis. Ĉu tio estis malkuraĝo? Ne, pliĝuste neniigo, kompleta nekapablo movi nur unu membron. Saĝo ankaŭ, ĉar fine, kial lukti? Malantaŭ tiu viro estis dek aliaj, kiuj venus je lia voko. Ĉu mi riskos mian vivon por savi kelkajn tapiŝojn kaj kelkajn bagatelajn ornamaĵojn?

Kaj la tutan nokton tiu torturo daŭris. Netolerebla torturo, terura angoro! La bruo interrompiĝis, sed mi ne ĉesigis atendi, ke li rekomencus. Kaj la viro! la viro kiu gvatis min, armon enmane! Mia timigita rigardo ne forlasis lin. Kaj mia koro batis, kaj ŝvito rojis el mia frunto kaj el mia tuta korpo!

Kaj subite neeldirebla feliĉo invadis min: laktista aŭto, kies veturan bruon mi bone konis, pasis sur la bulvardo, kaj mi samtempe havis la impreson, ke aŭroro enŝoviĝis inter la fermitaj persienoj, kaj ke iom da taglumo ekstere miksiĝis al ombro.

Kaj la taglumo enriis la ĉambron. Kaj aliaj aŭtoj pasis. Kaj ĉiuj noktaj fantomoj svenis.

Tiam mi alŝovis brakon al la tablo, malrapide, inside. Kontraŭe nenio moviĝis. Mi markis per la okuloj la kurtenan faldon, la precizan lokon kie necesis celi, mi ekzakte kalkulis la movojn kiujn mi devis fari, kaj, rapide, mi mankaptis mian revolveron kaj pafis.

Mi saltis el la lito kun liberiĝa krio, kaj mi impetis al la kurteno. La ŝtofo estis tratruita, la vitro estis tratruita. Koncerne la viron, mi ne povis trafi lin... pro tiu bona kialo, ke estis neniue.

Neniu! Tiel, la tutan nokton, mi estis hipnotigita de faldo de la kurteno! Kaj dumtempe, latronoj... Furioze, per strebo kiun nenio povus halti, mi turnis la ŝlosilon en la seruro, malfermis la pordon, trairis la antaŭĉambron, malfermis alian pordon, kaj alkuris en la ĉambregon.

Sed stuporo alnajlis min sur la sojlo, anhelantan, konsternitan, ankoraŭ pli mirigitan ol mi estis pro la neesto de la viro: nenio estis malaperinta. Ĉiuj aferoj, kiujn mi supozis forprenitaj: mebloj, pentraĵoj, malnovaj veluroj kaj malnovaj silkoj, ĉiuj tiuj aferoj estis en sia loko!

Nekomprenebla spektaklo! Mi ne povis kredi miajn okulojn! Tamen tiu frakaso, tiuj transloĝigaj bruoj? Mi rondiris tra la ĉambro, mi inspektis la murojn, mi starigis la inventaron de ĉiuj tiuj objektoj, kiujn mi tiel bone konis. Nenio malestis! Kaj kio plej konsternis min, tio estis ke ankaŭ nenio rivelas la pason de la rabistoj, neniue indico, neniue delokita seĝo, neniue piedsigno.

“Nu, nu, mi pensis, prenante mian kapon ambaŭmane, mi ne tamen estas frenezulo! Mi ja aŭdis!...”

Centimetron post centimetro, per la plej detalaj esploraj procedoj, mi ekzamenis la ĉambregon. Tio estis vana. Aŭ pliĝuste... sed ĉu mi povis konsideri tion kiel malkovron? Sub eta persa tapiŝo ĵetita sur la plankon, mi plukis karton, ludkarton. Ĝi estis kera sepo, sama kiel ĉiuj keraj sepoj de la francaj ludkartaroj, sed kiu altiris mian atenton pro iom kurioza detalo. La ekstrema pinto de ĉiu el la sep ruĝaj korformaj markoj, estis borita de truo, la ronda kaj regula truo kiun estus farinta la ekstremaĵo de grifelo.

Jen ĉio. Unu karto kaj unu letero trovita en libro. Krom tio, nenio. Ĉu tio estis sufiĉa por aserti, ke mi ne estis viktimo de sonĝo?

La tutan tagon, mi daŭrigis miajn esplorojn en la salono. Ĝi estis granda ĉambro misproporcia kun la malvasteco de la hotelo, kaj kies ornamado atestis la bizaran guston de tiu, kiu ĝin konceptis. La planko estis farita el mozaiko da buntaj ŝtonetoj, formante larĝajn simetriajn desegnojn. La sama mozaiko tegis la murojn, aranĝite laŭ paneloj: pompejaj alegorioj, bizancaj komponaĵoj, mezepokaj freskoj. Iu Bakĥo rajdis barelon. Imperiestro ore kronita, kun blanka barbo, tenis glavon en la dekstra mano.

Tute supre, iom kiel ateliero, malfermiĝis la unika kaj vasta fenestro. Ĉar tiu fenestro estis ĉiam malfermita dumnokte, estis probable ke la homoj pasis tra tie, helpe de ŝtupetaro. Sed, ankoraŭ tiukaze, neniue certeco. La ŝtupetaraj fosto estus devintaj lasi spurojn sur la argilera grundo de la korto: tute ne estis. La herbo de la forlasita tereno, kiu ĉirkaŭis la hotelon, kredeble estintus freŝe tretita: tia ĝi ne estis.

Mi konfesas, ke mi ne intencis turni min al la polico, tiel senenhavaj kaj absurdaj estis la faktoj, kiujn mi devus eksponi. Oni primokus min. Sed la postmorgaŭon, okazis mia tago de kroniko en *Gil Blas*, kie mi tiam skribis. Obsedite de mia aventuro, mi komplete rakontis ĝin.

La artikolo ne restis nerimarkita, sed mi ja vidis, ke oni ne multe taksas ĝin serioza, kaj ke oni pli volonte konsideras ĝin kiel fantazion ol realan historion. La Saint-Martin ŝercis pri mi. Daspry, tamen, kiu ne malhavis ian kompetentecon pri tiuj faktoj, venis al mi, sciigis pri la afero kaj studis ĝin... sen pli da suceso cetere.

Nu, dum unu el la sekvantaj matenoj, la sonorilo de la kradopordo tintis, kaj Antonio venis averti min, ke sinjoro deziras paroli al mi. Li ne volis doni sian nomon. Mi petis de li supreniri.

Li estis viro proksimume kvardekjara, malhelhara, kun vigla vizaĝo, kaj kies vestaĵoj, puraj sed eluzitaj, signis elegantecan zorgon, kiu kontrastis kun liaj iom vulgaraj manieroj.

Senpere, li diris al mi – per raŭka voĉo, kun akĉentoj kiuj konfirmis al mi la socian situacion de la ulo:

– Sinjoro, dumvojaĝe, en kafejo, *Gil Blas* hazarde trafis miajn okulojn. Mi legis vian artikolon. Ĝi interesis min... multe.

– Mi dankas vin.

– Kaj mi revenis.

– Ha!

– Jes, por paroli al vi. Ĉu ĉiuj faktoj, kiujn vi rakontis, estas ekzaktaj?

– Absolute ekzaktaj.

– Ĉu ne estas unu sola, kiu estas el via imago?

– Ne unu sola.

– Tiukaze, mi eble havus sciigojn por liveri al vi.

– Mi aŭdas vin.

– Ne.

– Kiel, ne?

– Antaŭ ol paroli, necesas ke mi kontrolu ĉu ili estas ĝustaj.

– Kaj por ilin kontroli?

– Necesas ke mi restu sola en tiu ĉambro.

Mi rigardis lin kun surprizo.

– Mi ne bone vidas...

– Tio estas ideo, kiun mi havis legante vian artikolon. Kelkaj detaloj elmontras vere eksterordinaran koincidon kun alia aventuro, kiun hazardo rivelis al mi. Se mi eraris, estas

preferinde ke mi restu silenta. Kaj la unika rimedo por tion scii, estas resti sola...

Kio estis malantaŭ tiu propono? Poste mi rememoris, ke formulante ĝin la viro havas malkvietan mienon, esprimon de anksia fizionomio. Sed, en la nuna momento, kvankam iom surprizite, mi trovis nenion precipe nenormala en lia peto. Kaj plie, tia scivolo spronis min!

Mi respondis:

– Konsentite. Kiom da tempo vi bezonas?

– Ho! tri minutojn, ne pli. Post tri minutoj, mi revenos al vi.

Mi eliris la ĉambron. Malsupre, mi elpoŝigis mian horloĝon. Unu minuto pasis. Du minutoj... Kial do mi sentis min korpremita? Kial tiuj momentoj ŝajnis al mi pli solenaj ol aliaj?

Du minutoj kaj duono... Du minutoj kaj tri kvaronoj... Kaj subite pafo tondris.

En kelkaj saltoj mi suprengrimpis la ŝtupojn kaj mi eniris. Horora ekkrio eliĝis el mi.

Meze de la ĉambro la viro sterniĝis, senmova, kuŝanta sur la maldekstra flanko. Sango fluis el lia kranio, miksitita kun cerbaj ŝirpecoj. Apud lia pugno, revolvero tute fumanta.

Konvulsio ekskuis lin, kaj ĉio finiĝis.

Sed ankoraŭ pli ol tiu terura spektaklo, io frapis min, io pro kio mi ne tuj vokis helpon, kaj pro kio mi ne ekgenuis por vidi ĉu la viro spiras. Du paŝojn apud li, surplanke, estis kera sepo!

Mi plukis ĝin. La sep ekstremaĵoj de la sep ruĝaj markoj, estis boritaj de truo...

Duonhoron poste, la polica komisaro de Neuilly alvenis, kaj tiam la jurmedicinisto, kaj tiam la Sekureca estro, S-ro Dudouis. Mi ja detenis min tuŝi la kadavron. Nenio povis falsi la unuajn konstatojn.

Ili estis mallongaj, des pli mallongaj, ke unue oni malkovris nenion, aŭ malmulton. En la poŝoj de la mortinto, neniun legitimaĵon, sur lia tolaĵo neniun nomon, sur lia vesto neniun inicialon. Entute, ne unu indicon ebligantan determini lian identecon. Kaj en la ĉambro, la sama ordo kiel antaŭe. La mebloj ne estis movitaj, kaj la objektoj konservis sian antaŭan pozicion. Tamen tiu viro ne venis al mia hejmo kun la unika intenco sin mortigi, kaj ĉar li taksis mian domon pli taŭga ol iu alia, por lia suicido! Necesis, ke motivo decidigu lin al tiu malespera ago, kaj ke tiu motivo mem rezultu el nova fakto, konstatita de li dum la tri minutoj, kiujn li pasigis sola.

Kiu fakto? Kion li vidis? Kion li eltrovis? Kiun teruran sekreton li penetris? Nenia supozo eblis.

Sed lastmomente, okazis incidento, kiu ŝajnis al ni konsiderinde interesa. Kiam du agentoj malleviĝis por preni la kadavron kaj forporti ĝin sur brankardo, ili ekrimarkis ke la maldekstra mano, ĝis tiam fermita kaj rigida, malstreĉiĝis, kaj

ke vizitkarto, tute ĉifita, eliĝis el ĝi.

Tiu karto surhavis: *Georgo Andermatt, 37 strato Berri.*

Kion tio signifis? Georgo Andermatt estis grava bankestro en Parizo, fondinto kaj prezidanto de tiu Kontoro de la Metaloj, kiu donis tian impulson al la francaj metalurgiaj industrioj. Li ĝuis luksan vivon, posedis kaleŝon, aŭtomobilon, vetkuran ĉevalejon. Liaj kunsidoj estis tre frekventitaj kaj oni citis S-inon Andermatt pro ŝia gracieco kaj ŝia beleco.

– Ĉu tio estus la nomo de la mortinto? mi murmuris.

La Sekureca estro sin klinis:

– Tio ne estas li. S-ro Andermatt estas viro pala kaj iom grizhara.

– Sed tiam, kial tiu karto?

– Ĉu vi havas telefonon, sinjoro?

– Jes, en la vestiblo. Se vi bonvolas akompani min.

Li serĉis en la adresaro kaj petis la 415-21.

– Ĉu S-ro Andermatt estas hejme? Bonvolu diri al li, ke S-ro Dudouis petas lin plej haste ĉe 102 bulvardo Maillot. Tio urĝas.

Dudek minutojn poste, S-ro Andermatt eliĝis el sia aŭtomobilo. Oni eksponis al li la kialojn, kiuj necesis lian intervenon, poste oni kondukis lin antaŭ la kadavron.

Li havis sekundon da emocio, kiu kuntiris lian vizaĝon, kaj eldiris mallaŭte, kvazaŭ li parolus kontraŭvole:

– Stefano Varin.

– Ĉu vi konas lin?

– Ne... aŭ almenaŭ jes... sed nur laŭvide. Lia frato...

– Ĉu li havas fraton?

– Jes, Alfredo Varin... Lia frato iam venis peti min... mi ne plu scias pri kio...

– Kie li loĝas?

– La du fratoj loĝis kune... ĉe la strato de Provenco, mi kredas.

– Kaj vi ne suspektas la kialon, pro kiu ĉi tiu sin mortigis?

– Tute ne.

– Tamen tiu karto, kiun li tenis enmane?... Via karto kun via adreso!

– Mi komprenas nenion. Tio videble estas nur hazardo, kiun la enketo klarigos.

Hazardo ĉiukaze ja kurioza, mi pensis, kaj mi sentis ke ni ĉiuj spertas la saman impreson.

Tiun impreson mi retrovis en la morgaŭaj gazetoj, kaj ĉe ĉiuj el miaj amikoj kun kiuj mi interparolis pri la aventuro. Meze de la misteroj kiuj komplikis ĝin, post la duobla malkovro, tiel konsterna, de tiu kera sepo sepfoje truita, post la du eventoj, tiel enigmaj unu kiel la alia, kies okazejo mia domo estis, tiu karto ŝajnis fine promesi iom da lumo. Danke al ĝi oni alvenus al la vero.

Sed, male de la prognozoj, S-ro Andermatt donis nenian indikaĵon.

– Mi diris kion mi sciis, li ripetis. Kion plian oni volas? Mi estas la unua mirigita, ke tiu karto estis trovita tie, kaj mi atendas kiel ĉiuj, ke tiu punkto estu klarigita.

Ĝi ne estis tia. La enketo elmontris, ke la fratoj Varin, svisdevenaj, havis sub malsamaj nomoj tre tumultan vivon, frekventante drinkejaĉojn, en kontakto kun tuta bando da fremduloj, pri kiu la polico zorgis, kaj kiu disiĝis post serio da rompŝteladoj, en kiuj lia partopreno estis demonstrita nur poste. Ĉe la numero 24 de la strato de Provenco, kie la fratoj Varin efektive loĝis ses jarojn antaŭe, oni ne sciis, kio li fariĝis.

Mi konfesas miaflanke, ke tiu afero ŝajnis tiel implikita, ke mi ne multe kredis je la eblo de solvo, kaj mi klopodis ne plu pensi pri ĝi. Sed Jean Daspry, male, kiun mi multe vidis tiepoke, ĉiutage pli pasiĝis.

Li estis tiu, kiu sciigis al mi tiun eĥon de fremda ĵurnalo, kiun la tuta gazetaro ripetis kaj komentis:

“Oni baldaŭ okazigos, en la ĉeesto de la Imperiestro, kaj en loko kiun oni tenos sekreta ĝis la lasta minuto, la unuajn provojn de submarŝipo, kiu devas revoluciigi la estontajn kondiĉojn de la mara milito. Maldiskretaĵo rivelis al ni ĝian nomon: ĝi nomiĝas la Kera Sepo.”

La Kera Sepo? Ĉu tio estis hazarda koincido? Aŭ ĉu oni starigu rilaton inter la nomo de tiu submarŝipo kaj la incidentoj pri kiuj ni parolis? Sed kian rilaton? Kio okazis ĉi tie neniel povis rilati al kio okazis tie for.

– Kion vi scias prie? diris Daspry al mi. La plej malsamaj efikoj ofte devenas de unika kaŭzo.

La postmorgaŭon, alia eĥo alvenis al ni:

“Oni pretendas, ke la planoj de la Kera Sepo, la submarŝipo kies elprovoj tre baldaŭ okazos, estis plenumitaj de francaj inĝenieroj. Tiuj inĝenieroj, vane petinte la subtenon de siaj samlandanoj, estus turnintaj sin poste, sen pli da sukceso, al la angla Admiralitato. Ni sciigas tiujn novaĵojn sen garantio.”

Mi ne aŭdacas insisti pri faktoj denature plej tiklaj, kaj kiuj kaŭzis, oni ankoraŭ memoras, tiel konsiderindan emocion. Tamen, ĉar ĉiu danĝero de komplikiĝo estas flankenmetita, mi ja parolu pri la artikolo de *Écho de France*, kiu tiam estigis multan bruon, kaj kiu ĵetis sur la aferon de la Kera Sepo, kiel oni nomis ĝin, kelkajn klarigojn... nebulajn.

Jen ĝi, tia kia ĝi aperis sub la subskribo Salvatoro:

*LA AFERO DE LA “KERA SEPO”
ANGULO DE LA VUALO LEVITA.*

“Ni estos mallongaj. Antaŭ dek jaroj, juna industria inĝeniero, Ludoviko Lacombe, deziranta dediĉi siajn tempon kaj riĉon al la studoj kiujn li daŭrigis, demisiis kaj luis, ĉe la numero 102 de la bulvarado Maillot, etan hotelon kiun itala grafo antaŭ nelonge konstruigis kaj ornamigis. Pere de du uloj, la fratoj Varin, el Laŭzano, el kiuj unu asistis lin kiel pretigisto dum liaj eksperimentoj, kaj la alia serĉis al li komanditantojn, li interrilatis kun S-ro Georgo Andermatt, kiu ĵus fondis la Kontoron de la Metaloj.

Post pluraj interparoloj, li sukcesis interesi lin al projekto de submarŝipo pri kio li laboris, kaj estis konsentite, ke tuj de la definitiva elfaro de la inventaĵo, S-ro Andermatt uzos sian influon por obteni el la Mararmea ministrejo serion da provoj.

Dum du jaroj, Ludoviko Lacombe asidue frekventis la hotelon Andermatt kaj submetis al la bankestro la perfektigojn, kiujn li alportis al sia projekto, ĝis la tago kiam, mem kontenta pri sia laboro, trovinte la definitivajn formulojn kiun li serĉis, li petis al S-ro Andermatt ekigi la demarŝojn.

Tiun tagon, Ludoviko Lacombe vespermanĝis ĉe la familio Andermatt. Li foriris, vespere, ĉirkaŭ la dek unua kaj duono. De tiam, oni ne plu revidis lin.

Relegante la tiamajn gazetojn, oni vidus ke la familio de la junulo alvokis la justicon kaj la prokuroraro malkvietiĝis. Sed oni atingis neniun certon, kaj estis ĝenerale koncedite ke Ludoviko Lacombe, konsiderata kiel originala kaj lunatika

fraŭlo, forvojaĝis sen averti iun ajn.

Ni agnosku tiun hipotezon... neverŝajnan. Sed staras demando, plej grava por nia lando: kio fariĝis la planoj de la submarŝipo? Ĉu Ludoviko Lacombe forportis ilin? Ĉu ili estas detruitaj?

El la tre serioza enketo kiun ni kondukis, rezultas ke tiuj planoj ekzistas. La fratoj Varin havis ilin en la manoj. Kiel? Ni ne ankoraŭ povis tion demonstri, samkiel ni ne scias kial ili ne prefere provis ilin vendi. Ĉu ili timis, ke oni demandos al ili, kiel ili ekposedis ilin? Ĉiuokaze, tiu timo ne daŭris, kaj ni povas tutcerte aserti tion: la planoj de Ludoviko Lacombe estas la propraĵo de fremda potenco, kaj ni povas publikigi la korespondon interŝanĝitan tiurilate inter la fratoj Varin kaj la reprezentanto de tiu potenco. Nuntempe la Kera Sepo imagita de Ludoviko Lacombe estas realigata de niaj najbaroj.

Ĉu la realo respondos al la optimismaj prognozoj de tiuj, kiuj estis enmiksitaĵoj en tiun perfidon? Ni havas, por esperi la malon, kialojn kiujn la okazontaĵo, ni dezirus tion kredi, ne trompos.”

Kaj postskribo aldonis:

“Lastminute. – Ni prave esperis. Niaj privataj informoj ebligas nin anonci, ke la elprovoj de la Kera Sepo ne estis kontentigaj. Iom probablas, ke al la planoj liveritaj de la fratoj Varin, mankis la lasta dokumento alportita de Ludoviko Lacombe al S-ro Andermatt la vesperon de lia malapero, dokumento nepre necesa al la tuta kompreno de la projekto, ia

resumo kie oni trovas la definitivajn konkludojn, la taksadojn kaj la mezurojn enhavitajn en la aliaj paperoj. Sen tiu dokumento, la planoj estas nekompletaj; samkiel sen la planoj, la dokumento estas senutila.

Do ankoraŭ estas la tempo agi kaj repreni, kio apartenas al ni. Por tiu malfacilega tasko, ni multe kalkulas je la helpo de S-ro Andermatt. Li bonvole klarigos la nekompreneblan konduton, kiun li havis dekomence. Li diros ne nur kial li ne rakontis, kion li sciis je la momento de la suicido de Stefano Varin, sed ankaŭ kial li neniam rivelis la malaperon de la paperoj, kiujn li jam konis. Li diros kial, de ses jaroj, li gvatigas la fratojn Varin de agentoj je sia servo.

Ni atendas de li, ne parolojn, sed agojn. Se ne...”

La minaco estis abrupta. Sed en kio ĝi konsistis? Kiun preman rimedon Salvatore, la aŭtoro... anonima de la artikolo, havis sur Andermatt?

Svarmo da raportistoj sturmis la bankestron, kaj, dek intervjuoj esprimis la malestimon, kun kiu li respondis al tiu truda voko. Post kio, la gazetisto de Écho de France rebatis per tiuj tri linioj:

“Vole nevole, S-ro Andermatt estas, ekde nun, nia kunlaboranto en la tasko, kiun ni entreprenas.”

La tagon kiam aperis tiu repliko, Daspry kaj mi vespermanĝis kune. Dum la vespero, kun la gazetoj sternitaj sur mia tablo, ni pridiskutis la aferon kaj ekzamenis ĉiujn ĝiajn aspektojn kun tia inciteco, kian oni spertus senfine marŝante en mallumo kaj ĉiam kolizianta kontraŭ la samaj obstakloj.

Kaj subite, sen ke mia servisto avertis min, sen ke la sonorilo tintis, la pordo malfermiĝis, kaj virino eniris, kovrite de dika vualo.

Mi tuj ekstaris kaj antaŭeniris. Ŝi diris al mi:

– Ĉu vi, sinjoro, loĝas tie?

– Jes, sinjorino, sed mi konfesas al vi...

– La kradopordo sur la bulvardo ne estis fermita, ŝi klarigis.

– Sed pri la pordo de la vestiblo?

Ŝi ne respondis, kaj mi pensis, ke ŝi kredeble ĉirkaŭiris per la servista ŝtuparo. Ĉu ŝi do konis la vojon?

Ekestis silento iom embarasa. Ŝi rigardis Daspry. Kontraŭvole, kiel mi estus farinta en salono, mi prezentis lin. Poste mi petis al ŝi eksidi kaj eksponi al mi la celon de sia vizito.

Ŝi demetis sian vualon kaj mi vidis, ke ŝi estas brunhara, kun harmonia vizaĝo, kaj, krom tre bela, kun senfina ĉarmo kiu ĉefe devenis de ŝiaj okuloj, gravaj kaj doloraj okuloj.

Ŝi simple diris:

– Mi estas sinjorino Andermatt.

– Sinjorino Andermatt! mi ripetis, pli kaj pli mirigite.

Nova silento, kaj ŝi daŭrigis per kvieta voĉo, kaj kun mieno plej trankvila:

– Mi venas pro tiu afero... kiun vi scias. Mi pensis, ke mi eble povos ricevi ĉe vi kelkajn informojn...

– Dio mia, sinjorino, mi konas pri ĝi ne pli ol kion diris la gazetoj. Bonvolu precizigi kiel mi povas utili al vi.

– Mi ne scias... Mi ne scias...

Nur tiam mi havis la intuicion, ke ŝia kvieto estas falsa, kaj ke, malantaŭ tiu mieno de perfekta sekureco, sin kaŝis granda konfuzo. Kaj ni silentis, tiel ĝenataj unu kiel la alia.

Sed Daspry, kiu ne ĉesigis observi ŝin, alproksimiĝis kaj diris al ŝi:

– Ĉu vi permesas, sinjorino, ke mi starigu al vi kelkajn demandojn?

– Ho! jes, ŝi ekkriis, tiel mi parolos.

– Vi parolos... kiuj ajn estas tiuj demandoj?

– Kiuj ajn ili estas.

Li pripensis kaj eldiris:

– Ĉu vi konas Ludovikon Lacombe?

– Jes, pere de mia edzo.

- Kiam vi vidis lin lastfoje?
- La vesperon, kiam li vespemanĝis en nia hejmo.
- Tiun vesperon, ĉu nenio pensigis al vi, ke vi ne plu revidos lin?
- Ne. Li ja aludis vojaĝon en Rusio, sed tiel svage!
- Vi do planis revidi lin, ĉu?
- La postmorgaŭon, por vespermanĝi.
- Kaj kiel vi klarigas tiun malaperon?
- Mi ne klarigas ĝin.
- Kaj S-ro Andermatt?
- Tion mi ne scias.
- Tamen...
- Ne demandu al mi pri tio.
- La artikolo de *Écho de France* ŝajnas diri...
- Kion li ŝajnas diri, estas ke la fratoj Varin ne estas fremdaj al tiu malapero.
- Ĉu tio estas via opinio?

– Jes.

– Sur kio baziĝas via konvinko?

– Forlasante nin, Ludoviko Lacombe portis tekon, kiu enhavis ĉiujn paperojn rilatajn al lia projekto. Du tagojn poste, estis inter mia edzo kaj unu el la fratoj Varin, tiu vivanta, interparolo dum kiu mia edzo akiris la pruvon, ke tiuj paperoj estas en la manoj de la du fratoj.

– Kaj li ne denunciis ilin?

– Ne.

– Kial?

– Ĉar, en la teko, troviĝis io alia ol la paperoj de Ludoviko Lacombe.

– Kio?

Ŝi hezitis, estis respondonta, sed fine plu silentis. Daspry daŭrigis:

– Jen do la kialo pro kiu via edzo, sen averti la policon, gvatigis la du fratojn. Li esperis samtempe rekapti la paperojn kaj tiun aferon... kompromitan per kiu la du fratoj iel ĉantaĝis lin.

– Lin... kaj min.

– Ha! ĉu ankaŭ vin?

– Ĉefe min.

Ŝi artikulaciis tiujn du vortojn per obtuza voĉo. Daspry observis ŝin, faris kelkajn paŝojn, kaj revenante al ŝi:

– Ĉu vi skribis al Ludoviko Lacombe?

– Certe... mia edzo rilatis...

– Ekster la oficialaj leteroj, ĉu vi ne skribis al Ludoviko Lacombe... aliajn leterojn? Pardonu mian insiston, sed nepras ke mi sciu la tutan veron. Ĉu vi skribis aliajn leterojn?

Tute ruĝiĝante, ŝi murmuris:

– Jes.

– Kaj tiujn leterojn posedis la fratoj Varin?

– Jes.

– Ĉu do S-ro Andermatt scias tion?

– Li ne vidis ilin, sed Alfredo Varin rivelis al li ilian ekziston, minacante publikigi ilin se mia edzo agus kontraŭ ili. Mia edzo timis... li cedis antaŭ la skandalo.

– Tamen li faris ĉion eblan por eltiri tiujn leterojn el ili.

– Li faris ĉion eblan... almenaŭ mi supozas tion, ĉar, de tiu lasta interparolo kun Alfredo Varin, kaj post la kelkaj tre violentaj vortoj per kiuj li priskribis ĝin al mi, ne plu estis inter

mia edzo kaj mi iu intimeco, iu kunfido. Ni vivas kiel du fremduloj.

– Tiukaze, se vi havas nenion por perdi, kion vi timas?

– Kiom ajn indiferenta mi fariĝis por li, mi estas tiu kiun li amis, tiu kiun li estus povinta ankoraŭ ami – ho! pri tio mi certas, ŝi murmuris per arda voĉo, li ankoraŭ estus aminta min, se li ne ekkaptis tiujn damnindajn leterojn...

– Kion! li sukcesis... Sed la du fratoj estis suspektemaj, ĉu?

– Jes, kaj ili eĉ fanfaronis, laŭdire, ke ili havas sekuran kaŝejon.

– Tiam?...

– Mi havas bonajn kialojn kredi, ke mia edzo malkovris tiun kaŝejon!

– Nu do! kie ĝi estis?

– Tie.

Mi eksaltis.

– Tie?

– Jes, kaj mi ĉiam suspektis tion. Ludoviko Lacombe, tre inĝenia, pasia ŝatanto pri mekaniko, amuziĝis, dum sia libertempo, elfarante sekurŝrankojn kaj serurojn. La fratoj Varin kredeble ekvidis kaj, poste, uzis unu el tiuj kaŝejoj por

malmontri la leterojn... kaj ankaŭ aliajn aferojn verŝajne.

– Sed ili ne loĝis tie, mi ekkriis.

– Ĝis via alveno, antaŭ kvar monatoj, tiu pavilono restis neokupata. Do estas probable, ke ili revenis tien, kaj ili krome pensis ke via ĉeesto ne ĝenos ilin, la tagon kiam ili bezonos maldeponi ĉiujn siajn paperojn. Sed ili kalkulis sen mia edzo kiu, dum la nokto de la 22-a al la 23-a de junio, perfortis la sekurŝrankon, prenis... kion li serĉis, kaj lasis sian karton por bone montri al la du fratoj, ke li ne plu timu ilin, kaj ke la roloj ŝanĝiĝis. Du tagojn poste, avertite de la artikolo de *Gil Blas*, Stefano Varin sin prezentis ĉe vi hastege, restis sola en tiu salono, trovis la sekurŝrankon malplena, kaj sin mortigis.

Post momento, Daspry demandis:

– Tio estas simpla supozo, ĉu ne? Ĉu S-ro Andermatt nenion diris al vi?

– Ne.

– Ĉu lia sinteno rilate vin ne ŝanĝiĝis? Ĉu li ne ŝajnis al vi pli malluma, pli maltrankvila?

– Ne.

– Kaj vi kredas, ke estus tiel se li estus trovinta la leterojn! Miaopinie, li ne havas ilin. Miaopinie, li ne eniris tien.

– Sed kiu tiukaze?

– La mistera persono, kiu kondukas tiun aferon, kiu kontrolas ĝian tutan mekanismon, kaj kiu direktas ĝin al celo kiun ni nur ekvidas tra tiom da komplikaĵoj, la mistera persono, kies videblan kaj ĉiopovan agon oni sentas de la unua horo. Estas li kaj liaj amikoj kiuj eniris tiun hotelon la 22-a de junio, estas li kiu malkovris la kaŝejon, estas li kiu lasis la karton de S-ro Andermatt, estas li kiu havas la korespondaĵon kaj la pruvojn de la perfido de la fratoj Varin.

– Kiu, li? mi interrompis, ne sen malpacienco.

– La gazetisto de *Écho de France*, je Dio, tiu Salvatoro! Ĉu tio ne estas blindiga evidenteco? Ĉu li ne donas en sia artikolo detalojn, kiujn nur la homo penetrinta la sekretojn de la du fratoj povas koni?

– Tiukaze, balbutis S-ino Andermatt, kun teruro, li havas ankaŭ miajn leterojn, kaj siavice li minacas mian edzon! Kion fari, Dio mia!

– Skribi al li, nete deklaris Daspry, konfidi sin al li senpere, rakonti al li ĉion, kion vi scias kaj ĉion, kion vi povas sciigi.

– Kion vi diras!

– Via interesiĝo estas la sama kiel lia. Estas sendube, ke li agas kontraŭ la postvivanto el la du fratoj. Ne kontraŭ S-ro Andermatt li volas batali, sed kontraŭ Alfredo Varin. Helpu lin.

– Kiel?

– Ĉu via edzo havas tiun dokumenton kiu kompletigas kaj kiu ebligas uzi la planojn de Ludoviko Lacombe?

– Jes.

– Avertu Salvatoron pri tio. Laŭbezone, provu havigi al li tiun dokumenton. Resume, ekkorespondu kun li. Kion vi riskas?

La konsilo estis aŭdaca, eĉ danĝera unuavide; sed S-ino Andermatt ne havis multajn alternativojn. Ĉiuokaze, kiel diris Daspry, kion ŝi riskus? Se la nekonato estus malamiko, tiu ago ne pligravigus la situacion. Se li estus fremdulo kiu strebas precizan celon, li devus konsideri tiujn leterojn nur kun duaranga graveco.

Ĉiel ajn, tie estis ideo, kaj S-ino Andermatt, en sia konfuzo, estis tiom feliĉa aliĝi al ĝi. Ŝi korelverŝe dankis nin, kaj promesis teni nin informitaj.

La postmorgaŭon, efektive, ŝi sendis al ni tiun mesaĝon, kiun ŝi ricevis responde:

“La leteroj ne troviĝis tie. Sed mi havos ilin, estu trankvila. Mi atentis pri ĉio. S.”

Mi prenis la paperon. Estis la manskribo de la bileto, kiun oni enŝovis en mian litkapan libron, dum la vespero de la 22-a de junio.

Daspry do pravis, Salvatoro ja estis la granda organizanto de tiu afero.

Verdire, ni komencis distingi iujn briletojn tra la tenebro kiu ĉirkaŭis nin, kaj kelkaj punktoj klariĝis per neatendita lumo. Sed kiom aliaj restis malhelaj, kiel la malkovro de la du keraj sepoj! Miaflanke, mi ĉiam revenis tien, eble pli scivoligita

ol necese de tiuj du kartoj, kies sep truataj figuretoj trafis miajn okulojn dum tiel konfuzivaj cirkonstancoj. Kiun rolon ili ludis en tiu dramo? Kian gravecon oni atribuu al ili? Kiujn konkludojn oni tiru el tio, ke la submarŝipo konstruita laŭ la planoj de Ludoviko Lacombe nomiĝas Kera Sepo?

Daspry, siaflanke, ne multe zorgis pri la du kartoj, plene studante alian problemon, kies solvo ŝajnis al li pli urĝa: li senlace serĉis la faman kaŝejon.

– Kaj kiu scias, li diris, ĉu mi ne trovus la leterojn, kiujn Salvatore tie ne trovis... eble senintence. Tiom malmulte kredeblas, ke la fratoj Varin forprenis de loko, kiun ili supozis neatingebla, la armilon kies netakseblan valoron ili sciis.

Kaj li serĉis. Ĉar la ĉambrego baldaŭ ne plu havis sekretojn por li, li disvastigis siajn esplorojn al ĉiuj aliaj ĉambroj de la pavilono: li traserĉis la internon kaj la eksteron, li ekzamenis la ŝtonojn kaj la brikojn de la muregoj, li levis la ardezojn de la tegmento.

Tagon, li alvenis kun pioĉo kaj ŝovelilo, donis al mi la ŝovelilon, konservis la pioĉon kaj, montrante la forlasitan terenon:

– Antaŭen.

Mi sekvis lin sen entuziasmo. Li dividis la terenon en plurajn sekciojn, kiujn li inspektis laŭvice. Sed, en malvasta loko, ĉe la angulo kiun formis la muroj de la du apudaj bienoj, amaso da konstruŝtonoj kaj ŝtonetoj kovritaj de rubusoj kaj herboj altiris lian atenton. Li ekfosis.

Mi devis helpi lin. Dum unu horo, sub plena suno, ni senutile penis. Sed kiam, sub la disŝovelitaj ŝtonoj, ni atingis la grundon mem kaj entrancis ĝin, la pioĉo de Daspry nudigis ostaĵojn, skeletan restaĵon ĉirkaŭ kiu ankoraŭ disfadeniĝis kelkaj pecoj da vestoj.

Kaj subite mi sentis min paliĝi. Mi ekvidis, enprofundigitan en la tero, etan ferplaton, ortangulforme tranĉitan, kaj kie mi ŝajne distingis ruĝajn makulojn. Mi kliniĝis. Ja estis tio: la plato havis la dimensiojn de ludkarto, kaj la ruĝaj makuloj, el minia ruĝo ie-tie korodita, estis sepopaj, aranĝitaj kiel la sep punktoj de kera sepo, kaj boritaj de truo ĉe ĉiuj sep ekstremaĵoj.

– Aŭskultu, Daspry, mi tediĝas pro ĉiuj tiuj historioj. Des pli bone por vi se ili interesas vin. Miaflanke, mi forlasas vin.

Ĉu tio estis la emocio? Ĉu la laceco pro laboro farita sub tro akra suno? Ajnkiale, mi ŝanceliĝis forirante, kaj mi devis iri en la liton, kie mi restis kvardek ok horojn, febra kaj varmega, obsedite de skeletoj kiuj dancis ĉirkaŭ mi kaj ĵetis unu al la alia siajn sangoplenajn korojn.

Daspry estis fidela al mi. Ĉiutage, li konsentis al mi tri aŭ kvar horojn, kiujn li pasigis, verdire, en la ĉambrego, traserĉante, perkutante, kaj frapetante.

– La leteroj estas tie, en tiu ĉambro, li venis diri al mi tempaltempe, ili estas tie. Mi pretus veti.

– Lasu min en paco! mi respondis, incitegita.

La matenon de la tria tago, mi ellitiĝis, ankoraŭ iom malforta, sed bonfarta. Abunda matenmanĝo revigligis min. Sed pneŭmatika telegramo, kiun mi ricevis ĉirkaŭ la kvina, kontribuis pli ol ĉio al mia plena resaniĝo, tiom mia scivolemo, denove kaj malgraŭe, estis spronita.

La telegramo enhavis tiujn vortojn:

“Sinjoro,

La dramo, kies unua akto okazis dum la nokto de la 22-a al la 23-a de junio baldaŭ elnodiĝos. Ĉar la aferoj mem postulas, ke mi frontigu unu kontraŭ la alia ambaŭ ĉefrolulojn de tiu dramo, kaj ke tiu konfronto okazu ĉe via hejmo, mi estus senfine danka al vi se vi pruntus al mi vian domon por la hodiaŭa vespero. Estus bone ke, de la naŭa ĝis la dek unua, via servisto forestu, kaj preferinde ke vi mem komplezege bonvolu liberigi la lokon al la kontraŭuloj. Vi povis konstati, dum la nokto de la 22-a al la 23-a de junio, ke mi plej skrupule respektis ĉion el via posedaĵo. Miaflanke, mi kredus insulti vin se mi dubus nur momenteton pri via absoluta diskretemo rilate la subskribanto.

Via sindediĉanto,

SALVATORO.”

Estis en tiu letero tono de ĝentila ironio, kaj, en la peto eksprimita, tiel bela fantazio, ke mi delektiĝis. Estis ĉarma facilanimeco, kaj mia korespondanto ŝajnis tiom certa pri mia konsento! Kontraŭ nenio en la mondo, mi volis desaponti lin aŭ respondi al lia fido per sendankeco.

Je la oka, mia servisto, al kiu mi donacis teatran sidlokon, ĵus eliris, kiam Daspry alvenis. Mi montris al li la telegramon.

– Nu? li diris al mi.

– Nu! mi lasas la ĝardenan kradopordon malfermita, por ke oni povu eniri.

– Kaj vi foriras?

– Certe ne!

– Sed ĉar oni petas de vi...

– Oni petas de mi diskretemon. Mi estos diskreta. Sed mi furioze deziras vidi, kio okazos.

Daspry ekridis.

– Nu, vi pravas, kaj mi ankaŭ restas. Mi imagas, ke ni ne enuos.

Ektinto de sonorilo interrompis lin.

– Ĉu jam ili? li murmuris, kaj dudek minutojn antaŭtempe! Neeble.

El la vestiblo, mi tiris la kordonon, kiu malfermis la kradon. Virina silueto trairis la ĝardenon: S-ino Andermatt.

Ŝi ŝajnis emociskuita, kaj sufokiĝante ŝi balbutis:

– Mia edzo... li venas... li havas rendezvuon... oni devas doni al li la leterojn...

– Kiel vi scias tion? mi diris.

– Hazardo. Mesaĝo kiun mia edzo ricevis dum la vespermanĝo.

– Ĉu pneŭmatika telegramo?

– Telefona mesaĝo. La servisto donis ĝin al mi erare. Mia edzo tuj prenis ĝin, sed estis tro malfrue... mi jam legis.

– Vi jam legis...

– Proksimume tion: *“Je la naŭa, ĉi-vespere, estu ĉe la bulvardo Maillot kun la dokumentoj rilataj al la afero. Interŝanĝe, la leterojn.”* Post la vespermanĝo mi reiris supren en mian ĉambron kaj mi eliris.

– Kaŝe de S-ro Andermatt?

– Jes.

Daspry rigardis min.

– Kion vi pensas pri tio?

– Mi pensas, kion vi pensas, ke S-ro Andermatt estas unu el la alvokitaj kontraŭuloj.

– De kiu? kaj kiucele?

– Ĝuste tion ni baldaŭ scios.

Mi kondukis ilin en la ĉambregon.

Ni povis, eventuale, teniĝi ĉiuj tri sub la kamenkapuĉo, kaj kaŝiĝi malantaŭ la velura tapiŝo. Ni instaligis. S-ino Andermatt eksidis inter ni ambaŭ. Tra la kurtenaj fendoj la tuta ĉambro videblis.

La naŭa sonoris. Kelkajn minutojn poste la ĝardeno kradopordo grincis sur siaj hokoj.

Mi konfesas, ke mi ne estis sen senti ian angoron, kaj ke nova febro min ekscitegis. Mi estis scionta la solvon de la enigmo! La konsterna aventuro, kies peripetioj disvolviĝis antaŭ mi de semajnoj, finfine estis klariĝonta, kaj antaŭ miaj okuloj la batalo estis komenĉiĝonta.

Daspry ekprenis la manon de S-ino Andermatt kaj flustris:

– Ĉefe, ne unu moviĝon! Kion ajn vi aŭdos aŭ vidos, restu stoika.

Iu eniris. Kaj mi tuj rekonis, laŭ lia granda simileco kun Stefano Varin, lian fraton Alfredo. Saman pezan paŝmanieron, saman grizan vizaĝon invaditan de barbo.

Li eniris kun la malkvieta mieno de viro, kiu kutimas timi insidaĵojn ĉirkaŭ li, kiu antaŭflaras ilin kaj evitas ilin. En unu ekrigardo li ĉirkaŭvidis la tutan ĉambron kaj mi havis la impreson, ke tiu kamento maskita de velura pordo estas malagrabla al li. Li faris tri paŝojn al ni. Sed ideo, sendube pli

imperativa, deturnis lin, ĉar li oblikvis al la muro, haltis antaŭ la maljuna reĝo en mozaiko, kun blanka barbo, kun flama glavo, kaj ekzamenis lin longe, grimpante sur seĝon, sekvante per la fingro la konturon de la ŝultroj kaj de la vizaĝo, kaj palpante iujn partojn de la bildo.

Sed subite li saltis el sia seĝo kaj malprokimiĝis de la muro. Paŝbruo laŭtis. Sur la sojlo aperis S-ro Andermatt.

La bankesto eligis krion pro surprizo.

– Vi! Vi! Ĉu estas vi, kiu vokis min?

– Ĉu mi? sed tute ne, protestis Varin per raŭka voĉo kiu rememorigis al mi tiun de la frato, estas via letero kiu revenigis min.

– Mia letero!

– Letero subskibita de vi, kie vi proponas al mi...

– Mi ne skribis al vi.

– Ĉu vi ne skribis al mi?

Instinkte, Varin ekiĝis suspektema, ne kontraŭ la bankestro, sed kontraŭ la nekonata malamiko kiu altiris lin en tiun kaptilon. Duafoje, liaj okuloj turniĝis al nia flanko, kaj, rapide, li direktiĝis al la pordo.

S-ro Andermatt baris al li la vojon.

– Kion vi do faras, Varin?

– Estas malantaŭ tio maĥinacioj, kiuj ne plaĉas al mi. Mi foriras. Bonan vesperon.

– Momenton!

– Nu, sinjoro Andermat, ne insistu, ni ne plu havas ion por diri.

– Ni havas multon por diri kaj la okazo estas tro bona...

– Lasu min pasi.

– Ne, ne, ne, vi ne pasos.

Varin retropaŝis, timidigite de la decidema sinteno de la bankestro, kaj li grumblis:

– Ek, rapide, ni babilu, kaj tio finiĝu!

Afero mirigis min, kaj mi ne dubis, ke miaj du kunuloj spertas la saman desapontiĝon. Kiel povis, ke Salvatoro ne estas tie? Ĉu li ne projektis interveni? Kaj ĉu la nura konfronto de la bankestro kaj Varin ŝajnis al li sufiĉa? Mi estis profunde konfuzita. Pro lia foresto, tiu duelo, kombinita de li, volita de li, prenis la tragedian aspekton de la okazaĵoj, kiujn komandas la rigora ordo de destino, kaj la forto koliziiganta unu kontraŭ la alian tiujn du homoj des pli imponis, ke ĝi troviĝis ekster ili.

Post momento, S-ro Andermatt proksimiĝis al Varin, kaj, tuj kontraŭ li, vizaĝalvizaĝe:

– Ĉar nun la jaroj pasis, kaj vi ne plu havas ion timindan, sincere respondu al mi, Varin. Kion vi faris el Ludoviko Lacombe?

– Jen stranga demando! Kvazaŭ mi povus scii, kion li fariĝis!

– Vi scias tion! vi scias tion! Via frato kaj vi, vi estis ligitaj al li, vi vivis preskaŭ ĉe lia hejmo, en la domo mem kie ni ĉeestas. Vi estis informitaj pri ĉiuj liaj laboroj, pri ĉiuj liaj projektoj. Kaj la lastan vesperon, Varin, kiam mi rekondukis Ludovikon Lacombe ĝis mia pordo, mi vidis du siluetojn kiuj forŝteliris en la ombro. Tion mi pretas ĵuri.

– Kaj tiam, kiam vi estos ĵurinta?

– Tio estis via frato kaj vi, Varin.

– Pruvu tion.

– Sed la plej bona pruvo estas, ke du tagojn poste, vi mem montris al mi la paperojn kaj la planojn kiujn vi plukis en la teko de Lacombe, kaj ke vi proponis ilin vendi al mi. Kiel tiuj paperoj estis via posedaĵo?

– Tion mi jam diris al vi, sinjoro Andermatt, ni trovis ilin sur la tablo mem de Ludoviko Lacombe, la morgaŭan matenon, post lia malapero.

– Tio ne veras.

– Pruvu tion.

– La justico estus povinta tion pruvi.

– Kial vi ne turnis vin al la justico?

– Kial? Ha! kial...

Li eksilentis, gravmiene. Kaj la alia daŭrigis:

– Sciu, sinjoro Andermatt, ke se vi havintus la plej malgrandan certecon, la minaceto, kiun ni faris al vi, ne estus malhepinta...

– Kiu minaco? Ĉu tiuj leteroj? Ĉu vi imagas, ke mi iam kredis nur momenton?...

– Se vi ne kredis je tiuj leteroj, kial vi proponis al mi monriĉegojn por reakiri ilin? Kaj kial, de tiam, vi postĉasigis nin kvazaŭ bestojn, mian fraton kaj min?

– Por repreni la planojn, kiujn mi deziris.

– Nu do! tio estis pro la leteroj. Reakirinte ilin, vi estos denunciinta nin... pli rapide ol mi estus foriginta ilin!

Ekestis rideksplodo, kiu interrompis lin subite.

– Sufiĉas nun. Kiom ajn ni ripetos la samajn parolojn, ni ne estos pli progresintaj. Konsekvence, ni ĉesigu la diskuton.

– Ni ne ĉesigu ĝin, diris la bankestro, kaj ĉar vi parolis pri la leteroj, vi ne eliros el ĉi tie antaŭ ol vi redonos ilin al mi.

– Mi eliros.

– Ne, ne.

– Aŭskultu, sinjoro Andermatt, mi konsilas al vi...

– Vi ne eliros.

– Tion ni vidos, diris Varin kun tiel furioza akcento ke S-ino Andermatt dampis mallaŭtan krion.

Li ŝajne aŭdis ĝin, ĉar li volis perforte pasi. S-ro Andermatt violente repuŝis lin. Tiam mi vidis lin ŝovanta la manon en la poŝon de sia jako.

– Lastfoje!

– La leterojn unue.

Varin eligis revolveron kaj, celante S-ron Andermatt:

– Jes aŭ ne?

La bankestro abrupte klinis sin.

Pafo eksplodis. La armilo falis.

Mi estis stupora. Tute apud mi la pafo eksplodis! Kaj estis Daspry kiu, per pistola kuglo, faligis la armilon el la mano de Alfredo Varin!

Kaj subite starante inter ambaŭ kontraŭuloj, fronte al Varin, li rikanis:

– Vi havas bonŝancon, amiko mia, maloftan bonŝancon. La manon mi celis, kaj la revolveron mi trafis.

Ambaŭ kontemplis lin, senmovaj kaj konfuzitaj. Li diris al la bankestro:

– Vi senkulpigos min, sinjoro, ke mi ŝovas la nazon en fremdan vazon. Sed vi vere ludas vian partion kun tro da mallerteco. Permesu, ke mi tenu la kartojn.

Turniĝante al la alia:

– Niavice, kamarado. Kaj rapide, mi petas. La atuto estas kero, kaj mi ludas la sepon.

Kaj, je tri coloj de lia nazo, li antaŭmetis la ferplaton, kie la sep ruĝaj punktoj estis markitaj.

Neniam mi povis vidi tian situacion renverson. Livida, kun okuloj larĝe malfermitaj kaj trajtoj torditaj pro angoro, la viro ŝajnis hipnotigita de la bildo, kiu prezentiĝis antaŭ li.

– Kiu vi estas? li balbutis.

– Mi jam diris, sinjoro kiu ŝovas la nazon en fremdan vazon... sed kiu ŝovas ĝin ĝisfunde.

– Kion vi volas?

– Ĉion, kion vi alportis.

– Mi nenion alportis.

– Jes ja, alie vi ne estus veninta. Vi ricevis hodiaŭ matene mesaĝon kunvokantan vin ĉi tie por la naŭa, kaj ordonantan al vi alporti ĉiujn paperojn kiujn vi havas. Nu jen vi. Kie estas la paperojn?

Estis en la voĉo de Daspry, estis en lia sinteno, estreco kiu min konsternis, agmaniero tute nova ĉe tiu viro relative maldiligenta kutime kaj milda. Absolute subpremite, Varin almontris unu el siaj poŝoj.

– La paperoj estas tie.

– Ĉu ili ĉiuj estas tie?

– Jes.

– Ĉu ĉiuj, kiujn vi trovis en la teko de Ludoviko Lacombe, kaj kiujn vi vendis al la majoro von Lieben?

– Jes.

– Ĉu ili estas kopio aŭ la originalo?

– La originalo.

– Kiom vi volas por ili?

– Cent mil.

Daspry ekridegis.

– Vi estas freneza. La majoro donis al vi nur dudek mil por ili. Dudek mil fuŝe malŝparitaj, ĉar la provoj fiaskis.

– Oni ne scipovis uzi la planojn.

– La planoj estas nekompletaj.

– Tiukaze, kial vi petas ilin de mi?

– Mi bezonas ilin. Mi proponas al vi kvin mil frankojn por ili. Ne plian centimon.

– Dek min. Ne malplian centimon.

– Konsentite.

Daspry revenis al S-ro Andermatt.

– Bonvolu subskribi ĉekon, sinjoro.

– Sed mi ne havas...

– Ĉu vian ĉekaron? Jen ĝi.

Surprizegite, S-ro Andermatt palpis la ĉekaron, kiun Daspry antaŭmetis al li.

– Ĝi ja estas mia... Kiel tio eblas?

– Ne vanajn parolojn, mi petas, kara sinjoro, vi nur subskribu.

La bankestro eligis sian skribilon kaj subskribis. Varin etendis la manon.

– La manojn for, diris Daspry, ĉio ne finiĝis.

Kaj alparolante al la bankestro:

– Ankaŭ temis pri leteroj kiujn vi postulis, ĉu?

– Jes, stako da leteroj.

– Kie ili estas, Varin?

– Mi ne havas ilin.

– Kie ili estas, Varin?

– Mi ne scias. Mia frato zorgis pri tio.

– Ili estas kaŝitaj tie, en tiu ĉambro.

– Tiukaze, vi scias kie ili estas.

– Kiel mi scius tion?

– Diable, ĉu ne vi kiu vizitis la kaŝejon? Vi ŝajnas same bone informita kiel Salvatoro.

– La leteroj ne estas en la kaŝejo.

– Ili estas tie.

– Malfermu ĝin.

Varin havis suspekteman rigardon. Ĉu Daspry kaj Salvatoro reale estis nur unu, kiel ĉio supozigis? Se jes, li nenion riskis montrante jam konatan kaŝejon. Se ne, tio senutilis...

– Malfermu ĝin, ripetis Daspry.

– Mi ne havas keran sepon.

– Jes, ĉi tiun, diris Daspry, antaŭtenante la ferplaton.

Varin retropaŝis terurite:

– Ne... ne... mi ne volas...

– Ne gravas...

Daspry direktiĝis al la maljuna blankbarba monarko, grimpis sur seĝon, kaj almetis la keran sepon ĉe la malsupron de la glavo, apud la tenilo, kaj tiel ke la randoj de la plato kovru ambaŭ randojn de la spado. Poste, per grifelo kiun li enigis vicalvice en ĉiun el la sep truoj, boritaj ĉe la ekstremaĵo de la sep keroj, li premis sur sep ŝtonetoj de la mozaiko. Je la sepa ŝtoneto enpuŝita, estiĝis ekklako, kaj la tuta busto de la reĝo pivotis, senmaskigante larĝan aperturon, aranĝitan kiel monŝranko, kun feraj kovraĵoj kaj du bretoj el brila ŝtalo.

– Vi ja vidas, Varin, la monŝranko estas malplena.

– Efektive... Tiukaze mia frato estus detirinta la leterojn.

Daspry revenis al la viro kaj diris al li:

– Ne ludu la plej ruzan ulon kun mi. Estas alia kaŝejo. Kie ĝi estas?

– Ne estas alia.

– Ĉu monon vi volas? Kiom?

– Dek mil.

– Sinjoro Andermatt, ĉu tiuj leteroj valoras dek mil frankojn por vi?

– Jes, diris la bankestro per laŭta voĉo.

Varin malfermis la monŝrankon, prenis la keran sepon, ne sen videbla abomeno, kaj almetis ĝin sur la glavon, apud la tenilo, ekzakte en la saman lokon. Laŭvice, li enpuŝis la grifelon en la ekstremaĵon de la sep keroj. Estiĝis dua ekklako, sed ĉifoje, neatendite, nur parto de la monŝranko pivotis, senmaskigante etan monŝrankon elfaritan en la diko mem de la pordo kiu fermis la pli grandan.

La stako da leteroj estis tie, ligita per ŝnureto kaj sigelita. Varin transdonis ĝin al Daspry. Tiu ĉi demandis:

– Ĉu la ĉeko pretas, sinjoro Andermatt?

– Jes.

– Kaj ĉu vi ankaŭ havas la lastan dokumenton, kiun vi ricevis de Ludoviko Lacombe, kaj kiu kompletigas la planojn de la submerŝipo?

– Jes.

La interŝanĝo okazis. Daspry enpoŝigis la dokumenton kaj la ĉekon kaj donacis la stakon al S-ro Andermatt.

– Jen kion vi deziris, sinjoro.

La bankestro hezitis momenton, kvazaŭ li timus tuŝi tiujn damnindajn paĝojn, kiujn li tiom avide serĉis. Poste, per nervoza gesto, li ekkaptis ilin.

Apud mi, mi aŭdis ĝemon. Mi ekprenis la manon de S-ino Andermatt: ĝi estis malvarmega.

Kaj Daspry diris al la bankestro:

– Mi kredas, sinjoro, ke nia konversacio finiĝis. Ho! neniun dankon, mi petegas. Nur hazardo volis, ke mi povu utili al vi.

S-ro Andermatt retiriĝis. Li forprenis la leterojn de sia edzino al Ludoviko Lacombe.

– Mirinde, ekkriis Daspry kun ravita mieno, ĉio plej bone solviĝas. Ni nur finu nian aferon, kamarado. Ĉu vi havas la paperojn?

– Jen ili ĉiuj.

Daspry tralegis ilin, atente ekzamenis ilin, kaj enŝovis ilin en sian poŝon.

– Perfekte, vi tenis vian promeson.

– Sed...

– Sed kion?

– La du ĉekojn?... la monon?...

– Nu! vi estas aplomba, ulo mia. Kiel vi aŭdacas reklamacii!

– Mi reklamacias, kio estas ŝuldata al mi.

– Ĉu do oni ŝuldas al vi ion por la paperoj, kiujn vi ŝtelis?

Sed la viro ŝajnis furioza. Li tremis pro kolero, kun okuloj sange ruĝaj.

– La monon... la dudek mil... li balbutis.

– Neeble... ĝi jam utilas al mi.

– La monon!...

– Nu, estu saĝa, kaj lasu do vian ponardon trankvila.

Li ekkaptis lian brakon tiel malmide, ke la alia hurlis pro doloro, kaj li aldonis:

– Foriru, kamarado, la aero faros al vi bonon. Ĉu vi volas, ke mi rekonduku vin? Ni iros laŭ la forlasita tereno, kaj mi montros al vi ŝtonamason sub kiu...

– Tio ne veras! Tio ne veras!

– Jes ja, tio veras. Tiu eta ferplato kun sep ruĝaj punktoj devenas de tie. Ĝi neniam forlasis Ludovikon Lacombe, ĉu vi memoras? Via frato kaj vi enterigis ĝin kun la kadavro... kaj aliaj aferoj kiuj ege interesos la justicon.

Varin kovris al si la vizaĝon per siaj kolerplenaj pugnoj. Poste li eldiris:

– Bone. Mi estas superruzita. Ni ne plu parolu pri tio. Tamen unu vorton... nur unu vorton, mi volus scii...

– Mi aŭdas.

– En tiu monŝranko, en la pli granda el la du, estis kaseto, ĉu?

– Jes.

– Kiam vi venis ĉi tien, dum la nokto de la 22-a al la 23-a de junio, ĉu ĝi estis tie?

– Jes.

– Kion ĝi enhavis?

– Ĉion, kion la fratoj Varin enfermis en ĝi, iom belan kolekton da juveloj, diamantojn kaj perlojn, kaptitajn ie-tie de la tiel nomataj fratoj.

– Kaj ĉu vi prenis ĝin?

– Diable! Imagu vin en mia situacio!

– Tiam... konstatante la malaperon de la kaseto, mia frato mortigis sin, ĉu?

– Probable. La malapero de via korespondado kun la majoro von Lieben ne estus sufiĉinta. Sed la malapero de la kaseto... Ĉu tio estas ĉio, kion vi volis demandi al mi?

– Ankoraŭ tio: via nomo?

– Vi diras tion kvazaŭ vi intencus venĝi.

– Je Dio! La sorto ŝanĝiĝas. Hodiaŭ vi estas la pli forta. Morgaŭ...

– Estos vi.

– Ja tion mi celas. Via nomo?

– Arseno Lupeno.

– Arseno Lupeno!

La viro ŝanceliĝis, kvazaŭ svenigite de klabobato. Aspektis, ke tiuj du vortoj forprenis al li ĉian esperon. Daspry ekridis.

– Ha! ĉu vi imagis, ke iu banala sinjoro estus povinta starigi tiun tutan belan aferon? Nu do, necesis almenaŭ iu Arseno Lupeno. Kaj estante informita nun, etulo mia, iru pretigi vian revanĉon, Arseno Lupeno atendas vin.

Kaj li forpelis lin eksteren, sen plian vorton.

– Daspry, Daspry! mi ekkriis, donante al li, ankoraŭ kaj malgraŭ mi, la nomon sub kiu mi konis lin.

Mi dispuŝis la veluran kurtenon.

Li alkuris.

– Kio okazas?

– S-ino Andermatt estas suferanta.

Li diligentis, spirigis al ŝi flarsalon, kaj, dum li flegis ŝin, li pridemandis al mi:

– Nu! kio do okazis?

– La leteroj, mi diris al li... la leteroj de Ludoviko Lacombe, kiujn vi donis al ŝia edzo!

Li frapis sian frunton.

– Ŝi kredis, ke mi faris tion... Sed kompreneble, ŝi ja povis tion kredi. Kia stultulo mi estas!

S-ino Andermatt, rekonsciiĝinte, avide aŭskultis lin. Li eltiris el sia paperujo staketon, tute similan al tiu, kiun forprenis S-ro Andermatt.

– Jen viaj leteroj, sinjorino, la veraj.

– Sed... la aliaj?

– La aliaj estas la samaj kiel tiuj ĉi, sed kopiitaj de mi, ĉi-nokte, kaj zorge aranĝitaj. Via edzo estos des pli feliĉa ilin legi,

ke li ne suspektos la substituon, ĉar ĉio okazis antaŭ liaj okuloj...

– La manskribo...

– Ne estas manskribo, kiun oni ne povas imiti.

Ŝi dankis lin, kun la samaj respektaj paroloj, kiujn ŝi estus adresinta al viro de sia mondo, kaj mi ja vidis, ke ŝi kredeble ne aŭdis la lastajn frazojn interŝanĝitajn inter Varin kaj Arseno Lupeno.

Miaflanke, mi rigardis lin ne sen embaraso, ne tro sciante kion diri al tiu malnova amiko, kiu reveliĝis al mi el tiel neatendita lumo. Lupeno! Li estis Lupeno! mia rondokamarado estis neniuj alia ol Lupeno! Mi ne povis kredi tion. Sed li, tre komforte:

– Vi povas adiaŭi al Jean Daspry.

– Ha!

– Jes, Jean Daspry ekvojaĝas. Mi sendas lin al Maroko. Tre probable li trovos tie vivfinon indan je si. Mi eĉ konfesas, ke tio estas lia intenco.

– Sed ĉu Arseno Luperno restas ĉe ni?

– Ho! pli ol iam. Arseno Lupeno estas nur en la komenco de sia kariero, kaj li ja intencas...

Movo de nerezistebla scivolemo ĵetis min al li. Kaj kuntrenante lin iom for de S-ino Andermatt:

– Vi do fine malkovris la duan kaŝejon, tiun kie troviĝis la stako da leteroj, ĉu?

– Mi sufiĉe penis! Tio okazis nur hieraŭ, posttagmeze, dum vi kuŝis. Kaj tamen, Dio scias kiom facila tio estis! Sed la plej simplaj aferoj estas tiuj pri kiuj oni laste pensas.

Kaj montrante al mi la keran sepon:

– Mi ja divenis, ke por malfermi la grandan monŝrankon, necesis preteni tiun karton ĉe la glavo de la mozaikulo...

– Kiel vi tion divenis?

– Facile. Danke al privataj informoj, mi sciis, venante ĉi tien, la 22-an de junio vespere...

– Forlasinte min...

– Jes, kaj metinte vin per elektitaj konversacioj en spiritostaton tian, ke nervozulo kaj emociemulo kiel vi, devos fatale lasi min agi laŭ mia plaĉo, sen eliĝi el sia lito.

– La rezonado estis ĝusta.

– Mi do sciis, venante ĉi tien, ke estas kaseto kaŝita en monŝranko kun sekreta seruro, kaj ke la kera sepo estas la ŝlosilo, la solvo de tiu seruro. Temis nur pri almeti tiun keran sepon en lokon, kiu estis videble destinita al ĝi. Unu horo da ekzameno sufiĉis.

- Unu horo!
- Observu la mozaikulon.
- Ĉu la maljunan imperiestron?
- Tiu maljuna imperiestro estas la ekzakta bildigo de la kera reĝo de ĉiuj kartludoj, Karolo la Granda.
- Efektive... Sed kial la kera sepo malfermas jen la grandan monŝrankon, jen la malgrandan? Kaj kial vi unue malfermis nur la grandan monŝrankon?
- Kial? ĉar mi obstine ĉiam almetis la keran sepon kun la sama orientiĝo. Nur hieraŭ mi ekkomprenis, ke inversigante ĝin, tio estas metante la sepan keron, tiu en la mezo, supren anstataŭ malsupren, la dispozicio de la sep truoj ŝanĝiĝis.
- Je Dio!
- Evidente, je Dio, sed ja necesis pensi pri tio.
- Alia afero: vi ne sciis la historion pri la leteroj antaŭ ol sinjorino Andermatt...
- Parolis pri ĝi antaŭ mi? Jes. Mi malkovris en la monŝranko, krom la kaseton, nur la korespondadon de la du fratoj, korespondadon kiu metis min sur la vojon de lia perfido.
- Finfine, hazarde vi estis kondukita unue restarigi la historion de la du fratoj, kaj poste serĉi la planojn kaj la dokumentojn de la submarŝipo, ĉu?

– Hazarde.

– Sed kiucele vi serĉis ilin?...

Daspry interrompis min ridante:

– Dio mia! kiel tiu afero interesas vin!

– Ĝi pasiigas min.

– Nu! post nelonge, kiam mi estos rekondukinta sinjorinon Andermatt kaj estos portiginta al *Écho de France* la vorton, kiun mi tuj skribos, mi revenos kaj ni eniros en la detalojn.

Li eksidis kaj skribis unu el tiuj koncizaj notetoj, kie distriĝas la fantazio de la persono. Kiu ne memoras la bruon, kiun tiu ĉi estigis en la tuta mondo?

“Arseno Lupeno solvis la problemon, kiun Salvatoro starigis lastatempe. Posedante ĉiujn originalajn dokumentojn kaj planojn de la inĝeniero Ludoviko Lacombe, li sendis ilin en la manojn de la Mararmea ministro. Tiuokaze li estigas mon kolekton por donaci al la Ŝtato la unuan submarŝipon konstruitan laŭ tiuj planoj. Kaj li mem eĉ enskribiĝas supre en tiu mon kolekto per monsumo de dudek mil frankoj.”

– Ĉu la dudek mil frankoj de la ĉekoj de sinjoro Andermatt? mi diris, kiam li donis al mi la paperon por legi.

– Precize. Estas juste, ke Varin parte elaĉetu sian perfidon.

Kaj jen kiel mi konis Arsenon Lupenon. Jen kiel mi sciis, ke Jean Daspry, rondokamarado, monduma kunulo, estas neniu

alia ol Arseno Lupeno, ĝentlemano-ŝtelisto. Jen kiel mi ligis tre agrablajn amikecajn rilatojn kun nia granda viro, kaj kiel iom post iom, danke al la konfido per kiu li bonvole honoras min, mi fariĝis lia tre humila, tre fidela kaj tre dankema historiografo.

La monŝranko de sinjorino Imbert

Je la tria matene, estis ankoraŭ ses veturiloj antaŭ unu el la malgrandaj pentristaj hoteloj, kiuj konsistigas la unikan flankon de la bulvardo Berthier. La pordo de tiu hotelo malfermiĝis. Grupo da invititoj, viroj kaj virinoj, eliris. Kvar veturiloj foriris ien-tien kaj restis sur la avenuo nur du sinjoroj, kiuj disiĝis ĉe la angulo de la strato Courcelles, kie loĝis unu el ili. La alia decidis rehejmeniĝi piede ĝis la pordo Maillot.

Li do trairi la avenuon Villiers kaj daŭrigis sian vojon sur la trotuaro kontraŭe al la fortikaĵoj. Dum tiu bela vintra nokto, pura kaj malvarma, li plezuris marŝi. Oni bone spiris. La paŝbruoj gaje resonis.

Sed post kelkaj minutoj, li havis la malagrablan impreson, ke oni lin sekvas. Efektive, turniĝinte, li ekvidis ombron de viro, kiu ŝteliris inter la arboj. Li tute ne estis timema; tamen li akcelis la paŝadon por alveni plejeble rapide al la urbakcizejo de Ternes. Sed la viro ekkuris. Iom malkvieta, li taksis pli singarde alfronti lin kaj eligi sian revolveron.

Li ne havis la tempon, la viro sturmis lin violente, kaj lukto tuj komenciĝis sur la senhoma bulvardo, vigla lukto kie li rapide sentis, ke li havas malavantaĝon. Li vokis helpon, baraktis, kaj estis renversita kontraŭ ŝtonetamason, ĉirkaŭpremite ĉe la gorgo, buŝoŝtopilite de poŝtuko, kiun lia kontraŭulo

enprofundigis en lian buŝon. Liaj okuloj malfermiĝis, liaj oreloj zumis, kaj li estis svenonta, kiam subite la premo malstreĉiĝis, kaj la viro kiu sufokis lin per sia pezo restariĝis por sin defendi siavice kontraŭ neatendita atako.

Bastonbaton sur la manartikon, botbaton sur la piedartikon... La viro eligis du graŭlojn pro doloro kaj forfuĝis lamante kaj sakrante.

Ne degnante postkuri lin, la novalveninto kliniĝis kaj diris:

– Ĉu vi estas vundita, sinjoro?

Li ne estis vundita, sed ege vertiĝanta kaj nekapabla stari. Feliĉe, unu el la urbakcizejaj dungitoj, altirite de la krioj, alkuris. Veturilo estis petita. La sinjoro enlokiĝis, akompanite de sia savinto, kaj oni lin kondukis al lia hotelo de la avenuo Grande-Armée.

Antaŭ la pordo, tute resaniĝinte, li korelverŝis dankojn.

– Mi ŝuldas al vi la vivon, sinjoro, bonvolu kredi, ke mi ne forgesos tion. Mi ne volas timigi mian edzinon ĉi-momente, sed mi ja deziras ke ŝi mem esprimu, tuj de hodiaŭ, mian tutan dankemon.

Li petis al li veni por tagmanĝi kaj diris al li sian nomon: Ludoviko Imbert, aldonante:

– Ĉu mi povas scii kun kiu mi havas la honoron...

– Certe, diris la alia.

Kaj li prezentis sin:

– Arseno Lupeno.

Arseno Lupeno tiam ne havis tiun famon, kiun havigis al li la afero Kahorno, lia eskapo el La Sano, kaj tiom da tondraj heroaĵoj. Li eĉ ne nomiĝis Arseno Lupeno. Tiu nomo, al kiu la estonteco destinis tian prestiĝon, estis speciale imagita por almontri la savinton de S-ro Imbert, kaj oni povas diri, ke ja en tiu afero li ricevis sian fajrobapton. Preta por batalo, armita de kapo ĝis piedoj, estas vere, sed sen rimedoj, sen la aŭtoritato kiun donas sukceso, Arseno Lupeno estis nur lernanto en profesio kie li baldaŭ fariĝos majstro.

Tial, kian tremeton de ĝojo je sia vekiĝo kiam li rememoris la inviton de la nokto! Fine li alvenis al la celo! Fine li entreprenis verkon indan je siaj fortoj kaj talento! La milionoj de la familio Imbert, kia belega predo por apetito kiel lia.

Li surmetis specialan tualeton, raspitan redingoton, eluzitan pantalonon, ĉapelon el silko iom ruĝaĉa, disfadeniĝantajn falsan kolumon kaj manumojn; la tuto estis tre pura, sed odoris mizeron. Kiel kravaton, nigran rubandon alpinglitan de diamanto el surprizo-nukso. Kaj tiel vestite, li malsupreniris la ŝtuparon de la loĝejo, kiun li okupis en Montmartre. Ĉe la tria etaĝo, sen halti, li frapis per la pomelo de sia bastono sur klapegon de fermita pordo. Ekstere, li atingis la ĉirkaŭurbajn bulvarojn. Tramo pasis. Li instalas sin en ĝi, kaj iu, kiu marŝis malantaŭ li, la luanto de la tria etaĝo, eksidis apud li.

Post momento, tiu viro diris al li:

– Nu, estro?

– Nu! farite.

– Kiel?

– Mi tagmanĝos tie.

– Vi tagmanĝos tie!

– Vi ne volus, espereble, ke mi senpage estu endanĝeriginta tagojn tiel valorajn kiel la miaj? Mi forŝiris S-ron Ludoviko Imbert de certa morto, kiun vi rezervis al li. S-ro Ludoviko Imbert estas denature dankema. Li invitas min por tagmanĝo.

Estis silento, kaj la alia riskis:

– Do, vi ne rezignas tion, ĉu?

– Etulo mia, diris Arseno, se mi kombinis la ĉi-noktan agreseton, se mi penis, je la tria matene, laŭ la fortikaĵoj, doni al vi bastonbaton sur la pojnnon kaj piedbaton sur la tibion, tiel riskante difekti mian unikan amikon, tio ne estas por nun rezigni la profiton de savado tiel lerte organizita.

– Sed la onidiroj, kiuj cirkulas pri la riĉaĵo...

– Lasu ilin cirkuli. De ses monatoj mi sekvas la aferon, de ses monatoj mi informiĝas, mi studas, mi starigas miajn retojn, mi pridemandas la servistojn, la alpruntistojn kaj la mandatitojn, de ses monatoj mi vivas en la ombro de la edzo kaj la edzino. Tial, mi scias kion pensi pri tio. Ĉu la riĉaĵo devenas

de la maljuna Brawford, kiel ili pretendas, aŭ de alia fonto, mi asertas, ke ĝi ekzistas. Kaj ĉar ĝi ekzistas, ĝi estas mia.

– Diable, cent milionoj!

– Ĉu dek, aŭ eĉ ĉu kvin, ne gravas! Estas amasegoj da biloj en la monŝranko. Ja estus mirige se, iun tagon aŭ alian, mi ne trafus la ŝlosilon.

La tramo haltis ĉe placo de l'Étoile. La viro flustris:

– Do, nunmomente?

– Nunmomente, nenio farendas. Mi avertos vin. Ni havas la tempon.

Kvin minutojn poste, Arseno Lupeno supreniris la luksan ŝtuparon de la hotelo Imbert, kaj Ludoviko prezentis lin al sia edzino. Gervaise estis bona virineto, tute ronda, tre babilema. Ŝi plej bone bonvenigis Lupenon.

– Mi volis, ke ni estu solaj por festi nian savinton, ŝi diris.

Kaj dekomence oni traktis “nian savinton” kiel malnovan amikon. Dum la deserto la intimeco estis kompleta, kaj la konfidencoj sin sekvis rapide. Arseno rakontis sian vivon, la vivon de sia patro, honesta magistrato, la malfeliĉaĵojn de sia infaneco, la malfacilaĵojn de la nuna tempo. Gervaise, siavice, diris pri sia junaĝo, sia edziniĝo, la bonkoraĵoj de la maljuna Brawford, la cent milionoj kiujn ŝi heredis, la obstakloj kiuj malfruigis la ekproprecon, la depruntoj kiujn ŝi devis kontrakti kun altegaj interezoj, siaj senfinaj konfliktoj kun la nevoj de Brawford, kaj la vendorajtoj kaj la sekvestroj! finfine ĉio!

– Pensu do, sinjoro Lupeno, la biloj estas tie, apude en la skriboĉambro de mia edzo, kaj se ni deŝiras nur unu kuponon el ili, ni ĉion perdas! Ili estas tie, en nia monŝranko, kaj ni ne povas ilin tuŝi.

Ektremeto skuis S-ron Lupeno pensante pri tiu najbaraĵo. Kaj li havis la tre netan sentaĵon, ke S-ro Lupeno neniam havus sufiĉe da anima grandeco por sperti la samajn skrupulojn kiel la bona virino.

– Ha! ili estas tie, li murmuris, kun seka gorĝo.

– Ili estas tie.

Interrilatoj tiel bonaŭgure komencitaj povis nur formi pli streĉitajn nodojn. Delikate pridemandite, Arseno Lupeno konfesis sian miseron, sian malesperon. Tujtuje, la malfeliĉa knabo estis nomumita privata sekretario de la geedzoj, kun salajro de cent kvindek frankoj ĉiumonate. Li daŭre loĝos ĉe sia hejmo, sed li venos ĉiutage preni la laborordonojn kaj, por pli da facileco, oni disponigis al li, kiel laborkabineton, unu el la dormoĉambroj de la dua etago.

Li elektis. Per kiu bonega hazardo ĝi troviĝis super la skriboĉambro de Ludoviko?

Arseno post nelonge ekkomprenis, ke lia sekretaria posteno ege similas al sinekuro. En du monatoj, nur kvar bagatelajn leterojn li devis rekopii, kaj nur unufoje li estis vokita en la skriboĉabron de sia estro, kio ebligis al li nur unufoje oficiale kontempli la monŝrankon. Krome, li notis ke la responsulo pri tiu sinekuro kredeble ne estas taksata inda figuri apud la deputito Anquety, aŭ de la advokatestro Grouvel, ĉar oni

forgesis inviti lin al la famaj mondumaj kunvenoj.

Li ne plendis pri tio, multe pli preferante konservi sian modestan loketon ombre, kaj li tenis sin aparte, feliĉa kaj libera. Cetere, li ne malŝparis sian tempon. Li unue faris kelkajn kaŝajn vizitojn al la skriboĉambro de Ludoviko, kaj prezentis siajn respektoplenajn salutojn al la monŝranko, kiu tamen restis ne malpli hermetike fermita. Ĝi estis grandega bloko da giso kaj ŝtalo, kun malagrabla aspekto, kaj kontraŭ kiu povis triumfi nek fajliloj, nek boriloj, nek levstangoj.

Arseno Lupeno ne estis obstina.

– Kie forto fiaskas, ruzo sukcesas, li pensis. La ĉefa afero estas havi okulon kaj orelon en la taŭga loko.

Li do prenis la bezonajn mezurojn, kaj post zorgaj kaj penigaj sondoj tra la pargeto de sia ĉambro, li enkondukis plumban tubon, kiu alvenis al la plafono de la skriboĉambro inter du modluroj de la kornico. Tra tiu tubo, per akustika tubeto kaj pligrandiganta lorno, li esperis vidi kaj aŭdi.

De tiam, li vivis surventre sur la pargeto. Kaj efektive li ofte vidis la du Imbert en babilado antaŭ la monŝranko, foliumantaj registrolibroj kaj manipulantaj dosierojn. Kiam ili turnis laŭvice la kvar butonojn kiuj komandis la seruron, li provis, por scii la ĉifron, kapti la nombron da klikbruoj kiuj pasis. Li gvatis iliajn gestojn, li spionis iliajn parolojn. Kie ili lasis la ŝlosilon? Ĉu ili kaŝis ĝin?

Tagon, li haste malsupreniris, vidinte ilin elirantaj el la ĉambro sen refermi la monŝrankon. Kaj li eniris decideme. Ili jam estis revenintaj.

– Ho! senkulpigu min, li diris, mi eraris pri la pordo.

Sed Gervaise impetis, kaj altirante lin:

– Eniru do, sinjoro Lupeno, eniru do, ĉu vi ne estas hejme tie? Vi donos al ni konsilon. Kiujn bilojn ni vendu? Ĉu de *l'Extérieure* aŭ ĉu de *la Rente*?

– Sed pri la vendoraĵto? obĵetis Lupeno, tute mirigite.

– Ho! ĝi ne trafas ĉiujn bilojn.

Ŝi dispuŝis la klapegon. Sur la bretoj amasiĝis paperujoj zonitaj per rimenoj. Ŝi ekkaptis unu el ili. Sed ŝia edzo protestis.

– Ne, ne Gervaise, estus frenezaĵo vendi bilojn de *l'Extérieure*. Ĝi baldaŭ kreskos... Dum *la Rente* estas plej altnivela. Kion vi pensas pri tio, kara amiko mia?

La kara amiko havis neniun opinion, tamen li konsilis la foroferon de *la Rente*. Tiam ŝi prenis alian paperstakon, kaj, en tiu paperstako, hazarde, unu paperon. Ĝi estis bilo de 3% de 1374 frankoj. Ludoviko enpoŝigis ĝin. Dum la posttagmezo, akompanite de sia sekretario, tiun bilon li vendigis de kambiagento kaj enspezis 46 000 frankojn.

Kion ajn diris Gervaise, Arseno Lupeno ne sentis sin hejme. Tute male, lia situacio en la hotelo Imbert plenigis lin je surprizo. En diversaj okazoj, li povis konstati ke la servistoj ne sciis lian nomon. Ili nomis lin sinjoro. Ludoviko ĉiam parolis pri li tiel: “Vi avertos sinjoron... Ĉu sinjoro alvenis?” Kial tiu enigma nomado?

Cetere, post la entuziasmo de la komenco, la Imbert apenaŭ alparolis lin, kaj traktante lin kun la konsideroj ŝulditaj al bonfaranto, samtempe ili neniam zorgis pri li! Ŝajne oni konsideris lin kiel originalulon, kiu ne ŝatas ke oni lin maloportunas, kaj oni respektis lian izolecon, kvazaŭ tiu izoleco estus regulo postulita de li, kaprico de lia flanko. Unu fojon, kiam li pasis en la vestiblo, li aŭdis Gervaise kiu diris al du sinjoroj:

“Li estas tia sovaĝulo!”

Bone, li pensis, mi estas sovaĝulo. Kaj rezignante klarigi al si la bizaraĵojn de tiuj homoj, li daŭrigis la efektivigon de sia plano. Li nun certis, ke li ne kalkulu je la hazardo nek je malatentaĵo de Gervaise, kiun la ŝlosilo de la monŝranko neniam forlasis, kaj kiu, krome, neniam estus forportinta tiun ŝlosilon sen antaŭa mikso de la seruraj leteroj. Tiel li do agu.

Okazaĵo akcelis la aferojn, la akra kampanjo kondukita de iuj ĵurnaloj kontraŭ la Imbert. Oni ilin akuzis pri trompado. Arseno Lupeno ĉeestis la peripetiojn de la dramo, la agitiĝojn de la paro, kaj li komprenis ke plu atendente, li estis perdonta ĉion.

Kvin sinsekvajn tagojn, anstataŭ foriri je la sesa kiel kutime, li enfermiĝis en la ĉambro. Oni supozis lin elirinta. Siaflanke, li sternis sin sur la pargeto kaj gvatis la skriboĉambro de Ludoviko.

Dum la kvin tagoj, ĉar la favora cirkonstanco kiun li atendis ne okazis, li foriris meze de la nokto, tra la eta pordo kiu kondukis al la korto. Li posedis ĝian ŝlosilon.

Sed la sesan tagon, li eksciis ke la Imbert, responde al la fiaj aludoj de siaj malamikoj, proponis ke oni malfermu la monŝrankon kaj ke oni inventaru ĝin.

“Tio okazos ĉi-vespere, pensis Lupeno.”

Kaj efektive, post la vespermanĝo, Ludoviko instaligis en sian skriboĉambron. Gervaise kuniĝis kun li. Ili ekfoliumis la registrojn de la monŝranko.

Unu horo pasis, kaj alia. Li aŭdis la servistojn kiuj enlitiĝis. Nun neniu plu estis en la unua etaĝo. Noktomezo. La Imbert daŭrigis sian laboron.

– Ek, flustris Lupeno.

Li malfermis sian fenestron. Ĝi rigardis al la korto, kaj la spaco, dum nokto sen luno kaj sen stelo, estis malluma. Li tiris el sia ŝranko nodŝnuron, kiun li alkroĉis al la balkona apogrelo, transpaŝis kaj senbrue lasis sin degliti, helpante sin per defluilo, ĝis la fenestro situanta malsupre de la sia. Ĝi estis tiu de la skriboĉambro, kaj la dika vualo de la remburitaj kurtenoj maskis la enon. Starante sur la balkono, li restis momenton senmova, kun atentema orelo kaj gvatema okulo.

Trankviligite de la silento, li delikate puŝis ambaŭ fenestroklapojn. Se neniu ilin estus kontrolinta, ili devus cedi sub la premo, ĉar dum la posttagmezo, li estis turninta ilian espanjoleton tiel ke ĝi ne plu eniĝu en la riglilingojn.

La fenestroklapoj cedis. Tiam, kun senfinaj zorgoj, li duonmalfermis ilin pli. Tuj kiam li povis enŝovi la kapon, li

haltis. Iom da lumo filtriĝis inter la du mise kunigitaj kurtenoj; li ekvidis Gervaise kaj Ludovikon sidantaj apud la monŝranko.

Ili interŝanĝis nur parolojn malmultajn kaj mallaŭtajn, absorbite de sia laboro. Arseno kalkulis la distancon kiu disigis lin de ili, antaŭpensis la ekzaktajn movojn kiujn li devus fari por neŭtraligi ilin unu post la alia, antaŭ ol ili havus la tempon voki helpon, kaj li estis impetonta kiam Gervaise diris:

– Kiom la ĉambro malvarmiĝis de momento! Mi tuj enlitiĝos. Kaj vi?

– Mi dezirus fini.

– Fini! Sed tio daŭros la tutan nokton.

– Tute ne, unu horon maksimume.

Ŝi retiriĝis. Dudek minutoj, tridek minutoj pasis. Arseno puŝis la fenestron iom pli. La kurtenoj ekstremetis. Li plu puŝis. Ludoviko turnis sin, kaj, vidante la kurtenojn ŝveligitaj de la vento, ekstaris por fermi la fenestron...

Ne estis unu krio, eĉ ne ŝajno de lukto. Per kelkaj precizaj gestoj, kaj sen fari al li la plej etan vundon, Arseno svenigis lin, envolvis lian kapon per la kurteno, ĉirkaŭligis lin, tiel ke Ludoviko eĉ ne distingis la vizaĝon de sia agresinto.

Poste, rapide, li iris al la monŝranko, ekkaptis du paperujojn kiujn li metis subbrake, eliris la skriboĉambron, malsupreniris la ŝtuparon, trairis la korton, kaj malfermis la servistan pordon. Veturilo parkadiĝis en la strato.

– Prenu tion unue, li diris al la koĉero kaj sekvu min.

Li reiris ĝis la skriboĉambro. Per du iroj-reiroj ili malplenigis la monŝrankon. Poste Arseno supreniris en sian ĉambron, demetis la ŝnuron, forviŝis ĉiun spuron de sia paso. Estis finite.

Kelkajn horojn poste, Arseno Lupeno, helpate de sia kunulo, ekzamenis la enhavon de la paperujoj. Li spertis neniun desapontiĝon, kiel prognozte, konstatante ke la riĉeco de la Imbert ne havas la egecon kiun oni atribuas al ĝi. La milionoj kalkuliĝis ne centope, eĉ ne dekope. Sed fine, la tuto ankoraŭ formis tre respektindan sumon, kaj ili estis bonegaj valoroj, obligacioj de fervojkompanioj, akcioj Urbo-Parizo, ŝtataj fondusoj, Suezo, minoj de Nord, ktp.

Li deklaris sin kontenta.

– Certe, li diris, estos akra rubo kiam alvenos la tempo negoci. Oni kolizios al vendorajtoj, kaj necesos pli ol unufoje forvendi por aĉa prezo. Ne gravas, kun tiu unua profito, mi ja intencas vivi kiel mi volas... kaj realigi kelkajn revojn, kiuj kore valoras al mi.

– Kaj la cetero?

– Vi povas bruligi ĝin, etulo mia. Tiuj paperamasoj estis vantaĵo en la monŝranko. Por ni, ili estas senutilaj. Koncerne la bilojn, ni tute trankvile enfermos ilin en la murŝrankon, kaj ni atendos la oportunan momenton.

La morgaŭon, Arseno pensis ke nenia kialo malhelpas lin reiri al la hotelo Imbert. Sed la legado de la gazetoj rivelis al li tiun neatenditan novaĵon: Ludoviko kaj Germaine malaperis.

La inventaro de la monŝranko okazis tre solene. La magistratoj trovis tie, kion Arseno Lupeno lasis... malmulton.

Tiaj estas la faktoj, kaj tia estas la klarigo, kiun donas por kelkaj el ili la interveno de Arseno Lupeno. Mi aŭdis tiun rakonton el li mem, tagon kiam li estis konfidecema.

Tiun tagon, li promenis tien kaj reen, en mia laborkabineto, kaj liaj okuloj havis etan febron, kiun mi ne konis al ili.

– Finfine, mi diris al li, tio estas via plej bela ago, ĉu?

Sen rekte respondi, li daŭrigis:

– Estas en tiu afero nepenetreblaj sekretoj. Tiel, eĉ post la klarigo, kiun mi ĵus donis al vi, kiom da mallumoj ankoraŭ! Kial tiu fuĝo? Kial ili ne profitis la helpon kiun mi alportis al ili nevole? Estis simple diri: “La cent milionoj troviĝis en la monŝranko, ili ne plu estas tie ĉar oni ŝtelis ilin.”

– Ili freneziĝis.

– Jes, ĝuste, ili freneziĝis... Aliflanke, estas vere...

– Estas vere?...

– Ne, nenion.

Kion signifis tiu deteniĝo? Li ne ĉion diris, estis videble, kaj kion li ne diris, tion li malemis diri. Mi estis scivoligita. Necesis,

ke la afero estu grava por estigi heziton ĉe tia viro.

Mi starigis al li hazardajn demandojn.

– Ĉu vi ne revidis ilin?

– Ne.

– Kaj ĉu vi neniam sentis, rilate tiujn du kompatinduloj, ian kompaton?

– Mi! li bojis eksaltante.

Lia ribelo mirigis min. Ĉu mi ĝuste trafis? Mi insistis:

– Evidente. Sen vi, ili eble estus povintaj fronti la danĝeron... aŭ almenaŭ foriri kun plenigitaj poŝoj.

– Rimorsojn, ja tion vi atribuas al mi, ĉu ne?

– Damne!

Li violente frapis sur mian tablon.

– Tiel, laŭ vi, mi devus havi rimorsojn, ĉu?

– Nomu tion rimorsoj aŭ bedaŭroj, alivorte iun senton...

– Iun senton por homoj...

– Por homoj, al kiuj vi ŝtelis monriĉaĵon.

– Kiun monriĉaĵon?

– Tamen... tiujn du aŭ tri stakojn da biloj...

– Tiujn du aŭ tri stakojn da biloj! Mi ŝtelis al ili amasojn da biloj, ĉu ne? parton de ilia heredaĵo? Jen mia kulpo? jen mia krimo?

« Sed fulmotondro, kara mia, ĉu vi ne do divenis, ke tiuj biloj estas falsaj?... ĉu vi aŭdas?

« ILI ESTIS FALSAJ!

Mi rigardis lin, konsternite.

– Ĉu falsaj, la kvar aŭ kvin milionoj?

– Falsaj, li ekkriis furioze, falsegaj! Falsaj, la obligacioj, la Urboj-Parizoj, la ŝtataj fondusoj, papero, nur papero! Ne unu groŝon, mi eltiris ne unu groŝon el la tuta bloko! Kaj vi petas al mi, ke mi havu rimorsojn, ĉu? Sed ja ili havu rimorsojn! Ili superruzis min kiel vulgaran naivulon! Ili prirabis min kiel la lastan dupon, kaj la plej stultan!

Lin agitis reala kolero, farita el rankoro kaj vundita memdigno.

– Sed, dekomence ĝisfine, mi havis la malavantaĝon tuj de la unua horo! Ĉu vi scias la rolon kiun mi ludis en tiu afero, aŭ pliĝuste la rolon kiun ili ludigis al mi? Tiun de André Brawford! Jes, kara mia, kaj mi nenion vidis!

« Nur poste, per la gazetoj, kaj rilatigante kelkajn detalojn, mi ekkomprenis tion. Dum mi ŝajnigis la bonfaranton, la sinjoron kiu riskis sian vivon por eltiri onin el la grifo de la apaĉoj, siaflanke, ili prezentis min kvazaŭ unu el la Brawford!

« Ĉu tio ne estas admirinda? Tiu originalulo kiu havis sian ĉambron en la dua etaĝo, tiu sovaĝulo kiun oni montris de for, li estis Brawford, kaj Brawford, li estis mi! Kaj danke al mi, danke al la fido, kiun mi sugestis sub la nomo Brawford, la bankistoj pruntedonis, kaj la notarioj instigis siajn klientojn pruntedoni! Kia lernejo por komencanto, ĉu ne? Ha! mi ĵuras al vi, ke la leciono utilis al mi!

Li abrupte haltis, ekkaptis mian brakon, kaj diris al mi per incitegita tono, en kiu, tamen, oni facile sentis nuancojn da ironio kaj admiro, li diris al mi tiun nekredeblan frazon:

– Kara mia, nuntempe, Gervaise Imbert ŝuldas al mi mil kvincent frankojn!

Tujtuj, mi ne povis malhelpi min ridi. Tio vere estis elstara bufonaĵo. Kaj li mem sincere ekgajis.

– Jes, kara mia, mil kvincent frankojn! Mi ne nur ne enspezis la unuan centimon de mia salajro, sed ankaŭ ŝi depruntis de mi mil kvincent frankojn! Ĉiujn miajn monŝparojn de junulo! Kaj ĉu vi scias kial? Mi defias vin diveni... por siaj malriĉuloj! Tiel kiel mi diras al vi! por laŭdiraj malfeliĉuloj, kiujn ŝi helpis kaŝe de Ludoviko!

« Kaj mi partoprenis tion! Estas relative komike, ĉu? Arseno Lupeno prifriponita je mil kvincent frankoj, kaj prifriponita de la bona virino al kiu li ŝtelis kvar milionojn da falsaj biloj! Kaj kiom da kombinoj, klopodoj kaj geniaj ruzoj mi

bezonis por alveni al tiu bela rezulto!

« Jen la sola fojo, ke mi estis superruzita en mia vivo. Sed diable! tia mi ja estis tiun fojon, kaj se tiel diri, grandpreze!...

La nigra perlo

Akra sonorila ektinto vekis la pordistinon ĉe la numero 9 de la avenuo Hoche. Ŝi tiris la kordonon grumblante:

– Mi kredis ĉiujn rehejmeniĝintaj. Estas almenaŭ la tria!

Ŝia edzo plendaĉis:

– Eble tio estas por la kuracisto.

Efektive, voĉo demandis:

– La doktoro Harel... kiu etaĝo?

– La tria maldekstre. Sed la doktoro ne deĵoras nokte.

– Ja necesos, ke li deĵoru.

La sinjoro eniris la vestiblon, supreniris unu etaĝon, du etaĝojn, kaj, eĉ ne haltante ĉe la nivelo de la doktoro Harel, daŭrigis ĝis la kvina etaĝo. Tie, li provis du ŝlosilojn. Unu funkciigis la seruron, la alia la sekurecan riglilon.

– Mirinde, li murmuris, la tasko estas konsiderinde simpligita. Sed antaŭ ol agi, necesas asekuri la retreton. Nu... ĉu

mi logike havis la tempon sonorigi ĉe la kuracisto, kaj esti forpelita de li?

« Ne ankoraŭ... iom da pacienco...

Post deko da minutoj, li malsupreniris kaj frapis la vitron de la loĝio grumblante kontraŭ la kuracisto. Oni malfermis al li, kaj li klakigis la pordon post si. Tamen, tiu pordo ne fermiĝis, ĉar la viro almetis ferpecon sur la riglilingon por ke la riglilo ne povu ŝoviĝi en ĝin.

Li do eniris, senbrue, kaŝe de la gepordistoj. Kaze de alarmo, lia retreto estis sekura.

Trankvile, li resupreniris la kvin etaĝojn. En la antaŭĉambro, en la lumo de elektra lanterno, li delasis sian surtuton kaj sian ĉapelon sur unu seĝon, eksidis sur alian, kaj volvis siajn botetojn per dikaj feltaj piedvestoj.

– Uf! jen farite... Kaj kiom facile! Mi iom demandas al mi kial ĉiuj ne elektas la komfortan metion de ŝtelisto? Kun iom da lerteco kaj pripenso, ne estas iu pli ĉarma. Metio tute trankvila... metio de familia patro... eĉ tro facila... tio fariĝas enuiga.

Li malfaldis detalan planon de la apartamento.

– Mi unue orientiĝu. Tie mi ekvidas la vestiblan ortangulon kie mi estas. Flanke de la strato, la salono, la buduaro kaj la manĝoĉambro. Senutilas malŝpari tempon tie, laŭdire la grafino havas plorindan guston... ne unu valoraĵo!... Do, rekte al la celo... Ha! jen la desegno de koridoro, de la koridoro kiu kondukas al la dormoĉambroj. Je tri metroj, mi renkontu la

pordon de la robtenejo kiu komunikiĝas kun la dormoĉambro de la grafino.

Li refaldis la planon, malŝaltis la lanternon, kaj eniĝis en la koridoron kalkulante:

– Unu metron... du metrojn... tri metrojn... Jen la pordo... Kiel ĉio enordiĝas, Dio mia! Simpla riglilo, eta riglilo, disigas min de la dormoĉambro, kaj plie, mi scias ke tiu riglilo troviĝas je unu metro kaj kvardek tri de la planko... Tiel ke, danke al malgranda tranĉo kiun mi faros ĉirkaŭe, mi malembarasos min je ĝi...

Li elpoŝigis la necesajn instrumentojn, sed ideo haltigis lin.

– Kaj se, hazarde, tiu riglilo ne estus puŝita? Mi tamen provu... Tio kostas nenion!

Li turnis la seruran butonon. La pordo malfermiĝis.

– Bona Lupeno mia, nekontestible bonsorto favoras vin. Kion vi bezonas nun? Vi scias la lokan topografion kie vi agos; vi scias la ejon kie la grafino kaŝas la nigran perlon... Konsekvence, por ke la nigra perlo estu via, temas tute stulte pri esti pli silenta ol la silento, pli nevidebla ol la nokto.

Arseno Lupeno uzis minimume duonhoron por malfermi la duan pordon, vitran pordon kiu kondukis al la dormoĉambro. Sed li faris tion kun tiom da zorgoj, ke eĉ se la grafino ne dormus, neniu ambigua grinco povus maltrankviligi ŝin.

Laŭ la indikoj de sia plano, li nur sekvu la konturon de longseĝo. Tio kondukus lin al fotelo, poste al tableto situanta apud la lito. Sur la tablo, estis skatolo da leterpapero, kaj, tute simple enfermita en tiu skatolo, la nigra perlo.

Li sternis sin sur la tapiŝo kaj sekvis la konturojn de la longseĝo. Sed ĉe la ekstremaĵo li haltis por subpremi siajn korbatojn. Kvankam neniu timo agitis lin, li ne povis venki tian nervozan angoron, kian oni spertas en tro granda silento. Kaj li miris pro tio, ĉar, fine, li senemocie estis travivinta pli solenajn minutojn. Neniu danĝero minacis lin. Kial do lia koro batis kvazaŭ panikata sonorilo? Ĉu lin impresis tiu dormanta virino, tiu vivo tiel proksima al la lia?

Li aŭskultis kaj kredis percepti la ritmon de spirado. Li estis trankviligita kvazaŭ de amika ĉeesto.

Li serĉis la fotelon, poste, per nerimarkeblaj gestetoj, rampis al la tableto, palpante la ombron per sia etendita brako. Lia dekstra mano renkontis unu el la piedoj de la tablo.

Finfine! restis al li nur ekstari, preni la perlon kaj foriri. Feliĉe! ĉar lia koro denove eksaltis en lia brusto kvazaŭ terurita besto, kaj kun tia bruo, ke ŝajnis al li neeble ke la grafino ne vekiĝas.

Li pacigis ĝin per mirinda strebo de volo, sed, kiam li provis restariĝi, lia maldekstra mano frapis sur la tapiŝo objekton, kiun li tuj rekonis kiel kandelingon, falintan kandelingon; kaj tiam, alia objekto sin prezentis, horloĝo, unu el tiuj vojaĝaj horloĝetoj kiuj estas tegitaj de leda ingo.

Kio estas? Kio okazis? Li ne komprenis. Tiu kandelingo... tiu horloĝo... kial tiuj objektoj ne estis en sia kutima loko? Ha! kio okazis en la timiga ombro?

Kaj subite, li ellasis krion. Li tuŝis... ho! kian stangan aĵon, abomenindan! Ne, ne, la timo konfuzis lian cerbon. Dudek sekundojn, tridek sekundojn, li restis senmova, terurite, ŝviton ĉe la tempioj. Kaj liaj fingroj konservis la sensaĵon de tiu kontakto.

Per nefleksebla fortostreĉo, li denove etendis la brakon. Lia mano, denove, tuŝetis la aĵon, la stangan aĵon, abomenindan. Li ĝin palpis. Li postulis, ke lia mano ĝin palpu kaj ekkonsciis. Tio estis hararo, vizaĝo... kaj tiu vizaĝo estis malvarma, preskaŭ frosta.

Kiom ajn terura estas la realeco, viro kiel Arseno Lupeno regas ĝin, tuj kiam li ekscias ĝin. Rapide, li puŝis la risorton de sia lanterno. Virino kuŝis antaŭ li, sangokovrite. Hidaj vundoj traŝiris ŝian kolon kaj ŝiajn ŝultrojn. Li kliniĝis kaj ekzamenis ŝin. Ŝi estis mortinta.

– Mortinta, mortinta, li ripetis stupore.

Kaj li rigardis tiujn fiksaĵajn okulojn, la ridgrimacon de tiu buŝo, tiun lividan karnon, tiun sangon, tiun tutan sangon kiu fluis sur la tapiŝon kaj nun koaguliĝis, viskozan kaj nigran.

Restariĝinte, li turnis la lumŝaltilon, la ĉambro pleniĝis per lumo, kaj li povis vidi ĉiujn signojn de intensa lukto. La lito estis tute malaranĝita, la kovriiloj kaj la litotukoj elŝiritaj. Surplanke, la kandelingo, kaj la horloĝo – la montriloj indikis la dek unua kaj dudek – poste, pli fore, renversita seĝo, kaj ĉie sango, flakoj da sango.

– Kaj la nigra perlo? li murmuris.

La skatolo da leterpapero estis en sia loko. Li malfermis ĝin vigle. Ĝi enhavis la juvelujon. Sed la juvelujo estis malplena.

– Diable! li pensis, vi fanfaronis iom frue pri via bonŝanco, mia amiko Arseno Lupeno... La grafino murdita, la nigra perlo malaperinta... la situacio ne brilas! Ni forpafiĝu, alie vi tutcerte riskas pezajn respondecojn.

Li tamen ne moviĝis.

– Ĉu forpafiĝi? Jes, aliulo forpafiĝus. Sed ĉu Arseno Lupeno? Ĉu ne estas pli bona farendajo? Nu, ni orde procedu. Fine, via konscienco estas trankvila... Supozu, ke vi estas polica komisaro kaj ke vi enketu... Jes, sed tiucele necesus havi pli klaran cerbon. Kaj la mia estas en tia stato!

Li falis sur la fotelon, kun la pugnoj kunpremitaj ĉe la varmega frunto.

La afero de la avenuo Hoche estas unu el tiuj, kiuj plej vigle scivolis nin lastatempe, kaj mi certe ne estus rakontinta ĝin se la partopreno de Arseno Lupeno ne lumigus ĝin per tute speciala vidpunkto. Tiu partopreno, malmultaj suspektas ĝin. Ĉiukaze neniu scias la ekzaktan kaj kuriozan veron.

Kiu ne konis, renkontite ŝin en la Bosko, Leontinon Zalti, la malnovan kantistinon, edzinon kaj vidvinon de la grafo d'Andillot, la Zalti kies lukso mirigis Parizon antaŭ kelkaj dudek jaroj, la grafinon d'Andillot, al kiu ŝiaj diamantaj kaj perlaj ornamaĵoj havigis eŭropean famon? Oni diris pri ŝi, ke ŝi

surhavas sur siaj ŝultroj la monŝrankon de pluraj bankoj kaj la orminojn de pluraj aŭstraliaj kompanioj. La grandaj juvelistoj laboris por Zalti, kiel oni iam laboris por la reĝoj kaj la reĝinoj.

Kaj kiu ne memoras la katastrofon, kiam ĉiuj tiuj riĉaĵoj estis englutitaj? Bankojn kaj orminojn, la abismo ĉion voris. El la mirinda kolekto, disigita de la aŭkciisto, restis nur la fama nigra perlo. La nigra perlo! tio estas monriĉaĵo, se ŝi volus forvendi ĝin.

Tion ŝi ne volis. Ŝi preferis limigi sin, vivi en simpla apartamento, kun sia helpantino, sia kuiristino kaj unu servisto, prefere ol vendi tiun netakseblan juvelon. Pri tio estis kialo, kiun ŝi ne timis konfesi: la nigra perlo estis donaco de imperiestro! Kaj preskaŭ ruinigite, reduktite al la plej mallaŭdinda ekzistado, ŝi restis fidela al sia memoraĵo pri la belaj tagoj.

– Mi vivanta, ŝi diris, mi ne forlasos ĝin.

Dematene ĝisvespere, ŝi surhavis ĝin ĉe la kolo. Nokte, ŝi metis ĝin en lokon konatan nur de ŝi sola.

Ĉiuj tiuj faktoj rememorigitaj de la ĵurnaloj spronis scivolemon, kaj, stranga afero, sed facile komprenebla por tiuj kiuj konas la solvon de la enigmo, precize la aresto de la laŭsupoza murdinto komplikis la misteron kaj plidaŭrigis la emocion. La postmorgaŭon, efektive, la gazetoj publikigis la jenan novelon:

“Oni anoncas al ni la areston de Viktoro Danègre, la servisto de la grafino d'Andillot. La akuzoj registritaj kontraŭ li estas premegantaj. Sur la maniko el kalandrita ŝtofo de lia

livrea veŝto, kiun S-ro Dudouis, la Sekureca estro, trovis en lia mansardo, inter la somiero kaj la matraco, oni konstatis sangomakulojn. Krome, mankis al tiu veŝto butono tegita de ŝtofo. Nu tiu butono, tuj de la komenco de la traserĉadoj, estis trovita sub la lito mem de la viktimo.

Estas probable, ke post la vespermanĝo, Danègre, anstataŭ reiri al sia mansardo, estos enŝteliĝinta en la robtenejo, kaj ke, tra la vitra pordo, li vidis la grafanon kaŝi la nigran perlon.

Ni diru, ke ĝis tiam, neniuj pruvo alkonfirmis tiun supozon. Ĉiukaze, alia punkto restas malklara. Je la sepa matene, Danègre iris al la tabakvendejo de la bulvardo Courcelles: la pordistino unue, kaj poste la tabakisto atestis prie. Aliflanke, la kuiristino de la grafino kaj ties helpantino, kiuj ambaŭ kuŝas ĉe la fino de la koridoro, asertas ke je la oka, kiam ili ellitiĝis, la antaŭĉambra pordo kaj la kuirejo pordo estis duturne ŝlositaj. De dudek jaroj je la servo de la grafino, tiuj du personoj estas nesuspektindaj. Oni do demandas sin kiel Danègre povis eliri el la apartamento. Ĉu li fabrikigis alian ŝlosilon? La enketo klarigos tiujn malsamajn punktojn.”

La enketo klarigis absolute nenion, male. Oni eksciis, ke Viktoro Danègre estas danĝera jam konata krimulo, drinkulo kaj diboĉulo, kiun tranĉila frapo ne timigis. Sed la afero mem ŝajnis, laŭgrade kiam oni studis ĝin, involviĝi per pli dikaj mallumoj kaj per pli neklarigeblaj kontraŭaĵoj.

Unue fraŭlino de Sinclèves, kuzino kaj unika heredontino de la viktimo, deklaris ke la grafino, unu monaton antaŭ sia morto, konfidis al ŝi en unu el siaj leteroj la manieron per kiu ŝi kaŝis la nigran perlon. La morgaŭon de la tago kiam ŝi recevis la leteron, ŝi konstatis ties malaperon. Kiu ŝtelis ĝin?

Siaflanke, la gepordistoj rakontis ke ili malfermis la pordon al ulo, kiu supreniris ĉe la doktoro Harel. Oni vokis la doktoron. Neniu sonorigis ĉe li. Do kiu estis tiu ulo? Ĉu komplico?

Tiu hipotezo pri komplico estis adoptita de la gazetaro kaj de la publiko. Ganimardo, la maljuna ĉefinspektoro, defendis ĝin, ne sen kialo.

– Estas Lupenaĵo malantaŭ tio, li diris al la juĝisto.

– Ba! rebatis ĉi tiu, vian Lupenon ĉie vi vidas.

– Mi vidas lin ĉie, ĉar li estas ĉie.

– Pliguste diru, ke vi vidas lin ĉiufoje kiam io ŝajnas al vi ne tre klara. Cetere, en tiu kazo, rimarku tion: la krimo estis plenumita je la dek unua kaj dudek vespere, kiel atestas la horloĝo, kaj la nokta vizito, denunciata de la gepordistoj, okazis nur je la tria matene.

La justico ofte obeas tiujn movojn de konvinkoj, pro kiuj oni devigas la okazintaĵojn konformiĝi al la unua klarigo, kiun oni donis pri ili. La plorindaj antaŭaĵoj de Viktoro Danègre, plurfoja krimulo, drinkulo kaj diboĉulo, influis la juĝiston, kaj kvankam neniu nova cirkonstanco konfirmis la du aŭ tri indicojn komence malkovritajn, nenio povis lin ŝanceli. Li fermis sian enketon. Kelkajn semajnojn poste, la debatoj komenciĝis.

Ili estis embarasaj kaj malviglaj. La prezidanto estris ilin sen ardo. La prokuroraro mole atakis. En tiuj kondiĉoj, la advokato de Danègre estis en favora situacio. Li montris la mankojn kaj la neeblaĵojn de la akuzo. Neniu materia pruvo

ekzistis. Kiu forĝis la ŝlosilon, la nemalhaveblan ŝlosilon sen kiu Danègre, post sia foriro, ne estus povinta duturne refermi la pordon de la apartamento? Kiu vidis ĝin, tiun ŝlosilon, kaj kio ĝi fariĝis? Kiu vidis la tranĉilon de la murdinto, kaj kio ĝi fariĝis?

– Kaj, ĉiukaze, konkludis la advokato, pruvu ke mia kliento mortigis. Puvu ke la aŭtoro de la ŝtelo kaj de la krimo ne estas tiu mistera persono kiu penetris en la domon je la tria matene. La horloĝo indikis la dek unua, ĉu vi diros al mi? Kaj poste? Ĉu oni ne povas meti la montrilojn de horloĝo je la horo, kiu taŭgas al si?

Viktoro Danègre estis malkondamnita.

Li eliris la malliberejon iun vendredon je la sunsubiĝo, maldikigite, deprimate de ses monatoj en carcero. La enketo, la soleco, la debatoj, la ĵuriaj pridiskutadoj, ĉio tio plenigis lin je malsaniga timo. Nokte, hidaj inkubsonĝoj, vizioj pri eŝafodo hantis lin. Li tremis pro febro kaj teruro.

Sub la nomo Anatolo Dufour, li luis ĉambreton sur la altaĵoj de Montmartre, kaj li vivis laŭ hazardo de la okupoj, laboretante ie-tie.

Kia kompatinda vivo! Trifoje dungite de tri malsamaj labordonantoj, li estis rekonita kaj tuj forpelita.

Ofte li rimarkis, aŭ kredis rimarki, ke viroj sekvas lin, viroj el la polico, li ne dubis pri tio, kiu ne rezignis faligi lin en iun insidon. Kaj li antaŭsentis la premon de la kruda mano, kiu ekkaptos lin.

Iun vesperon, dum li manĝis ĉe kvartala restoraciisto, iu instaliĝis fronte al li. Li estis kvardekjarulo, vestita per nigra redingoto, de dubinda pureco. Li mendis supon, legomojn kaj unu litron da vino.

Kaj kiam li finmanĝis la supon, li alrigardis al Danègre kaj observis lin longe.

Danègre paliĝis. Tutcerte tiu ulo estis unu el tiuj, kiuj sekvis lin de semajnoj. Kion li volis de li? Danègre provis ekstari. Tion li ne povis. Liaj gamboj ŝanceliĝis sub li.

La viro verŝis al si glason da vino kaj plenigis la glason de Danègre.

– Ĉu ni trinku, kamarado?

Viktoro balbutis:

– Jes... jes... je via sano, kamarado.

– Je via sano, Viktoro Danègre.

La alia eksaltis:

– Mi!... mi!... tute ne... mi ĵuras al vi...

– Kion vi ĵuras al mi? ke vi ne estas vi? la servisto de la grafino?

– Kiu servisto? Mi nomiĝas Dufour. Demandu al la estro.

– Dufour, Anatolo, jes, por la estro, sed Danègre por la justico, Viktoro Danègre.

– Malvere! Malvere! oni mensogis al vi.

La novalveninto elpoŝigis karton kaj etendis ĝin. Viktoro legis:

“Grimaudan, eks-inspektoro de la Sekureco. Konfidencaj informoj.” Li ekstremis.

– Vi estas el la polico?

– Nun ne plu, sed la metio plaĉis al mi, kaj mi daŭrigas per maniero pli... lukra. Oni elfosas tempaltempe orajn aferojn... kiel la vian, ĉu?

– La mian?

– Jes, la vian, ĝi estas escepta afero, se tamen vi bonvole montras iom da komplezo.

– Kaj se tion mi ne montras?

– Ja necesos. Vi estas en situacio, kie vi povas nenion rifuzi al mi.

Malklara timo invadis Viktoron Danègre. Li demandis:

– Kio estas?... parolu.

– Bone, respondis la alia, ni finu kun tio. Unuvorte, jen: mi estas sendata de F-ino de Sinclèves.

– Ĉu Sinclèves?

– La heredotino de la grafino d'Andillot.

– Nu?

– Nu, F-ino de Sinclèves min komisiis peti al vi la nigran perlon?

– Ĉu la nigran perlon?

– Tiun, kiun vi ŝtelis.

– Sed mi ne havas ĝin!

– Vi havas ĝin.

– Se mi havus ĝin, mi estus la murdinto.

– Vi estas la murdinto.

Danègre devigis al si ridi.

– Feliĉe, bona sinjoro mia, la kortumo ne havis la saman opinion. Ĉiuj ĵurianoj, vi ja aŭdas, deklaris min senkulpa. Kaj kiam oni havas trankvilan konsciencon kaj la estimon de dek du bravuloj...

La eks-inspektoro ekkaptis lian brakon:

– Ne babilu, etulo mia. Aŭskultu min tre atente kaj pesu miajn parolojn, ili valoras la penon. Danègre, tri semajnojn

antaŭ la krimo, vi ŝtelis al la kuiristino la ŝlosilon kiu malfermas la servistan pordon, kaj vi farigis similan ŝlosilon ĉe Outard, seruristo, en la n-ro 244 de la strato Oberkampf.

– Malvere, malvere, tondris Viktoro, neniu vidis tiun ŝlosilon... ĝi ne ekzistas.

– Jen ĝi.

Post silento, Grimaudan daŭrigis:

– Vi mortigis la grafinon per ringotranĉilo aĉetita al la bazaro de la République, la tagon mem kiam vi mendis vian ŝlosilon. La klingo estas triangula kaj enstrekitita de kanelo.

– Ŝerco, ĉio tio, vi parolas hazarde. Neniu vidis la tranĉilon.

– Jen ĝi.

Viktoro Danègre havis retroan geston. La eks-inspektoro daŭrigis:

– Estas sur ĝi makuloj el rusto. Ĉu vi bezonas klarigon pri ilia deveno?

– Kaj poste?... vi havas ŝlosilon kaj tranĉilon... Kiu povas aserti, ke ili apartenis al mi?

– La seruristo unue, kaj poste la dungito al kiu vi aĉetis la tranĉilon. Mi jam refreŝigis ilian memoron. Fronte al vi, ili senmanke rekonos vin.

Li parolis seke kaj malmilde, kun terura precizeco. Danègre konvulsiis pro timo. Nek la juĝisto, nek la tribunala prezidanto, nek la prokuroro premis lin de tiel proksime, vidis tiel klare en la aferoj, kiujn li mem ne plu tre nete distingis.

Tamen, li provis ankoraŭ ludi indiferecon.

– Se nur tio estas ĉiuj viaj pruvoj!

– Restas al mi tiun ĉi. Vi foriris, post la krimo, laŭ la sama vojo. Sed, meze de la robtenejo, trafite de timego, vi kredeble apogiĝis kontraŭ la muro por konservi la ekvilibron.

– Kiel vi scias tion? balbutis Viktoro... neniu povas scii tion.

– La justico, ne, neniu el tiuj sinjoroj de la prokuroraro povis havi la ideon eklumigi kandelon kaj ekzameni la murojn. Sed se tion oni farus, oni vidus sur la blanka gipso tre delikatan ruĝan markon, tamen sufiĉe netan por ke oni rekonu la spuron de la antaŭa faco de via dikfingro, de via dikfingro tute malseka pro sango, kaj kiun vi metis sur la muron. Nu vi ja scias ke en antropometrio, tio estas unu el la ĉefaj identigaj rimedoj.

Viktoro Danègre estis palega. Gutoj da ŝvito fluis el lia frunto. Li rigardegis kun frenezulaj okuloj tiun strangan viron, kiu elvokis lian krimon kvazaŭ li estus ĝian nevidebla atestinto.

Li mallevis la kapon, venkita, senpova. De monatoj li luktis kontraŭ ĉiuj. Kontraŭ tiu viro, li havis la impreson, ke estas nenio fareda.

– Se mi redonas al vi la perlon, li balbutis, kiom vi donos al mi?

– Nenion.

– Kion! vi mokas! Mi donus al vi aferon, kiu valoras milojn kaj centojn da miloj, kaj mi havus nenion, ĉu?

– Jes, la vivon.

La fiulo tremetis. Grimaudan aldonis, per tono preskaŭ milda:

– Pripensu, Danègre, tiu perlo havas neniun valoron por vi. Vi ne povos vendi ĝin. Kial do konservi ĝin?

– Estas kaŝvendistoj... kaj tagon aŭ alian, ajnakoste...

– Tagon aŭ alian estos tro malfrue.

– Kial?

– Kial? sed ĉar la justico estos kaptinta vin, kaj, ĉi-foje, kun la pruvoj kiujn mi provizos al ĝi, la tranĉilo, la ŝlosilo, la indiko pri via dikfingro, vi estas perdita, ulo mia. Viktoro ĉirkaŭpremis sian kapon per ambaŭ manoj kaj pripensis. Li sentis sin perdita, efektive, neŝanĝebla perdita, kaj, samtempe, granda laceco invadis lin, grandega bezono de repozo kaj sinallaso. Li murmuris:

– Kiam vi bezonas ĝin?

– Ĉi-vespere, antaŭ unu horo.

– Se ne?

– Se ne, mi enpoŝtigas tiun leteron, kie S-ino de Sinclèves denuncas vin al la respublika prokuroro.

Danègre verŝis al si du glasojn da vino, kiujn li sinsekve trinkis, poste ekstarante:

– Pagu la kalkulon, kaj ni iru... Min tedas tiu malbenita afero.

Noktiĝis. La du viroj laŭiris la straton Lepic kaj sekvis la eksterajn bulvarojn direktiĝante al l'Étoile. Ili marŝis silente, Viktoro, tre laca kaj kun dorso arka.

Ĉe la parko Monceau, li diris:

– Tio estas al la domo...

– Je Dio! vi eliris ĝin, antaŭ via aresto, nur por iri al la tabakvendejo.

– Jen ni alvenis, diris Danègre, per obtuza voĉo.

Ili paŝis laŭ la ĝardena krado, kaj trairis straton, ĉe kies angulo la tabakvendejo estis. Danègre haltis kelkajn paŝojn poste. Liaj gamboj ŝanceliĝis. Li falis sur benkon.

– Nu? demandis lia kunulo.

– Ĝi estas tie.

– Ĝi estas tie? Kion vi rakontas al mi?

– Jes tie, antaŭ ni.

– Antaŭ ni! Ej, Danègre, vi ja ne...

– Mi ripetas al vi, ke ĝi estas tie...

– Kie?

– Inter du pavimeroj.

– Kiuj?

– Serĉu.

– Kiuj? ripetis Grimaudan.

Viktoro ne respondis.

– Ha! perfekte, vi volas atendigi min, ulo mia.

– Ne... sed... restos al mi nur mizero.

– Kaj do, ĉu vi hezitas? Nu, mi estos indulgema. Kiom vi bezonas?

– Iom sufiĉa por preni interferdekan bileton por Ameriko.

– Konsentite.

– Kaj centfrankan bileton por la unuaj elspezoj.

– Vi havos du. Parolu.

– Kalkulu la pavimeroj, dekstre de la kloako. Ĝi estas inter la dekdua kaj la dektria.

– Ĉu en la defluilo?

– Jes, malsupre de la trotuaro.

Grimaudan rigardis ĉirkaŭ li. Tramoj pasis, homoj pasis. Sed ba! kiu povus suspekti?...

Li disfaldis sian poŝtranĉilon kaj enpuŝis ĝin inter la dekduan kaj la dektrian pavimeron.

– Kaj se ĝi ne estas tie?

– Se neniuj vidis min kliniĝi kaj enprofundigi ĝin, ĝi ankoraŭ estas tie.

Ĉu ĝi povus esti tie? La nigra perlo ĵetita en la koton de defluilo, je la dispono de ĉiu ajn! La nigra perlo... monriĉaĵo!

– Je kiu profundo?

– Ĝi estas je dek centimetroj, proksimume.

Li fosis la malsekan sablon. La pinto de lia poŝtrancilo tuŝis ion. Per la fingroj, li plilarĝigis la truon.

Li ekvidis la nigran perlon.

– Prenu, jen viaj ducent frankoj. Mi sendos al vi vian bileton por Ameriko.

La morgaŭon, *Écho de France* publikigis tiun artikoleon, kiu estis reproduktita de la gazetoj el la tuta mondo.

“De hieraŭ, la fama nigra perlo estas en la manoj de Arseno Lupeno, kiu kaptis ĝin el la murdinto de la grafino d'Andillot. Post nelonge, faksimiloj de tiu altvalora juvelo estos ekspoziciitaj en Londono, Sankt-Peterburgo, Kalkato, Bonaero kaj Novjorko.

Arseno Lupeno atendas la proponojn, kiujn bonvolos fari al li liaj korespondantoj.”

– Kaj jen kiel krimo ĉiam estas punita kaj virto rekompencita, konkludis Arseno Lupeno, kiam li revelaciis al mi la malantaŭaĵojn de la afero.

– Kaj jen kiel, sub la nomo Grimaudan, eks-inspektoro de la Sekureco, vi estis elektita de la destino por forpreni de la krimulo la profiton de lia misfaro.

– Ĝuste. Kaj mi konfesas, ke tio estas unu el la aventuroj pri kiuj mi plej fieras. La kvardek minutoj, kiujn mi pasigis en la apartamento de la grafino, konstatinte ŝian morton, estas inter la plej mirigaj kaj la plej profundaj el mia vivo. Dum kvardek minutoj, implikite en la plej nesolvebla situacio, mi restarigis la krimon, mi akiris la certecon, helpe de kelkaj indicoj, ke la kulpulo povas esti nur servisto de la grafino. Fine, mi komprenis ke, por havi la perlon, tiu servisto estu arestita – kaj mi lasis la veŝtan butonon – sed ke oni ne kolektu kontraŭ li nekontesteblajn pruvojn pri lia kulpeco – kaj mi plukis la tranĉilon forgesitan sur la tapiŝo, forprenis la ŝlosilon forgesitan en la seruro, deturne fermis la pordon, kaj forviŝis la

fingrajn spurojn sur la gipso de la robtenejo. Miaopinie, tio estis unu el la fulmideoj...

– De geniulo, mi interrompis.

– De geniulo, se vi volas, sed kiu ne estus klariginta la cerbon de ĉiu ajn. Diveni en unu sekundo ambaŭ flankojn de la problemo – areston kaj malkondamnon – uzi la mirindan sistemon de la justico por perturbi mian viron, por konfuzi lin, resume, por meti lin en tian spiritostaton, ke liberigite, li neeviteble, fatale, falu en la iom krudan kaptilon, kiun mi starigis al li!...

– Iom? diru multe, ĉar li kuris en neniun danĝeron.

– Ho! eĉ ne la plej malgrandan, ĉar ĉiu malkondamno estas definitiva afero.

– La kompatindulo...

– La kompatindulo... Viktoro Danègre! ĉu vi ne pensas, ke li estas murdinto? Tio estintus la lasta malmoralajo ke la perlo restu al li. Li vivas, pensu do, Danègre vivas!

– Kaj la nigra perlo estas via.

Li eligis ĝin el sekreta poŝo de sia paperujo, ekzamenis ĝin, karesis ĝin per la fingroj kaj la okuloj, kaj li suspiris:

– Kiu bojaro, kiu stulta kaj vanta raĝo posedis tiun trezoron? Al kiu usona miliardulo destiniĝas la malgranda peco da beleco kaj lukso, kiu ornamis la blankajn ŝultrojn de Leontino Zalti, grafino d'Andillot?...

Ŝerloko Holmsso alvenas tro malfrue

– Estas strange, kiom vi similas al Arseno Lupeno, Vermont!

– Vi konas lin!

– Ho! kiel ĉiuj, per liaj fotografaĵoj, el kiuj neniuj estas sama al la aliaj, sed el kiuj ĉiu lasas la impreson de egala fisionomio... kiu ja estas la via.

Horacio Vermont ŝajnis iom ofendita.

– Ĉu ne, mia kara Devanne? Kaj vi ne estas la unua, kiu rimarkigas tion al mi, kredis tion.

– Tio estas, insistis Devanne, ke se vi ne estus rekomendita de mia kuzo de Estevan, kaj se vi ne estus la fama pentristo kies belajn marpentraĵojn mi admiras, mi demandus al mi ĉu mi ne estus avertinta la policon pri via ĉeesto en Dieppe.

La ŝerco estis ricevita de ĝenerala rido. Tie estis, en la granda manĝoĉambro de la kastelo de Thibermesnil, krom Vermont: la abato Gélis, paroĥestro de la vilaĝo, kaj dekduo da oficiroj, kies regimentoj manovris en la ĉirkaŭaĵoj, kaj kiuj respondis al la invito de la bankestro Georgo Devanne kaj lia patrino. Unu el ili ekkriis:

– Sed prie, ĉu Arseno Lupeno ne estis signalita ĉe la marbordo, post sia fama ago de la rapidtrajno de Parizo al Havro?

– Tute prave, antaŭ tri monatoj, kaj la sekvantan semajnon mi konatiĝis en la kazino kun nia bonega Vermont kiu, de tiam, bonvole honoris min per kelkaj vizitoj – agrabla enkonduko al pli serioza hejmvizito, kiun li reciprokos al mi en unu el la venontaj tagoj... aŭ pliĝuste noktoj!

Oni ridis denove kaj oni pasis en la malnovan ĉambron de la gardistoj, vastan ĉambron, tre altan, kiu okupas la tutan malsupran parton de la turo Vilhelmo, kaj kie Georgo Devanne kunigis la senegalajn riĉaĵojn amasigitajn tra la jarcentoj fare de la senjoroj de Thibermesnil. Kofroj kaj kredencoj, ŝtipoportiloj kaj kandelingoj ornamas ĝin. Belegaj tapiŝoj pendas sur la ŝtonaj muroj. La embrazuroj de la kvar fenestroj estas profundaj, garnitaj per benkoj, kaj finiĝas per ogivaj fenestroframoj kun plumbe kadritaj vitraloj. Inter la pordo kaj la maldekstra fenestro, staras monumenta Renesanco-stila libroŝranko, sur kies frontono oni legas, en orliteroj: *“Thibermesnil”* kaj sube, la fieran devizon de la familio *“Faru kion vi volas.”*

Kaj ĉar oni lumigis cigarojn, Devanne daŭrigis:

– Tamen, rapidu, Vermont, tio estas la lasta nokto restanta al vi.

– Kaj kial? diris la pentristo kiu, finfine, prenis la aferon ŝerce.

Devanne estis respondonta kiam lia patrino signis al li. Sed la eksciteco de la vespermanĝo, kaj la deziro interesi siajn gastojn venkis.

– Ba! li murmuris, mi povas paroli nun. Maldiskretaĵo ne plu timindas.

Oni eksidis ĉirkaŭ li kun vigla scivolo, kaj li deklaris, per la kontenta mieno de iu kiu anoncas gravan novaĵon:

– Morgaŭ, je la kvara vespere, Ŝerloko Holmso, la granda brita policisto por kiu ne ekzistas iu mistero, Ŝerloko Holmso, la plej eksterordinara malĉifrantanto de enigmoj kiun oni iam vidis, la mirindega persono kiu ŝajnas komplete elforgita de la imago de romanisto, Ŝerloko Holmso estos mia gasto.

Oni ekkriis. Ĉu Ŝerloko Holmso en Thibermesnil? Ĉu do tio estis serioza? Ĉu Arseno Lupeno vere troviĝis en la regiono?

– Arseno Lupeno kaj lia bando ne estas malproksime. Sen enkalkuli la aferon de la barono Kahorno, al kiu atribui la ŝteladon de Montigny, de Gruchet, de Crasville, krom al nia nacia ŝtelisto? Hodiaŭ, estas mia vico.

– Kaj ĉu vi estas avertita, kiel estis la barono Kahorono?

– La sama ruzo ne sukcesas dufoje.

– Kaj do?

– Kaj do?... jen do.

Li ekstaris, kaj fingre montrante, sur unu el la bretoj de la libroŝranko, malplenan loketon inter du grandegaj foliantoj:

– Estis libro tie, libro de la 16-a jarcento, titolita la *Kroniko de Thibermesnil*, kaj kiu estis la historio de la kastelo ekde sia konstruo de la duko Rollon sur la situo de feŭda fortreso. Ĝi enhavis tri gravuritajn tabulojn. Unu prezentis rajdan vidaĵon de la ĝenerala bieno, la dua la planon de la konstruaĵoj, kaj la tria – mi atentigas vin pri tio – la mapon de subteraĵo de kiu unu eliro malfermiĝas je la ekstero de la unua linio de remparoj, kaj la alia kondukas ĉi tien, jes, en la ĉambron mem kie ni staras. Nu tio libro malaperis de la pasinta monato.

– Diable, diris Velmont, tio estas malbonaŭgura. Tamen tio ne sufiĉas por motivi la intervenon de Ŝerloko Holms.

– Certes, tio ne sufiĉus se ne estus okazinta alia fakto, kiu donas al tiu, kiun mi ĵus rakontis, ĝian tutan signifon. Ekzistis en la Nacia Biblioteko dua ekzemplero de tiu *Kroniko*, kaj tiuj du ekzempleroj malsamis laŭ kelkaj detaloj koncerne la subteraĵon, kiel la aldono de profilo kaj skalo, kaj diversaj prinotoj, ne presitaj, sed manskribitaj per inko kaj pli-malpli malaperintaj. Mi sciis tiujn apartaĵojn, kaj mi sciis ke la definitiva vojplano povas esti restarigita nur per zorga konfrontado de ambaŭ mapoj. Nu, la tagon post la malapero de mia ekzemplero, tiu de la Nacia Biblioteko estis petita de leganto kiu forportis ĝin, sen ke eblis determini la kondiĉojn per kiuj la ŝtelo estis plenumita.

Eksklamaciojn estigis tiuj paroloj.

– Ĉi-foje, la afero iĝas serioza.

– Tial, ĉi-foje, diris Devanne, la polico emociiĝis kaj okazis duobla enketo, kiu, cetere, donis nenian rezulton.

– Kiel ĉiuj, kiuj rilatas al Arseno Lupeno.

– Precize. Tiam mi ekpensis peti helpon al Ŝerloko Holmsso, kiu respondis al mi ke li plej deziras kontakti kun Arseno Lupeno.

– Kia gloro por Arseno Lupeno! diris Velmont. Sed se nia nacia ŝtelisto, kiel vi nomas lin, preparas neniun projekton pri Thibermesnil, Ŝerloko Holmsso estos veninta por nenio, ĉu?

– Estas alia afero, kaj kiu vigle interesos lin, la malkovro de la subteraĵo.

– Kiel do? vi diris al ni, ke unu el la enirejoj malfermiĝis al la kamparo, kaj la alia en tiu salono mem!

– Kie? En kiu loko de tiu salono? La linio kiu bildigas la subteraĵon sur la mapoj ja kondukas unuflanke al eta cirklo kun tiuj du majuskloj: “T.V.”, kio signifas Turon Vilhelmo. Sed la turo estas ronda, kaj kiu povus determini je kiu loko de la rondo komenciĝas la vojplano de la desegno?

Devanne ekbruligis duan cigaron kaj verŝis al si glason da Benediktino. Oni premis lin per demandoj. Li ridetis, feliĉa pro la estigita intereso. Fine, li eldiris:

– La sekreto estas perdita. Neniu en la mondo konas ĝin. De patro al filo, laŭ la legendo, la potencaj senjoroj transdiris ĝin unu al la alia sur la mortolito, ĝis la tago kiam Ĝofredo, la

lastenaskita, havis la kapon tranĉita sur la eŝafodo, la 7-an de termidoro de la jaro 2, dum sia dek-naŭa jaro.

– Sed de unu jarcento, oni verŝajne serĉis, ĉu?

– Oni serĉis, sed vane. Mi mem, kiam mi aĉetis la kastelon el la pra-pra-nevo de la Konvenciano Leribourg, mi farigis prifosadojn. Kiautile? Pensu ke tiu turo, ĉirkaŭita de akvo, estas kunligita al la kastelo nur per unu punkto, kaj ke necesas, konsekvence, ke la subteraĵo pasu sub la malnovaj foskavoj. La plano de la Nacia Biblioteko cetere montras sekvon da kvar ŝtuparoj havantaj kvardek ok ŝtupojn, kio supozigas profundon de pli ol dek metroj. Kaj la skalo, aneksita al la alia plano, determinas la distancon al ducent metroj. Fakte, la tuta problemo estas ĉi tie, inter tiu planko, tiu plafono kaj tiuj muroj. Verdire, mi konfesas, ke mi hezitas ilin malkonstrui.

– Kaj ĉu oni havas neniun indicon?

– Neniun.

La abato Gélis objetis:

– Sinjoro Devanne, ni menciuj du citaĵojn.

– Ho! ekcriis Devanne ridante, sinjoro paroĥestro estas traserĉanto de arkivoj, granda leganto de memoraĵoj, kaj ĉio rilata al Thibermesnil pasiigas lin. Sed la klarigo, pri kiu li parolas, utilas nur por impliki la aferojn.

– Sed ankaŭ?

– Ĉu vi vere volas scii?

– Ege.

– Vi do scios, ke rezultas el liaj legadoj, ke du Franciaj reĝoj konis la solvon de la enigmo.

– Du Franciaj reĝoj!

– Henriko la 4-a kaj Ludoviko la 16-a.

– Ili ne estas kiuj ajn reĝoj. Kaj kiel sinjoro abato scias tion?...

– Ho! ja estas simple, daŭrigis Devanne. La antaŭhieraŭon de la batalo de Arques, la reĝo Henriko la 4-a venis vespermanĝi kaj tranokti en tiun kastelon. Je la dek-unua vespere, Ludovikino de Tancarville, la plej bela damo el Normandio, estis enkondukita ĉe li per la subteraĵo kun la komplaceco de la duko Edgard, kiu, ĉi-okaze, malkaŝis la familian sekreton. Tiun sekreton Henriko la 4-a poste konfidis al sia ministro Sully, kiu rakontas la anekdoton en siaj *Reĝaj Ekonomioj de Ŝtato* sen akompani ĝin per alia komento ol tiu nekomprenebla frazo:

“La hakilo kirliĝas en la aero kiu tremetas, sed la flugilo malfermiĝas kaj oni iras ĝis Dio.”

Ekestis silento, kaj Vermont rikanis:

– Tio ne estas blindige klara.

– Ĉu ne? Sinjoro paroĥestro asertas, ke Sully notis tiel la solvon de la enigmo, sen perfidi la sekreton de la skribistoj al kiuj li diktis siajn memoraĵojn.

– La hipotezo estas inĝenia.

– Mi koncedas tion, sed kio estas la kirliĝanta hakilo, kaj la ekfluganta birdo?

– Kaj kio iras ĝis Dio?

– Mistero!

Velmont daŭrigis:

– Kaj pri tiu bona Ludoviko la 16-a, ĉu ankaŭ por ricevi la viziton de damo, ke li malfermigis la subteraĵon?

– Tion mi ne scias. Oni rajtas diri, nur ke Ludoviko la 16-a restadis en 1784 en Thibermesnil, kaj ke la fama fera ŝranko, malkovrita en la Luvra palaco laŭ la denunco de Gamain, entenis paperon kun tiuj vortoj skribitaj de li: “Thibermesnil: 2-6-12.”

Horacio Velmont ekridegis:

– Venkon! mallumoj pli kaj pli disiĝas. Du oble ses faras dek du.

– Laŭplace ridu, sinjoro, diris la abato, tiuj du citaĵoj tamen enhavas la solvon, kaj iam aŭ tiam venos iu, kiu scios interpreti ilin.

– Ŝerloko Holmso unue, diris Devanne... Krom se Arseno Lupeno antaŭas lin. Kion vi pensas pri tio, Velmont?

Velmont ekstaris, metis la manon sur la ŝultron de Devanne, kaj deklaris:

– Mi pensas, ke al la donitaĵoj havigitaj de via libro kaj de tiu de la Biblioteko, mankis plej grava informo, kaj ke vi afable donacis ĝin al mi. Mi dankas vin pro tio.

– Tiel ke?...

– Tiel ke nun, ĉar la hakilo kirliĝis, la birdo forfuĝis, kaj du oble ses faras dek du, mi nur ekigu la taskon.

– Sen perdi unu minuton.

– Sen perdi unu sekundon! Ĉu mi ne priŝtelu vian kastelon, ĉi-nokte, tio estas antaŭ la alveno de Ŝerloko Holms?

– Vi efektive havas nur malmultan tempon. Ĉu vi volas, ke mi rekonduku vin?

– Ĝis Dieppe?

– Ĝis Dieppe. Mi profitos la okazon por mem alkonduki sinjoro kaj sinjorino d'Androl kaj juna filino de iliaj amikoj, kiuj alvenas per la noktomeza trajno.

Kaj alparolante al la oficiroj, Devanne aldonis:

– Cetere, ni ĉiuj rekuniĝos tie morgaŭ por tagmanĝo, ĉu ne, sinjoroj? Mi ja kalkulas je vi, ĉar tiu kastelo devas esti sieĝata de

viaj regimentoj kaj sturmata je la dek unua.

La invito estis akceptita, oni disiĝis kaj momenton poste, unu 20-30 Orstelo kunportis Devanne kaj Vermont sur la vojo al Dieppe. Devanne delasis la pentriston antaŭ la kazino, kaj iris al la stacidomo.

Je noktomezo, liaj amikoj eltrajniĝis. Je noktomezo kaj duono, la aŭtomobilo transpasis la pordojn de Thibermesnil. Je la unua, post malpeza vespermanĝo surtabligita en la salono, ĉiu retiriĝis. Iom post iom, la lumoj estingiĝis. La granda silento de la nokto ĉirkaŭvolvis la kastelon.

Sed la luno dispelis la nubojn, kiuj vualis ĝin, kaj, tra du el la fenestroj, plenigis la salonon per blanka heleco. Tio daŭris nur momenton. Tre rapide la luno sin kaŝis malantaŭ la kurtenon de la montetoj. Kaj ekkestis mallumo. La silento pliiĝis per la pli dika ombro. Apenaŭ, tempaltempe, meblaj krakoj perturbis ĝin, aŭ la susurado de la kanoj sur la lageto kiu banas la malnovajn murojn per siaj verdaj akvoj.

La horloĝo trapreĝis la senfinan rozarion de la sekundoj. Ĝi sonis la duan. Poste, denove, la sekundoj falis hastaj kaj monotonaj en la peza paco de la nokto. Poste la tria tintis.

Kaj subite io klakis, kiel faras, ĉe la paso de trajno, la disko de signalo kiu malfermiĝas kaj refaldiĝas. Kaj maldika radio da lumo trapasis la salonon de unu flanko al la alia, kvazaŭ sago lasus post si flagrantan strion. Ĝi ŝprucis el la centra kanelo de pilastro, kie apogas, dekstre, la frontono de la libroŝranko. Ĝi unue haltis sur la kontraŭa panelo en brila cirklo, poste ĝi promenis ĉiufanken kvazaŭ malkvieta rigardo kiu sondas la

ombron, poste ĝi svenis por denove ŝpruci, dum tuta parto de la libroŝranko turniĝis ĉirkaŭ si mem kaj senmaskigis larĝan volboforman aperturon.

Eniris viro, tenanta elektran lanternon enmane. Ekaperis alia viro kaj tria, portantaj rulaĵon da ŝnuroj kaj malsamajn instrumentojn. La unua inspektis la ĉambron, aŭskultis kaj diris:

– Voku la kamaradojn.

El tiuj kamaradoj, venis ok el la subteraĵo, fortikaj ulegoj, kun energia vizaĝo. La transloĝigo komenciĝis.

Tio estis rapida. Arseno Lupeno pasis de meblo al alia, ekzamenis ĝin kaj, laŭ la dimensioj aŭ la arta valoro, indulgis ĝin aŭ ordonis:

– Forprenu!

Kaj la objekto estis forprenita, glutita de la faŭkanta buŝego de la tunelo, ekspedita en la intestaron de la tero.

Kaj tiel estis forĵonglitaj ses foteloj kaj ses seĝoj en stilo Ludoviko la 15-a, kaj tapiŝoj de Aubusson, kaj kandeligoj subskribitaj de Gouthière, kaj du Fragonard, kaj unu Nattier, kaj unu busto de Houdon, kaj statuetoj. Kelkfoje Lupeno malrapidis antaŭ belega kofro aŭ superba pentraĵo kaj suspiris:

– Tro peza, tiu ĉi... tro granda... kiel domaĝe!

Kaj li daŭrigis sian ekspertizon.

En kvardek minutoj, la salono estis “malembarasita”, laŭ la esprimo de Arseno. Kaj ĉio tio estis plenumita laŭ admirinda ordo, sen iu bruoj, kvazaŭ ĉiuj objektoj, kiujn manipulis tiuj viroj, estus garnitaj per dika vato.

Tiam li diris al la lasta el ili, kiu foriris portante horloĝon subskribitan de Boulle:

– Senutilas reveni. Estas konsentite, ĉu ne, ke tuj kiam la kamiono estos ŝarĝita, vi rapidos ĝis la garbejo de Roquefort.

– Sed vi, ĉefo?

– Oni lasu al mi la motorciklon.

Kiam la viro estis foririnta, li repuŝis, ĝisfunde, la moveblan klapegon de la libroŝranko, poste, malaperiginte la spurojn de la transloĝigo, forviŝinte la piedsignojn, li levis porteton kaj penetris en galerion, kiu servis kiel komunikilo inter la turo kaj la kastelo. Meze, estis vitrino, kaj pro tiu vitrino Arseno Lupeno daŭrigis siajn esplorojn.

Ĝi enhavis mirindaĵojn, unikan kolekton da poŝhorloĝoj, da tabakujoj, da ringoj, da kastelaninaj ornamaĵoj, da miniaturoj el la plej bela laboro. Per pinĉilo li cedigis la seruron, kaj tio estis por li neeldirebla plezuro ekprenante tiujn orajn kaj arĝentajn juvelojn, tiujn malgrandajn verkojn el tiel altvalora kaj delikata arto.

Li surmetis trabruste ĉirkaŭ la kolo larĝan tolan sakon speciale pretigitan por tiuj bonŝancaj okazoj. Li plenigis ĝin. Kaj li plenigis ankaŭ la poŝoj de sia jakoj, pantalono kaj veŝto. Kaj li fermis sian maldekstran brakon sur stako da tiuj retikuloj el perloj tiel aprezitaj de niaj prauloj, kaj kiujn la nuna modo tiel

pasie elserças... kiam mallaŭta bruo trafis lian orelon.

Li aŭskultis: li ne eraris, la bruo preciziĝis.

Kaj subite li rememoris: ĉe la ekstremaĵo de la galerio, interna ŝtuparo kondukis al apartamento ĝis nun neokupata, sed kiu estis, de tiun vesperon, rezervita al tiu junulino kiun Devanne iris serĉi al Dieppe kun siaj amikoj d'Androl.

Per rapida gesto, li premis la risorton de sia lanterno : ĝi estingiĝis. Li apenaŭ atingis la embrazon de fenestro, kiam supre de la ŝtuparo la pordo estis malfermita kaj malforta lumo heligis la galerion.

Li havis la impreson – ĉar, duonkaŝite de kurteno, li ne vidis – ke persono singarde malsupreniras la unuajn ŝtupojn. Li esperis, ke ĝi ne iros pli foren. Ĝi tamen malsupreniris kaj plurpaŝe antaŭeniris en la ĉambron. Sed ĝi eligis krion. Verŝajne ĝi ekvidis la rompitan vitrinon, tri-kvarone malplenan.

Laŭ la parfumo, li rekonis la ĉeeston de virino. Ŝiaj vestoj preskaŭ tuŝis la kurtenon kiuj kaŝis lin, kaj ŝajnis al li ke li aŭdas la koron de tiu virino bati, kaj ke ankaŭ ŝi divenas la ĉeeston de alia estulo, malantaŭ ŝi, en la ombro, je manatingo... Li pensis: “Ŝi timas... ŝi tuj foriros... neblas ke ŝi ne foriros.” Ŝi ne foriris. La kandelo kiu tremis en sia mano firmiĝis. Ŝi turnis sin, hezitis momenton, ŝajnis aŭskulti la timigan silenton, poste, abrupte, dispuŝis la kurtenon.

Ili vidis unu la alian.

Arseno murmuris, emociege:

– Vi... vi... fraŭlino!

Ŝi estis F-ino Nelly.

F-ino Nelly! la pasaĝerino de la transatlantika ŝipo, tiu kiu miksis siajn revojn al la revoj de la junulo dum tiu neforgesebla traveturado, tiu kiu ĉeestis lian areston, kaj kiu, prefere ol lin perfidi, havis tiun belan geston ĵetante en la maron la Kodakon kie li kaŝis la juvelojn kaj la monbiletojn... F-ino Nelly! la kara kaj ridetanta kreaĵo, kies bildo tiel ofte malgajigis aŭ ĝojigis liajn longajn horojn en karcero!

La hazardo estis tiel mirindega, kunigante ilin en tiu kastelo kaj je tiu nokta horo, ke ili ne moviĝis kaj ne eldiris parolon, konsternite, kvazaŭ hipnotigitaj de la nekredebla aperaĵo kia ili estis unu por la alia.

Ŝanceliĝante, emociskuite, F-ino Nelly devis eksidi.

Li restis staranta antaŭ ŝi. Kaj iom post iom, dum la senfinaj sekundoj kiuj pasis, li ekkonsciis pri la impreso kiun li videble faris ĉi-momente, kun la brakoj ŝarĝitaj per luksaĵetoj, la poŝoj ŝveliĝantaj, kaj sia sako ĝiskreve plenplena. Granda konfuzo invadis lin, kaj li ruĝiĝis pro sia nuna ĉeesto, en tiu malbela situacio de ŝtelisto kaptita ĉe la freŝa faro. Por ŝi, ekde nun, kion ajn alvenos, li estis la ŝtelisto, tiu kiu metas la manon en aliulajn poŝojn, tiu kiu enrompas pordojn kaj kaŝe enŝoviĝas.

Unu el la poŝhorloĝoj rulfalis sur la tapiŝon, ankaŭ dua. Kaj ankaŭ aliaĵoj estis defalontaj el liaj brakoj, kiujn li ne sciis kiel reteni. Tiam, subite decidiĝante, li lasis fali sur la fotelon parton

de la objektoj, malplenigis siajn poŝojn kaj demetis sian sakon.

Li sentis sin pli komforta antaŭ Nelly, li faris paŝon al ŝi kun la intenco alparoli ŝin. Sed ŝi havis retroiran geston, poste vive ekstaris, kvazaŭ trafite de timego, kaj impetis al la salono. La pordo malfermiĝis post ŝi, li rekuniĝis al ŝi. Ŝi estis tie, paralizita, tremanta, kaj ŝiaj okuloj kontemplis kun teruro la grandegan ĥaosigitan ĉambron.

Li tuj diris al ŝi:

– Je la tria, morgaŭ, ĉio estos remetita sialoken... La mebloj estos realportitaj...

Ŝi ne respondis, kaj li ripetis:

– Morgaŭ, je la tria, al tio mi devontigas min... Nenio en la mondo povos malhelpi min teni mian promeson... Morgaŭ, je la tria...

Longa silento pezis sur ili. Li ne kuraĝis rompi ĝin kaj la emocio de la junulino kaŭzis al li veran suferon. Delikate, senvorte, li malproksimiĝis el ŝi.

Kaj li pensis:

“Ŝi foriru!... Ŝi sentu sin libera foriri... Ŝi ne timu min!...”

Sed subite ŝi ektremis kaj balbutis:

– Aŭskultu... paŝojn... mi aŭdas iun marŝi...

Li mire rigardis ŝin. Ŝi ŝajnis emociegita, samkiel pro alproksimiĝo de danĝero.

– Mi aŭdas nenion, li diris, kaj malgraŭe...

– Kion! sed necesas fuĝi... rapide, fuĝu...

– Fuĝi... kial?

– Necesas... necesas... Ha! ne restu...

Ŝi tuj kuris ĝis la lokon de la galerio kaj aŭskultis atente. Ne, estis neniue. Eble la bruoj venis el ekstere?... Ŝi atendis sekundon, poste, trankviligite, turnis sin.

Arseno Lupeno estis malaperinta.

Je la momento mem kiam Devanne konstatis la priabon de sia kastelo, li pensis: “Ja Velmont faris la fiagon, kaj Velmont estas neniue alia ol Arseno Lupeno.” Ĉio klariĝis tiel, kaj nenio klariĝis alie. Tamen, tiu ideo nur ekĝermis en li, ĉar estis tiom neverŝajne ke Velmont ne estas Velmont, nome la fama pentristo, la rondokamarado de lia kuzo de Estevan. Kaj kiam la ĝendarmbrigadisto, tuj avertite, sin prezentis, Devanne eĉ ne songis komuniki al li tiun absurdan supozon.

La tutan matenon, okazis, en Thibermesnil, nepriskriblebla iro-reiro. La ĝendarmoj, la kampara gardisto, la polica komisaro de Dieppe, la loĝantoj de la vilaĝo, ili ĉiuj tumultis en la koridoroj, aŭ en la parko, aŭ ĉirkaŭ la kastelo. La alproksimiĝo de la manovrantaj trupoj, la kraketado de la fusiloj pliigis la pitoreskon de la sceno.

La unuaj priserĉoj ne havigis iun indicon. Ĉar la fenestroj ne estis rompitaĵ, nek la pordoj difektitaj, sendube la translokado okazis tra la sekreta elirejo. Tamen, sur la tapiŝo, neniuj piedsignoj, sur la muroj, neniuj neordinara markoj.

Nur unu afero, neatendita, kaj kiu ja karakterizis la fantazion de Arseno Lupeno: la fama *Kroniko* de la 16-a jarcento estis repreninta sian antaŭan lokon, kaj, apude, troviĝis simila libro, kiu precize estis la ekzemplero ŝtelita en la Nacia Biblioteko.

Je la dek unua la oficiroj alvenis. Devanne gaje bonvenigis ilin – kiu ajn malagrable estis kaŭzita de la perdo de tiaj belartaĵoj, lia riĉeco ebligis al li elteni ĝin sen malbonhumoro. Liaj amikoj de Androl kaj Nelly malsupreniris.

Post la prezentadoj, oni ekrimarkis ke mankas gasto. Horacio Velmont. Ĉu li ne venos?

Lia foresto estus vekinta la suspektojn de Georgo Devanne. Sed je tagmezo akurate, li eniris. Devanne ekkriis:

– Ha fine! Jen vi!

– Ĉu mi ne estas akurata?

– Jes, sed tia vi estus povinta ne esti... post nokto tiel agitita! ĉar vi scias la novaĵon, ĉu?

– Kiun novaĵon?

– Vi prirabis la kastelon.

– Nu do!

– Ĝuste kiel mi diras al vi. Sed unue ofertu vian brakon al F-ino Underdown, kaj ni altabliĝu... Fraŭlino, permesu al mi...

Li interrompiĝis, mirigite de la konfuzo de la junulino. Poste, subite, rememorante:

– Estas vere, pri tio, vi iam vojaĝis kun Arseno Lupeno... antaŭ lia aresto... La simileco surprizas vin, ĉu ne?

Ŝi ne respondis. Antaŭ ŝi, Vermont ridetis. Li kliniĝis, ŝi prenis lian brakon. Li kondukis ŝin al ŝia sidloko kaj eksidis fronte al ŝi.

Dum la tagmanĝo oni parolis nur pri Arseno Lupeno, pri la mebloj forprenitaj, pri la subteraĵo, pri Ŝerloko Holms. Sole je la fino de la manĝo, ĉar oni ekstraktis aliajn temojn, Vermont miksiĝis en la konversacion. Li estis laŭvice amuza kaj serioza, elokventa kaj sprita. Kaj ĉion, kion li diris, li ŝajnis diri nur por interesi la junulinon. Tre absorbite, ŝi ne aspektis aŭdi lin.

Oni surtabligis la kafon ĉe la teraso kiu superas la honoran korton kaj la ĝardenon flanke de la ĉefa fasado. Meze de la gazono, la muziko de la regimento ekludis, kaj la homamaso da kamparanoj kaj soldatoj disiĝis en la parkajn aleojn.

Tamen Nelly rememoris la promeson de Arseno Lupeno: “Je la tria ĉio estos tie, al tio mi devontigas min.”

Je la tria! kaj la montriloj de la granda horloĝo, kiu ornamis la dekstran alon, indikis la duan kaj kvardek. Ŝi rigardis ilin malgraŭ si ĉiumomente. Kaj ŝi rigardis ankaŭ Belmont kiu sin lulis pace en komforta balancoseĝo.

La dua kaj kvindek... la dua kaj kvindek kvin... ia senpacienco, miksita kun angoro, premis la junulinon. Ĉu eblis, ke la miraklo plenumiĝos, kaj ke ĝi plenumiĝos je la antaŭfiksita minuto, dum la kastelo, la korto, la kamparo estis plenaj de homoj, kaj en tiu momento mem la respublika prokuroro kaj la enketa juĝisto daŭrigis siajn esplorojn?

Kaj tamen... tamen Arseno Lupeno promesis kun tia soleneco! Tio estos kiel li diris, ŝi pensis impresita de la tuta energio, aŭtoritato kaj certeco, kiuj estis en tiu viro. Kaj tio ne ŝajnis al ŝi miraklo, sed natura evento kiu devis fatale okazi.

Dum sekundo, iliaj rigardoj renkontiĝis. Ŝi ruĝiĝis kaj forturnis la kapon.

La tria horo... La unua bato sonoris, la dua, la tria... Horacio Belmont detiris sian poŝhorloĝon, levis la okulojn al la horloĝo, poste remetis ĝin en sian poŝon. Kelkaj sekundoj pasis. Kaj jen la homaso disflankiĝis, ĉirkaŭ la gazono, allasante du veturilojn, kiuj ĵus transiris la parkan kradon, ambaŭ jungitajn per du ĉevaloj. Ili estis ŝarĝveturiloj, kiuj postiras la regimentojn, kaj kiuj portas la kofrojn de la oficiroj kaj la sakojn de la soldatoj. Ili haltis antaŭ la perono. Furiero saltis el unu seĝo kaj petis S-ron Devanne.

Devanne alkuris kaj malsupreniris la ŝtupojn. Sub la baŝoj, li vidis, zorge aranĝitajn, bone ĉirkaŭvolvitajn, siajn meblojn, siajn pentraĵojn, siajn artaĵojn.

Al la starigitaj demandoj, la furiero respondis elmontrante la ordonon, kiun li ricevis de la deĵoranta adjudanto, kaj kiun tiu adjudanto prenis, la matenon, je la raporto. Laŭ tiu ordono, la dua roto de la kvara bataliono devis taskiĝi, por ke la meblaro deponita ĉe la vojkruciĝo de Halleux, en la arbaro de Arques, estu portita je la tria al S-ro Georgo Devanne, proprietulo de la kastelo de Thibermesnil. Subskribinto: la kolonelo Beauvel.

– Ĉe la vojkruciĝo, aldonis la furiero, ĉio estis preta, vicigite sur la gazono, kaj sur la gardo de... la pasantoj. Tio ŝajnis al mi stranga, sed kion! la ordono estis kategoria.

Unu el la oficiroj ekzamenis la subskribon: ĝi estis perfekte imitita, sed falsa.

La muziko ĉesis, oni malplenigis la ŝarĝveturilojn, oni reenigis la meblojn.

Meze de tiu agitiĝo, Nelly restis sola ĉe la ekstremaĵo de la teraso. Ŝi estis gravmiena kaj maltrankvila, agitate de konfuzaj pensoj, kiujn ŝi ne provis vortigi. Subite, ŝi ekvidis Vermont alproksimiĝantan. Ŝi intencis eviti lin, sed la angulo de la balustrado, kiu portas la terason, ĉirkaŭis ŝin ambaŭflanke, kaj linio da arbustaj kestegoj, oranĝarboj, oleandroj kaj bambuoj, lasis al ŝi neniun alian elirejon ol la vojon laŭ kiu alpaŝis la junulo. Ŝi ne moviĝis. Sunradio tremis sur ŝiaj oraj haroj, agitate de la gracilaj folioj de bambuo. Iu eldiris tre mallaŭte:

– Mi plenumis mian ĉi-noktan promeson.

Arseno Lupeno estis apud ŝi, kaj ĉirkaŭ ili estis neniuj.

Li ripetis, kun hezita sinteno kaj timida voĉo:

– Mi plenumis mian ĉi-noktan promeson.

Li atendis dankan vorton, almenaŭ geston kiu pruvus ŝian interesiĝon pri tiu ago. Ŝi silentis.

Tiu ignoro incitis Arsenon Lupenon, kaj, samtempe, li havis la profundan senton pri ĉio, kio disigis lin de Nelly, nun ke ŝi sciis la veron. Li volis senkulpigi sin, serĉi ekskuzojn, montri sian vivon laŭ ĝiaj aŭdacaj kaj grandaj aspektoj. Sed, anticipe, la paroloj ofendetis lin, kaj li sentis la stultecon kaj la impertinentecon de ĉia klarigo. Tiam li malĝoje murmuris, invadite de fluo da rememoroj:

– Kiel la pasinteco foras! Ĉu vi memoras la longajn horojn sur la ferdeko de *La Provenco*? Ha! jen... vi havis, kiel hodiaŭ, rozon enmane, palan rozon kiel tiun ĉi... Mi petis ĝin de vi... vi ŝajne ne aŭdis... Tamen, post via foriro, mi trovis la rozon... forgesitan kredeble... Mi konservis ĝin...

Ŝi ankoraŭ ne respondis. Ŝi ŝajnis tre malproksime de li. Li daŭrigis:

– Memore al tiuj horoj, ne pensu pri kio vi scias. La pasinteco ligiĝu kun la nuneco! Mi ne estu tiu, kiun vi vidis ĉi-nokte, sed tiu iam renkontita, kaj viaj okuloj rigardu min, eĉ nur sekundon, kiel ili rigardis min... Mi petegas... Ĉu mi ne estas la sama?

Ŝi levis la okulojn, kiel li petis, kaj rigardis lin. Poste, senvorte, ŝi metis sian fingron sur ringon, kiun li surhavis ĉe la montrofingro. Oni povis vidi nur la cirklon, sed la juvelo, transturnita enen, konsistis en mirinda rubeno.

Arseno Lupeno ruĝiĝis. Tiu ringo apartenis al Georgo Devanne.

Li ridetis amare.

– Vi pravas. Kio estis ĉiam estos. Arseno Lupeno estas kaj povas estis nur Arseno Lupeno, kaj inter vi kaj li, eĉ rememoro ne eblas... Pardonu al mi... Mi estus devinta kompreni, ke mia nura ĉeesto apud vi estas ofendego...

Li retiriĝis laŭlonge de la balustrado, kun la ĉapelo enmane. Nelly preterpasis lin. Li emis reteno ŝin, petegi ŝin. Li malhavis aŭdacon, kaj sekvis ŝin perokule, kiel dum fora tago kiam ŝi trapasis la ponteton sur la kajo de Novjorko. Ŝi supreniris la nivelojn kiuj kondukas al la pordo. Ankoraŭ dum momento ŝia svelta silueto desegniĝis inter la marmoroj de la vestiblo. Li ne plu vidis ŝin.

Nubo malheligis la ĉielon. Arseno Lupeno observis, senmova, la spuron de la etaj paŝoj postlasitaj en la sablo. Subite, li ektemis: sur la bambua seĝo, kontraŭ kiu Nelly estis apoginta sin, kuŝis la rozo, la pala rozo kiun li ne aŭdacis peti de ŝi... Kredeble, ankaŭ ĝi forgesita, ĉu? Sed ĉu forgesita intence aŭ senatente?

Li arde ekkaptis ĝin. Petaloj dekroĉiĝis. Li kolektis ilin unu post la alia kvazaŭ relikvojn...

– Nu, li pensis, mi ne plu havas ion farendan ĉi tie. Des pli ke se Ŝerloko Holmso enmiksiĝas, tio povos malboniĝi.

La parko estis senhoma. Tamen, proksime al la pavilono kiu estras la enirejon, staris grupo da ĝendarmoj. Li enprofundiĝis en la densejon, suprengrimpis la remparzonan muron kaj prenis, por iri ĝis la plej proksima stacidomo, padon kiu serpentumis inter la kampoj. Li apenaŭ marŝis dum dek minutoj kiam la vojo mallarĝiĝis, ĉirkaŭpremita inter du talusoj, kaj kiel tio okazis en tiu stretvojo, iu aliris tie, venante en la kontraŭa direkto.

Li estis viro ĉirkaŭ kvindek-jara eble, iom dika, kun razita vizaĝo, kaj kies kostumo precizigis fremdan devenon. Li tenis enmane pezan marŝobastonon, kaj ledsako pendis el lia kolo.

Ili kruciĝis. La fremdulo diris, kun brita akĉento apenaŭ perceptebla:

– Pardonu min, sinjoro... ĉu ĉi tie ja estas la vojo al la kastelo?

– Rekte antaŭen, sinjoro, kaj maldekstren tuj kiam vi estos ĉe la piedo de la muro. Oni atendas vin senpacience.

– Ha!

– Jes, mia amiko Devanne anoncis al ni vian viziton jam de hieraŭ vespere.

– Des malpli bone por sinjoro Devanne se li tro parolis.

– Kaj mi feliĉas pro esti la unua salutanta vin. Ŝerloko Holmso ne havas pli fervoran admiranton ol min.

Estis en lia voĉo preskaŭ nerimarkebla nuanco da ironio kiun li tuj bedaŭris, ĉar Ŝerloko Holmso konsideris lin dekape ĝispiede, kaj per okulo samtempe tiel penetranta kaj tiel akra, ke Arseno Lupeno havis la impreson, ke li estas ekkaptita, malliberigita, registrita de tiu rigardo, pli ekzakte kaj pli esence ol li iam estis de kiu ajn fotilo.

“La kliŝo estas fotita, li pensis. Ne plu valoras maskovesti min kun tiu ulo. Tamen... ĉu li rekonis min?”

Ili salutis unu la alian. Sed bruo de paŝoj eĥiĝis, bruo de ĉevaloj karakolantaj en ŝtala kliktintado. Tio estis la ĝendarmoj. La du viroj devis alpremiĝi kontraŭ la taluson, en la alta herbo, por ne esti renversitaj. La ĝendarmoj preterpasis, kaj ĉar ili sin sekvis distance, tio daŭris iom longe. Kaj Lupeno pensis:

“Ĉio dependas de tiu demando: ĉu li rekonis min? Se jes, li tre verŝajne profitos la situacion. La problemo estas angoriga.”

Post kiam la lasta rajdanto preteriris ilin, Ŝerloko Holmso restariĝis kaj, senvorte, brosis sian vestaĵon malpuran pro polvo. La rimeno de lia sako implikiĝis en dorna branĉo. Arseno Lupeno impetis. Dum ankoraŭ sekundo ili ekzamenis unu la alian. Kaj, se iu povus ekvidi ilin ĉi-momente, tio estus emocia spektaklo pri la unua renkonto de tiuj du viroj tiel potence armitaj, ambaŭ vere superaj kaj fatale destinitaj laŭ siaj neordinaraj kapabloj al kolizio, kiel du egalaj fortoj, kiun naturo pelas unu kontraŭ la alian tra spaco.

Poste la brito diris:

– Mi dankas vin, sinjoro.

– Plene je via servo, respondis Lupeno.

Ili disiĝis. Lupeno direktiĝis al la stacio. Ŝerloko holmsa al la kastelo.

La enketa juĝisto kaj la prokuroro foriris post vanaj priserĉoj kaj oni atendis Ŝerloko Holmsa kun scivolo kiun pravigis lia granda reputacio. Oni estis iom desapontita de lia aspekto de granda burĝo, tiom profunde malsimila al la bildo, kiun oni imagis pri li. Li havis nenion el la romana heroo, el la enigma kaj diabla persono, kiun elvokas en ni la ideo pri Ŝerloko Holmsa. Devanne, tamen, ekkriis, plena de ekzaltiĝo:

– Fine, Majstro, jen vi! Kia feliĉo! De tiom longe mi esperis... Mi preskaŭ ĝojas pro ĉio okazinta, ĉar tio havigas al mi la plezuron vidi vin. Sed prie, kiel vi venis?

– Trajne.

– Kia domaĝo! Mi tamen sendis al vi mian aŭtomobilon al la elŝipejo.

– Oficiala alveno, ĉu ne? kun tamburo kaj muziko. Bonega rimedo por faciligi al mi la taskon, grumblis la brito.

Tiu malmulte alloga tono konfuzis Devanne kiu, klopodante ŝerci, daŭrigis:

- La tasko, feliĉe, estas pli facila ol kion mi skribis al vi.
- Kaj kial?
- Ĉar la ŝtelo okazis tiun nokton.
- Se vi ne estus anoncinta mian viziton, sinjoro, probablas ke la ŝtelo ne estus okazinta tiun nokton.
- Kaj kiam do?
- Morgaŭ, aŭ alian tagon.
- Kaj tiukaze?
- Lupeno estintus kaptita.
- Kaj pri miaj mebloj?
- Ili ne estintus forprenitaj.
- Miaj mebloj estas ĉi tie.
- Ĉu ĉi tie?
- Ili estis reportitaj je la tria.
- De Lupeno?
- De du militistaj ŝarĝveturiloj.

Ŝerloko Holmsso kolere premis sian ĉapelon sur la kapo kaj rearanĝis sian sakon; sed Devanne ekkriis:

– Kion vi faras?

– Mi foriras.

– Kaj kial?

– Viaj mebloj estas ĉi tie, Arseno Lupeno estas for. Mia rolo finiĝis.

– Sed mi nepre bezonas vian helpon, kara sinjoro. Kio okazis hieraŭ povos ripetiĝi morgaŭ, ĉar ni ne scias la plej gravan aferon: kiel Arseno Lupeno eniris, kiel li eliris, kaj kial, kelkajn horojn poste, li faris redonon.

– Ha! vi ne scias...

La ideo de malkovrenda sekreto mildigis Ŝerlokona Holmsona.

– Bone, ni serĉu. Sed rapide, ĉu ne? kaj, laŭeble, solaj.

La frazo klare almontris la asistantojn. Devanne komprenis kaj enkondukis la briton en la salonon. Per seka tono, en frazoj kiuj ŝajnis antaŭkalkulitaj, kaj kiel ŝpareme! Holmsso starigis al li demandojn pri la antaŭtaga vespero, pri la gastoj ĉeestintaj, pri la kutimuloj de la kastelo. Poste li ekzamenis la du volumojn de la Kroniko, komparis la mapojn de la subteraĵo, ripetigis al si la citaĵojn rivelitajn de la abato Gélis, kaj demandis:

– Ĉu ja hieraŭ, por la unua fojo, vi parolis pri la du citaĵoj?

– Hieraŭ.

– Vi neniam antaŭe komunikis ilin al S-ro Horacio Velmont, ĉu?

– Neniam.

– Bone. Petu vian aŭtomobilon. Mi foriros post unu horo.

– Post unu horo!

– Arseno Lupeno ne bezonis pli por solvi la problemon, kiun vi starigis al li.

– Mi!... mi starigis al li...

– Jes ja! Arseno Lupeno kaj Velmont, tio estas la samo.

– Tion mi suspektis... ha! la kanajlo!

– Nu, hieraŭ vespere, je la deka, vi havigis al Lupeno la elementoj de vero, kiuj mankis al li kaj kiujn li serĉis de semajnoj. Kaj, dumnokte, Lupeno trovis la tempon por kompreni, kunigi sian bandon kaj prirabi vin. Mi pretendas esti tiel rapide solvema.

Li promenis de unu flanko de la ĉambro al la alia, pripensante, poste eksidis, krucis siajn longajn krurojn, kaj fermis la okulojn.

Devanne atendis, iom embarasita.

“Ĉu li dormas? Ĉu li pripensas?”

Iel hazarde, li eliris por doni ordonojn. Kiam li revenis, li ekvidis lin malsupre de la galeria ŝtuparo, surgenu, kaj esplorrigardante la tapiŝon.

– Kio do okazas?

– Rigardu... tie... tiujn makulojn de kandelo...

– Jen, efektive... kaj tute freŝaj...

– Kaj vi povas observi iom da ili sur la supro de la ŝtuparo, kaj ankoraŭ pli ĉirkaŭ tiu vitrino, kiun Arseno Lupeno rompis, kaj kies ornamaĵojn li forprenis por ilin meti sur tiun fotelon.

– Kaj kion vi konkludas el tio?

– Nenion. Ĉiuj tiuj faktoj sendube klarigus la plenumitan redonon. Sed tio estas flanko de la demando, kiun mi ne havas tempon ekstrakti. La ĉefaĵo estas la vojplano de la subteraĵo.

– Vi plu esperas...

– Mi ne esperas, mi scias. Ekzistas, ĉu ne, kapelo je du aŭ tricent metroj for de la kastelo?

– Ruina kapelo, kie troviĝas la tombo de la duko Rollon.

– Diru al via ŝoforo, ke li atendu nin apud tiu kapelo.

– Mia ŝoforo ankoraŭ ne revenis... Oni devas averti min... Sed, laŭ kion mi vidas, vi opinias ke la subteraĵo kondukas al la kapelo. Laŭ kiu indico...

Ŝerloko Holmso interrompis lin:

– Mi petas, sinjoro, ke vi havigu al mi ŝtupetaron kaj lanternon.

– Ha! vi bezonas ŝtupetaron kaj lanternon, ĉu?

– Laŭŝajne, ĉar mi petas ilin de vi.

Devanne, iom surprizita, sonorigis. Ambaŭ objektoj estis alportitaj.

La ordonoj tiam sinsekvis kun la rigoreco kaj la precizeco de la militaj komandoj.

– Alpogu tiun ŝtupetaron al la libroŝranko, maldekstre de la vorto Thibermesnil...

Devanne starigis la ŝtupetaron kaj la brito daŭrigis:

– Pli maldekstren... dekstren... Halt! Supreniru... Bone... Ĉiuj literoj de tiu vorto estas reliefaj, ĉu ne?

– Jes.

– Ni zorgu pri la litero H. Ĉu ĝi turniĝas en unu direkto aŭ alia?

Devanne ekprenis la literon H, kaj ekkriis:

– Tute prave, ĝi turniĝas! al la dekstro, kaj kvaroncirkle! Kiu do rivelis al vi?...

Ne respondante, Ŝerloko Holmso daŭrigis:

– Ĉu vi povas, el kie vi estas, atingi la literon R? Jes... skuu ĝin plurfoje, kiel vi farus kun riglilo, kiun oni puŝas kaj retiras.

Devanne skuis la literon R. Je lia granda miro, estiĝis interna ekklako.

– Perfekte, diris Ŝerloko Holmso. Restas al ni nur ŝovi vian ŝtupetaron al la alia ekstremaĵo, tio estas ĉe la fino de la vorto Thibermesnil... Bone... Kaj nun, se mi ne eraris, se la aferoj plenumiĝas kiel ili devas, la litero L malfermiĝos, kaj ankaŭ ĝiĉeto.

Kun ia soleneco, Devanne ekkaptis la literon L. La litero L malfermiĝis, sed Devanne rulfalis el sia ŝtupetaro, ĉar la tuta parto de la libroŝranko situanta inter la unua kaj la lasta litero de la vorto, pivotis ĉirkaŭ si mem kaj malkovris la aperturon de la subteraĵo.

Ŝerloko Holmso eldiris, flegma:

– Ĉu vi ne estas vundita?

– Ne, ne, diris Devanne restariĝante, ne vundita, sed tute mirigita, tion mi koncedas... tiuj svingiĝantaj literoj... tiu faŭkanta subteraĵo...

– Kaj poste? Ĉu tio ne ekzakte konformas al la citaĵo de Sully?

– Je Dio, laŭ kio?

– Damne! En la franca, la litero *H* estas prononcata kiel la vorto *hakilo*, la litero *R* kiel *aero*, kaj la litero *L* kiel *flugilo*. Do, la *H* kirliĝas, la *R* tremetas kaj la *L* malfermiĝas... kaj tio ebligis al Henriko la 4-a akcepti F-inon de Tancarville je nekutima horo.

– Sed pri Ludoviko la 16-a? demandis Devanne, konsternate.

– Ludoviko la 16-a estis granda forĝisto kaj lerta seruristo. Mi legis *Traktaĵon pri kombinaĵ seruroj*, kiun oni atribuas al li. Por Thibermesnil, montri al sia majstro tiun mekanikan ĉefverkon estis konduto de bona kortegano. Memorcele, la reĝo skribis: 2-6-12, tio estas H. R. L., la dua, la sesa kaj la dek-dua litero de la nomo.

– Ha! perfekte, mi ekkomprenas... Tamen, jen... Se mi klarigas al mi kiel oni eliras tiun ĉambron, mi ne eksplikas kiel Lupeno povis eniri ĝin. Ĉar, ja rimarku tion, li venis elekstere.

Ŝerloko Holmso eklumigis la lanternon kaj kelkpaŝe antaŭeniris en la subteraĵon.

– Jen, la tuta mekanismo videblas ĉi tie kiel la risortoj de horloĝo, kaj ĉiuj literoj ĉeestas inverse. Lupeno do nur bezonis movi ilin ĉi-flanke de la vando.

– Kiun pruvon?

– Kiun pruvon? Vidu tiun olean flakon. Lupeno eĉ antaŭpensis ke la dentradoj bezonus lubrikon, diris Ŝerloko Holmso ne sen admiro.

– Sed tiukaze li konis la alian elirejon, ĉu?

– Kiel mi konas ĝin. Sekvu min.

– Ĉu en la subteraĵon?

– Ĉu vi timas?

– Ne, sed ĉu vi certas ke vi orientos vin?

– Kun fermitaj okuloj.

Ili unue malsupreniris dek du ŝtupojn, poste dek du aliajn, kaj ankoraŭ dufoje dek du aliajn. Poste ili laŭiris longan koridoron, kies brikaĵ muroj montris markojn de sinsekvaj restaŭradoj kaj kiuj ie-tie ŝvitis. La grundo estis malseketa.

– Ni pasas sub la lageto, rimarkis Devanne, tute ne trankviligita.

La koridoro kondukis al ŝtuparo da dek du ŝtupoj, sekvata de tri aliaj ŝtuparoj da dek du ŝtupoj, kiujn ili pene supreniris, kaj ili alvenis en etan kavon enfositan en la roko mem. La vojo ne iris pluen.

– Diable, murmuris Ŝerloko Holmso, nur nudaj muroj, tio iĝas embarasa.

– Ĉu ni reiru? murmuris Devanne. Ĉar, finfine, mi neniel vidas la neceson scii pli. Mi estas sufiĉe informita.

Sed, levinte la kapon, la brito eligis suspiron pro malpeziĝo. Super ili ripetiĝis la sama mekanismo kiel ĉe la enirejo. Li nur bezonis funkciigi la tri literojn. Granita bloko baskulis. Transe, estis la tomboŝtono de la duko Rollon, gravita de la dek du reliefaj literoj “Thibermesnil”. Kaj ili troviĝis en la ruina kapelo, kiun la brito indikis.

– Kaj oni iras ĝis Dio, tio estas ĝis la kapelo, li diris, raportante la finon de la citaĵo.

– Ĉu eblas, ekkriis Devanne, konfuzate de la klarvido kaj la sagaco de Ŝerloko Holmso, ĉu eblas ke tiu nura indiko sufiĉis al vi?

– Ba! diris la brito, ĝi eĉ estis senutila. Sur la ekzemplero de la Nacia Biblioteko, la streko finiĝas maldekstre, tio vi scias, per cirklo, kaj dekstre, tion vi pretervidis, per eta kruco, sed tiel malaperinta, ke oni povas vidi ĝin nur lupee. Tiu kruco evidente signifas la kapelon kie ni staras.

La kompatinda Devanne ne kredis al siaj oreloj.

– Tio estas mirinda, mirakla, kaj tamen, infane simpla! Kiel neniu iam malimplikis tiun misteron?

– Ĉar neniu iam kunigis la tri aŭ kvar necesajn elementojn, alivorte ambaŭ librojn kaj la citaĵojn... Neniu, krom Arseno Lupeno kaj mi.

– Sed, ankaŭ mi, obĵetis Devanne, kaj la abato Gélis... Ni ambaŭ sciis tiom kiom vi, kaj malgraŭe...

Holmso ridetis.

– Sinjoro Devanne, ne ĉiuj kapablas malĉifri enigmojn.

– Sed jam de dek jaroj mi serĉas. Kaj viaflanke, en dek minutoj...

– Ba! kutimo...

Ili eliris el la kapelo, kaj la brito ekkriis:

– Vidu, aŭtomobilo atendanta!

– Sed ĝi estas mia!

– Via? sed mi kredis, ke la ŝoforo ne estis reveninta.

– Efektive... kaj mi demandas al mi...

Ili alpaŝis ĝis la aŭto, kaj Devanne, alvokante la ŝoforon:

– Eduardo, kiu ordonis al vi veni ĉi tien?

– Sed, respondis la viro, tiu estas S-ro Vermont.

– Ĉu S-ro Vermont? Ĉu vi renkontis lin?

– Apud la stacidomo, kaj li diris al mi, ke mi iru al la kapelo.

– Ke vi iru al la kapelo! sed kial?

– Por atendi Sinjoron... kaj la amikon de Sinjoro...

Devanne kaj Ŝerloko Holmso rigardis unu la alian. Devanne diris:

– Li komprenis, ke la enigmo estos ludo por vi. La omaĝo estas delikata.

Kontenteca rideto sulkis la maldikajn lipojn de la detektivo. La omaĝo plaĉis al li. Li eldiris, kapjesante:

– Li estas viro. Nur vidante lin, cetere, mi taksis lin.

– Vi do vidis lin, ĉu?

– Ni renkontiĝis antaŭ nelonge.

– Kaj ĉu vi sciis ke li estas Horacio Velmont, alinome Arseno Lupeno?

– Ne, sed mi baldaŭ komprenis tion... pro ia ironio lia.

– Kaj vi lasis lin eskapi, ĉu?

– Nu, jes... kvankam mi ja estis avantaĝa... kvin ĝendarmoj pasis.

– Sed fulmotondro! tio estis la nepra okazo por profiti...

– Ĝuste, sinjoro, fiere diris la brito, kiam temas pri kontraŭulo kiel Arseno Lupeno, Ŝerloko Holmso ne profitas la okazojn... li naskas ilin...

Sed la horo urĝis kaj, ĉar Lupeno havis la ĉarman komplezon sendi la aŭtomobilon, necesis profiti tion senprokraste. Devanne kaj Ŝerloko Holmso instaligis funde de la komforta limuzino. Eduardo faris la krankoturnon kaj oni foriris. Kampoj, aroj da arboj sinsekvis. La molaj ondiĝoj de la lando Caux ebeniĝis antaŭ ili. Subite la okuloj de Devanne estis altiritaj de paketo metita en unu el la elpoŝigujoj.

– Ej, kio estas tio? Paketo! Kaj por kiu do? Sed estas por vi.

– Ĉu por mi?

– Legu: *“S-ro Ŝerloko Holmso, el Arseno Lupeno.”*

La brito ekprenis la paketon, malŝnuris ĝin, forigis la du paperfoliojn kiuj ĉirkaŭis ĝin. Ĝi estis poŝhorloĝo.

– Ho! li diris, aldonante al tiu ekkrio koleran geston...

– Poŝhorloĝo, diris Devanne, ĉu hazarde?...

La brito ne respondis.

– Kiel! Ĝi estas via! Arseno Lupeno resendas al vi vian poŝhorloĝon! Sed se li resendas ĝin al vi, tio signifas ke li prenis ĝin... Li prenis vian poŝhorloĝon! Ha! tiu ŝerco ja bonas, la

poŝhorloĝo de Ŝerloko Holmsio ŝtelita de Arseno Lupeno! Dio, kiom tio estas komika! Ne, ver... vi senkulpigos min... sed tio superas min.

Kaj post kiam li bone ridis, li asertis per konvinkita tono:

– Ho! li ja estas viro, efektive.

La britoj restis senvorta. Ĝis Dieppe, li ne eldiris unu parolon, kun la okuloj fiksita sur la fuĝanta horizonto. Lia silentado estis terura, nesondebla, pli violenta ol la plej vigla furiozo. Ĉe la elŝipejo, li simple diris, sen kolero ĉi-foje, sen per tono en kiu oni sentis la tutan volon kaj la tutan energion de la persono:

– Jes, li estas viro, kaj viro sur kies ŝultron mi plezuros meti tiun manon kiun mi etendas al vi, sinjoro Devanne. Kaj sciu, mi opinias ke Arseno Lupeno kaj Ŝerloko Holmsio denove renkontiĝos tagon aŭ alian... Jes, la mondo estas tro malgranda por ke ili ne renkontiĝu... kaj ĉi-tage...